ANDRÉ LORULOT

# KIAL MI ESTAS ATEISTO

SAT-Broŝurservo
1990

ANDRÉ LORULOT

# KIAL MI ESTAS ATEISTO

kun prezenta antaŭparolo de
HAN RINER

el la franca originalo esperantigis
VALO
por la Liberecana Frakcio de S.A.T.

**SAT–Broŝurservo**
Esperanto * F 47470 Beauville
1990

## Averto de la tradukinto

Oni rimarkos, ke la aŭtoro kontraŭas precipe la asertojn de katolikaj propagandistoj. Tial ke la originalo estas destinita al franclingvaj legantoj, kiuj estas en plimulto edukitaj en la katolika religio (Francio, Belgio, Kvebekio). Tamen la argumentoj valoras ankaŭ pri ĉiuj ceteraj religioj, monoteistaj aŭ aliaj, kaj pri la diismo de filozofoj.

Mi tradukis "l'Eglise" jen per "la Eklezio", jen per "la Klerikaro", ĉar ofte la klerikaro sin identigas al la tuta Eklezio.

*Se la ideo mem pri Dio prenus al si palpeblan formon, se Dio mem ekstarus videble super la mult-amasojn, la unua devo de la homo estus rifuzi obeon, kaj trakti lin kiel egalulon, kun kiu oni diskutas, ne kiel mastron, kiun oni subestas.*

*Jean Jaurès*

*Plibone estas honori sian patron kaj sian patrinon ol servi la Di-ojn de la Ĉielo kaj de la Tero.*

*Budho*

*Ke mi ne kredas pri Dio, estas precipe tial, ke la kredantoj igis lin neebla.*

*André Lorulot*

## *PREZENTA ANTAŬPAROLO*

*"Ĉiu scias, ke André Lorulot estas sinonimo de sincereco, klarvido kaj kuraĝo". Tiuj vortoj de la kuraĝa, klarvida kaj potence sincera Victor Marguerite revenas en mia spirito, ĉiufoje kiam mi legas aŭ aŭskultas Andreon Lorulot. Ili sonis, glora fanfaro, en mia penso, kiam mi ekkonis tiun ĉi "Kial mi estas ateisto", ĉe kies sojlo mia kara Lorulot faris al mi la honoron deziri kelkajn liniojn de mi.*

*Antaŭenire en la nova libro de la nelacigebla propagandisto, baldaŭ la belega laŭdo ŝajnis al mi nesufiĉa. Mi pli kaj pli bone konstatis - de mi jam konatajn - kelkajn meritojn ĉe Lorulot krom tiuj, kiujn "ĉiu scias".*

*Li tro modeste skribis al mi, ke lia libro "ne havas eĉ plej etan pretendon revolucii la malnovan problemon". Li aldonis : "Mi scias ankaŭ, ke miaj vidoj ne estas tute identaj al viaj."*

*Kaj mi iris en mian legadon kun la intenco amike kontraŭmeti la vidojn de la antaŭparolisto al tiuj de la aŭtoro. Baldaŭ mi rezignis pri tiu projekto.*

*Ĝi havis sian belecon. Mi estus aminta montri du individuistojn praktikantajn kun sama konscio kaj sama ĝojo, ĉiu laŭ sia temperamento, sian pensliberon ; du malamikoj de la dogmo, unu pli raciema, la alia pli revema, ĉiu ĝuanta sian naturan ritmon kaj samtempe, iafoje preskaŭ adoptitan, la najbaran ritmon ; du konceptoj, kiuj ekmiras, nek kiam ili interproksimiĝas ĝis ŝajna identeco, nek kiam, sen malamikeco, ili malproksimiĝas per movo kaj rideto tiel malmulte ŝatata, ke inter la bonfaroj de tiu malproksimiĝo mi unue kalkulas la volupton plibone vidi la tuton da harmonio de la kamarado.*

*Por eltrovi tiun belon, necesos atendi pli favoran cirkonstancon.*

*La malnova problemo estis tiom skuita en ĉiuj sencoj kaj laŭ tiom da saĝaj aŭ malsaĝaj metodoj, ke oni ja ne povas plu ĝin "revolucii". Tamen la maniero, laŭ kiu ĝin prezentas kaj studas Lorulot, havas sian altvaloran novecon. Tiu renovigo estas kaŭzita, mi tion antaŭatendis, de luma ordo kaj de logiko certa ĝis gajeco. Ĝi estas kaŭzita ankaŭ de bela ekvilibra pleneco. Malgraŭ la diferenco de niaj temperamentoj kaj de niaj ritmoj, ĉio, kion mi povus diri pri la temo, ĝin diris Lorulot. Kaj li pliriĉigis min per pasiigaj konsideroj, kiujn mi ne estus eltrovinta.*

*Mi antaŭjuĝis, ke li kontentigos, eble plenigos trans mian deziron, tutan mian avidon pri logiko. Sed ĉu li ne lasus sen nutro, kaj ĉu eĉ ne okazus, ke li vundus miajn poeziajn postulojn ? Mia espero, tion mi vidas, eraris preskaŭ tiom, kiom mia timo. Ne nur en la nomo de sia racio, sed ankaŭ de tuta sia levita koro, de tuta sia indignanta konscienco, de tutaj siaj noble humanaj potencoj Lorulot kondamnas la fikcion Dio. Kiel lia koro kaj lia konscienco, tiel ĉiu sentema koro kaj ĉiu vere nedormanta konscienco postulas - tuj kiam estas preterpasitaj la ribelo kaj la infaneco de la blasfemo - la trankvilan, la ridetan ateismon.*

*Logike mi ne tro scias. Logike mi estas malpli ateista ol pozitivista kaj agnostika. La konsideroj de Lorulot pri la mikso el ordo kaj malordo, kiu konsistigas nian povran fuŝfaritan kosmon, aŭ pri la eterneco de la mondo kaj de la vivo, ĉarmus min sen ia tono de certeco iomete asertema. Ĉiu metafiziko bezonas ĉe la ekiro partiecon aŭ, por ĝentile diri, postulaton. Kiu metas sian elekton kiel aksiomon, tiu iom maltrankviligas min. Fronte al la antinomioj Lorulot montras sentimon, kiu mankas al mi. Li maltime solvas tian problemon, kian mi lasas nesolvita, kaj kiu, mi kredas, estas nesolvebla krom en la revo. Ta-*

*men liaj asertoj estas multe pli verŝajnaj ol tiuj de la Kredo. Kaj lia kuraĝo estas pli konvinka ol mia timemo, ĉe tiuj - preskaŭ ĉiuj homoj - kiuj havas tiom kaj pli ol li bezonon pri certeco.*

*Por verki saman libron, mi estus ofte riskinta vortojn pli nuancajn, pli hezitajn, sub lumo varianta siajn ludojn, pli irizan ; tiel mi estus eble loginta dek homojn de mia tempo, kiuj amas en la dubo "mildan kapkusenon por bone farita kapo".**

*Sed li konvinkos la bonvolemajn simplulojn, kaj li ne lasos nesatigitaj la fidindajn komplikemulojn. Tiu memcerta propagandisto estos multege pli utila ol estus Psikodoro**. La poeto, kiu en la balancado de la nuboj kaj de la fuĝemaj lumoj, kantas siajn ridetojn kaj siajn flirtadojn, estas ja elreviga por la amaso.*

*Ju pli mi pripensas, des pli mi preferas la libron de la solida Lorulot al tiu, kiun povus verki pri la sama problemo certa maljuna revulo, kiu subskribas*

*HAN RINER*

-----

* Citaĵo el la **Eseoj** de Montanjo.

** Psikodoro estas imagita filozofo, sub kies fikcia nomo Han Riner prezentis kelkajn el siaj ideoj, kvazaŭ sub pseŭdonimo lia.

# ENKONDUKA ANTAŬPAROLO

*Oni estas diisto pro sento ;*
*oni fariĝas ateisto pro racio.*
*André Lorulot*

Mi parolos pri Dio... Ĉu mi havas tempon por perdi ?
Ĉar li neniam zorgis pri mi, kial mi zorgus pri li ?
Mi havas nur unu taskon por plenumi : Vivi. Tasko tiel sendanka kiel vanta - kaj rapida.

Vivi en mia sfero. Tuj kiam mi provas eliri el ĝi, mi kolizias per la frunto al Nekonato. Ĉiuj miaj penoj estas neutilaj, aŭ preskaŭ neutilaj ; mi povas koni nur min mem - kaj tre malbone.

La mondo sin forŝtelas. Mi kredas diveni eron da vero, kaj mi ĝoje impetas. Sed malantaŭ la eltrovita vero, ĉiam la sama nesondebla abismo.

Tiom da homoj parolis pri Dio !
Tiom da libroj estis verkitaj pri Li !
Kaj ni ne estas pli antaŭenirintaj. Tiuj homoj nenion demonstris. Tiuj libroj instruis nenion al ni. El tiu tuta filozofia kaj religia miksaĉo eliĝas sama enuo, sama sento pri lamentinda senpoveco...

En tiaj kondiĉoj, kial tiu ĉi nova libro ? Ĉu mi havus la naivan pretendon sukcesi tie, kie tiom da aliaj fiaskis?

Kara leganto, mia modesta plumo ne falas en tian ridindaĵon.

Mi opinias, ke oni faras multe da malbono en la nomo de Dio. Mi pensas, ke estas tempo liberigi nin el tiu fantomo. Mi eksponos, kiel mi atingis la celon vivi sen Li, pensi sen Li, kontraŭbatali tiujn, kiujn sin servas per Li.

Estas ĉio. Kaj estas sufiĉe. Kaj mi ne estos perdinta

mian tempon kaj mian inkon, se la legado de tiuj ĉi paĝoj ebligos al kelkaj sin forsavi el la antikva terura Mensogo, por pensi libere, kaj same vivi...

## ĈU LA EKZISTO DE DIO ESTAS EVIDENTA ?

Antaŭnelonge eta katolika gazeto ("Je sers" - mi servas) reproduktis kun entuziasmo ŝercvorton atribuitan al la simplanima Bernardin de Saint-Pierre.

Tiu milda filozofo laŭfame iam deklaris : "Se mi volus pruvi la ekziston de la Aŭtoro de la Naturo, t.e. Dio, mi kredus manki (je ŝato) al vi kaj al mi : mi kredus min tiel malsaĝa, kiel se mi volus demonstri en plena tagmezo la ekziston de la suno".

Bernardin certe estis sincera. Pruve, li publikigis nur verkojn de imago kaj de filozofio, tre malmulte da teologio.

Ho ! tiuj dikaj libroj por pruvi la ekziston de Dio, en 708 paĝoj oktavaj ! Tiuj dikegaj volumoj, kiuj flaviĝas sub la polvo de bibliotekoj ! Tiuj frenezaj disertacioj, kiujn neniu iam legos !

Mi kredas pri la sincereco de la naiva Bernardin ; sed mi malpli kredas pri tiu de la homoj, kiuj lin citas.

Unue tial, ke ili defendas siajn profesiajn interesojn kaj mi konas neniun korporacion pli gajnavidan ol tiu de la pastroj.

Kaj poste tial... ke tiu penso estas absurda.

Se la ekzisto de Dio estus vere nekontestebla kaj luma, mi demandas, kial ni havas en Francio 30 000 pastrojn komisiitajn por ĝin demonstri.*

Neniu homo, ĉu eĉ pensiulo en Charenton** iam ekhavis la ideon publikigi libron por pruvi, ke la suno ekzistas...

Neniu homo, eĉ pasiginte dek du jarojn en seminario, iam havis la menson sufiĉe mallumigita por deklari, ke la

suno ne ekzistas.

Neniam oni disputaĉis pri la Suno. Nek ekskomunikis nek masakris.

Neniam la astronomoj depostulis la teruran monopolon, kiu konsistas el meto de la mano sur la infanon, ekde ĝia unua juneco, por dogme encerbigi al ĝi la principojn de la scienco, kiun ili instruas.

Cetere tiuj principoj kuŝas sur la libera Ekzameno kaj sur la Observado.

Ĉiu povas vidi la Sunon. Ĉiu povas post elementa klarigo kompreni la rolon, kiun ĝi ludas rilate al la Tero kaj al la aliaj Planedoj.

Ĉi tie la kredo estas superflua. Sufiĉas iom da racio.

Do estas nenia komparo starigenda inter la Suno kaj Dio, inter la astronomo kaj la pastro, inter la homo de scienco kaj la homo de religio.

Ne nur la ekzisto de Dio ne estas evidenta, sed la kredantoj mem estas tre malproksime de interkonsento pri ĝi.

Ili ja interkonsentas por aserti, ke ekzistas Dio. Sed tuj kiam temas pri difino, ili reciproke sin ekkaptas je la haroj.

Necese intervenas la dogmo, kaj ĉiu religio havas sian. Oni trudas al la kredanto tian aŭ tian alian formulon pri Dio. Nur per aŭtoritato la religioj estas eblaj.

Malgraŭ tio, pridemandu kredantojn de meza kulturo; petu, ke ili donu al vi ekvidon pri la Diaĵo, kiun ili tremante adoras. El cent kredantoj vi ne trovos kvar kapablajn prezenti al vi ideon proksimume inteligentan kaj proksimume klaran.

"Se, diras la Koncilio de Vatikano, iu pretendas, ke la dia revelacio ne enhavas propradire misterojn, sed ke kulturita racio povas kompreni kaj demonstri ilin ĉiujn : li estu anatema!" (Pastro Mikaelo, p.67)***

Do, karaj legantoj, ne utilas turmenti viajn cerbojn : neniam vi ion komprenos pri ĝi !

Pastro Mikaelo sentis la bezonon aldoni sian komenton. Li skribis iom poste : "Ĉion konsiderante, mi ne miras

pri tio. Ju pli nekompreneblaj estas niaj misteroj, des pli kredindaj ili estas. Ĉu la vero, kiun mi komprenas, povas enteni la infiniton?" Ja en tiu senco estas vere diri kun Tertuliano : "Ju malpli mi komprenas, des pli facile mi kredas, kiam temas pri Dio!"***

-----

* Pastro de Saint-Pierre cetere ne estas konsenta kun la Sankta Skribo, ĉar oni povas legi en la libro de Ijob :

"Ĉu tiuj serĉadoj povas igi cin trovi Dion ; ĉu ci povas trovi la perfektecon de la Ĉiopova? Ĝi estas pli alta ol la Ĉielo, kion ci povas fari? pli profunda ol la Infero, kion ci povus en ĝi vidi ?"

** Charenton apud Parizo. Tie estas fama frenezulejo.

*** **Apologetikaj Paroladoj** 106 - Tio estas la fama "Credo quia absurdum" (Mi kredas tial, ke tio estas absurda). Ju malpli mi komprenas, des pli mi kredas.

## INTELEKTA SCIVOLO KAJ KREDO

S-ro Albert Delacour skribis antaŭnelonge : "Por detrui la religian kredon, necesus du aferoj egale neeblaj : aŭ amputi la homan naturon je tiu nemortema scivolo, kiu faras ĝian turmenton kaj ĝian gloron, aŭ demonstri la neekziston de Dio, radikale absurda provo, ĉar ĉiu negativa pruvo estas ekster la ebloj de la homa spirito. Do la serena senreligieco estas escepta kaj ofte nurmomenta stato. K.E.D. (kio estis demonstrenda)"

Mi multe ŝatas tiun ĉi KED.

Ĝi estas plena de alteca memfido, kiu vere onin plezurigas.

KED ! juĝite ! pesite !

KED ! Silentu ! Ne elpepi ! aŭ mi metos vin en karceron !

Mi humile petas pardonon de S-ro Delacour, sed mi ne estas konvinkita. Mi opinias, ke la neganto de Dio tute ne estas devigita **amputi la homan naturon je tiu nemortema scivolo, kiu faras ĝian turmenton kaj ĝian gloron** .

Ateismo neniun amputas.

Kio stumpigas la homan inteligenton, tio estas la blinda kredo, tio estas la aŭtoritato ; tio ne estas, ne povas esti la libera penso.

Ĉu vere S-ro Delacour opinias, ke la kredanto estas pli scivola pri vero ol la nekredanto, ol la ateisto ?

Tute male, mia bona sinjoro !

La kredanto ne serĉas. Neniam li havas okazon por serĉi, ĉar li trovis la veron tute farita (mi emis diri : tute maĉita) en sia katekismo.

Kian scivolon povus ja havi civitano, kiu iras en la vivo kun okulŝirmiloj firme fiksitaj ambaŭflanke de la vizaĝo - portante sub sia brako la Revelacion ?

Oni instruis lin... silenti, ne meti demandojn. La scivolo estas afero malsana kaj danĝera, S-ro Delacour. Ĝi venas kredeble de la Demono.

Ĉiaokaze ĝi estas frukto de la homa orgojlo, kiu vo-

las ĉion scii kaj kompreni, anstataŭ klini la frunton kun humilo kaj kuiriĝadi en nescio.

Ĉu Adamo ne estis frapita (kaj kiel!), tial ke li gustumis la frukton de la Scio pri Bono kaj Malbono?

Li estis do pelita de scivolo - kaj de Eva, eĉ pli scivola ol li.

La intelekta scivolo, la aspiro al la granda kialo de la vivo kaj de la mondo, ne estas monopolo de la religia spirito. Vera estas eĉ la tuta malo.

Jen estas jam unu punkto, sur kiu la KED ŝajnas al mi iom... urĝema.

## "PRUVI, KE DIO NE EKZISTAS"

La teksto de S-ro Delacour (Albert) enhavas ankoraŭ pli gajigan aserton : "**estas radikale absurde**, li diras, voli demonstri la neekziston de Dio." S-ro Delacour ne inventis tiun embarasan argumenton. Kiom da kontraŭdirantoj, en publikaj kunvenoj, elmetis ĝin al mi - kun triumfa mieno!

"**Ni ne povas pruvi, ke Dio ekzistas, konsentite. Sed vi ne povas pli pruvi, ke li ne ekzistas**"

Mi kutime respondas al miaj kontraŭdirantoj : "Via konfeso estas al mi agrabla. Vi konfesas, ke vi estas nekapablaj pruvi vian Dion. Do, kial vi parolas pri Li? Kial vi adoras Lin, kial vi preĝas Lin? Vi faras el Li la pivoton de via vivo, la superegan celon de via aktiveco - kaj vi konfesas, ke vi ne povas pruvi al mi, ke ekzistas Dio, kaj vi dezirus vidi min kunlabori en la kulto, kiun vi dediĉas al Li...

Tio ne estas serioza.

Mi ja komprenas, ke vi provas reĵeti al mi la pilkon: "Pruvu al mi, ke ne ekzistas Dio!"

Pardonu : ja al tiu, kiu asertas la ekziston de Dio apartenas la demonstro pri tiu ekzisto.

Se li ne estas kapabla fari tiun demonstron, la afero estas juĝita. Ĉiu alia demonstro estas superflua. Vi vin mem kondamnis.

Cetere, estas demonstro, kiun ni tre facile povas fari : ke ĉio en la mondo okazas, kvazaŭ ekzistus nenia Diaĵo. Ni tion vidos poste.

Ne povante pruvi sian Dion, la kredantoj argumentas por demonstri, ke oni ne povas senigi sin je kredo pri Li!

Tiujn argumentojn mi strebos pridiskuti en tiu ĉi verko.

# LA ASPIRO AL DIO

*Iun vesperon oni demandis antaŭ Renan : "Ĉu Dio ekzistas? - Ankoraŭ ne." li respondis.*

"La homo estas aspiranta al Dio" diris Sankta Aŭgusteno.

La frazo estas bela, sed ĝi estas neekzakta.

La homo estas aspiranta al Belo, al Bono, al Lumo.

T.e. al Feliĉo, al kiel eble plej kompleta elvolviĝo.

T.e. al la Vivo.

Ami la vivon, la vivon ĉiam pli noblan, pli utilan, pli konscian, la Vivon Universalan, jen estas la sola idealo inda je tiu nomo. Ĉu oni aŭdacos subkomprenigi, ke tiu idealo estas malsupera al tiu de la religio? ke ĝi estas senpova por plialtigi la homon?

Sed, en la fundo de ĉiu religio, ĉu ni ne trovas analogan aspiron, pli konfuzan kaj pli malluman, aŭ pli malproksiman, sed egalvaloran?

La sola diferenco - kaj ĝi estas grava - estas, ke la religioj metas la efektivigon de la idealo en alia mondo, ekster la homaro.

Tiel la plej nobla el la homaj sentoj estas falsita, deturnita de sia normala kaj harmonia celo.

El aspiro al perfektiĝo en ĝojo oni faris konsternitan servutiĝon, malpliiĝon de la esto, tromplogon.

## "NI SUPRENIRU SUR ALTAJN LOKOJN"

En ĉiu tempo la kredantoj provadis plialtiĝi en tute aparta maniero : grimpante sur montojn.
Mi, fervora alpisto, ne volas faris tie ĉi mislokitan ironion. Neniu spektaklo povas esti komparata kun tiu de alta montaro. Tie oni komunias kun la naturo en ĝia formo plej sovaĝa, plej turmentita, plej impona. La homo ekkonscias pri sia malgrandeco fronte al tiuj grandegaj neĝkovritaj masoj, kaj li sin sentas tre ridinda, kontemplante tiujn majestajn kaj senemociajn panoramojn.

Mi pasie amas la montaron, sed sur ĝi mi neniam renkontis Dion.

Mi ja scias, ke Moseo supreniris al Sinajo, kiam li volis konversacieti kun la Eterna Patro.

Mi ja scias, ke la Biblio ofte diras pri Altaj Lokoj. Tie oni faris oferojn (Abraham apenaŭ ne oferis sian propan filon Isaako por esti agrabla al la sangavida Jehovo). Tie oni diradis preĝojn. Oni faris eĉ aliajn aferojn, ĉar la Sankta Skribo instruas al ni, ke la Altaj Lokoj fariĝis scenejoj de plej malnoblegaj seksumoj.

(Oni komence kontentigis Dion, kaj poste oni sin mem kontentigis.)

La tradicio ne estas perdita (ne de la seksumoj, sed de la kulto), ĉar Pierre l'Hermite, ĉefredaktoro de "**La Croix**" (la Kruco) skribis en tiu ĉi pia gazeto : "Ĉiu monto estas altaro, kiu alvokas Dion." (20an de oktobro 1920).

Kial vi supozas, ke Dio sin manifestas prefere sur la montoj ? Ĉu tial, ke ili estas malpli fore de la paradizo?

Tion oni povis kredi en la epokoj de malklereco, sed nun oni scias, ke 2000 aŭ 3000 metroj pliaj aŭ malpliaj ne estas grande gravaj por la Ĉiopova.

Oni iris sur la montojn por sin proksimigi al la Suno - kaj al Dio - ĉar la unua religio, kaj la malplej stulta, konsistis el adorado al tiu varmiga kaj bonfara Suno.

Tio estas naiva, sed pardonebla. Multe pli pardonebla

ol adorado al dika sanga Koro.

Nune, ni vidis pastron celebri la meson supre de la Ejfel-turo (ĝi estas la plej alta monto posedata de la Parizanoj.)

Poste, oni supreniris por diri la meson sur la supro de de la Pintmonto Suda en Pireneoj. Poste sur la supro de Brevento, super Chamonix en Alpoj. Fine, pastro Folliet sukcesis algrimpi la Goûter-pintmonton, kun hostioj en unu mano kaj sia "alpenstoch" (alpa bastono) en la alia.

"La Kruco" triumfas : **"Meso celebrita je preskaŭ 3000-metra alto"**. Estas rekordo!

Sed ĉu Dio sin montris? Tute ne.

Ĉu li manifestis sian kontentecon pri tiu eŭkaristia supreniro? Male.

"Surprizite de neĝa ŝtormo", Pastro Folliet (kaj liaj kunuloj) devis rezigni pri fino de la supreniro, kaj reveni al Chamonix tra la "Grandaj Muloj" (**"La Kruco"**, 4an de septembro 1931).

La malsupreniro estis malpli peniga ol la supreniro, tial ke la pastro ne havis plu la bonan Dion por porti. Sed ne grave... supreniri al 4000-metra alto por glori Dion, kaj ricevi ŝtormon kiel dankon, tio estas malkuraĝiga por plej grandaj bonvoloj.

En tiu speco de heroaĵo la lasta vorto ne estas dirita. Nun kiam S-ro Piccard malfermis la vojon al stratosfero, ni atendu vidi iun pastron iri tien supren por celebri siajn abrobatajn "misterojn", - kaj sin iom pli proksimigi al sia Dio!

## MALGRANDECO DE LA HOMO

*Kio estas Dio, kiun oni ne timas?*
*Se oni finatingas ne plu timi la*
*Diojn, tiom valoras ilin nuligi...*
*Félix Le Dantec*
*(**La prapatraj influoj**, p.151)*

La religioj volonte insistas pri la malgrandeco de la homo - en komparo al ĝia Kreinto.

Tiun malgrandecon ni ja devas konfesi.

La religio naskiĝis el la timo. Kaj la timo venas de la sento, kiun ni havas pri nia malforteco.

La primitivuloj adoris siajn Diojn sub la mistera ombro de grandaj arboj, meze de la arbaro profunda - kaj maltrankviliga.

En aliaj lokoj, kiel ni jam vidis, sur la supro de montoj ili konsciiĝis pri sia malgraveco.

Ankaŭ aliloke, rifuĝinte en la fora fundo de nigraj kaj preskaŭ neenireblaj kavernoj, ili alvokis la rimedojn de magio, kaj diligentis por sorĉe elpeli la malicajn spiritojn.

Ĉiu religio komenciĝis per tremo. Ĉiu preĝo estas konfeso pri egoismo. Ĉiu adoro estas funde profitema.

Monsinjoro Serrand, episkopo de Saint-Brieuc, tion naive konfesas, kiam li skribas (**"Religia Semajno"**, jul.1931):

"Estas afero, kiu ŝajnas kontraŭdira kaj monstra, se maristo ne estas pli ol ĉiuj aliaj religia homo. Al kiu aperas en ĉiu momento en maniero pli ekkapta ol al li, la malgrandeco kaj la senpoveco de la homo?... Al kiu en maniero pli timeginda ol al li sin trudas la grandeco kaj la potenco de Dio, kiam li estas perdita inter ĉielo kaj akvo en la senlima spacego de la oceano, aŭ kiam la furiozaj ondegoj minacas rompi lin kiel pajleron?... Kiel nature devus esti al li fleksi la genuojn, adori kaj preĝi..."

Oni ne povus pli malkaŝe konfesi, ke la timaĉo vivigas la religiojn - kaj konsekvence ankaŭ la pastrojn.

En prahistoria tempo, ŝtono subite disiĝas de la volbo de groto, en kiu kelkaj homoj estas kuniĝintaj. Tamen neniu moviĝis. Kaj tamen ne ventas. La ŝtono ne falis **de si**

mem, Kiu ĝin ĵetis?

Tiam la angoro frenezigas la spiritojn. Oni kredas ekvidi en la ombro la silueton de kruela fantomo. Kial oni ne spontane falus surgenue? Kiel ne pripetegi tiun fantomon, promesi al ĝi donacon, oferaĵon, por ke ĝi lasu en paco la malfortajn kreitojn genufleksegantajn ĉe ĝiaj piedoj?

Estu sen timo, ĉiam troviĝos iu ruzlerta, kiu sin proponos por plenumi la komision, kaj iros porti la donacon ... vialoke.

La scienculoj nomis animismo la primitivan religian menson.

La unuaj homoj klarigis ĉiajn fenomenojn, metante malantaŭ ilin konsciajn kaj agantajn volojn, nevideblajn estaĵojn, bonajn aŭ malbonajn, sed timindajn.

Tiel ili turnis preĝojn al la vento, al la fuimo, al la pluvo! ili proponis donacojn al la diaĵoj por eviti la inundon, la malsanon, la morton, aŭ cele ricevi abundan ĉasaĵon aŭ venkon super siaj malamikoj.

Ĉiuj naturaj fortoj estis inteligentaj, dotitaj je animo, por la primitivulo. Estas tio, la animismo.

Animismo estas la unua provpeno de la malkleruloj por klarigi la mondon*.

Sed se ni estas tiel malgrandaj... granda estas nia pretendo!

Ni supozas, ke niaj preĝoj estos agrablaj al la Dioj tiel grandaj, tiel potencaj! Ni firme kredas, ke ili bezonas niajn genufleksojn kaj niajn oferojn. Kaj ke ili ekkoleras, kiam ni malobeas al ili! Kaj ke ili sin venĝas dum tuta eterneco por nin puni.

Nin puni pro kio? Ĉu tial, ke ni estas tiel malgrandaj, tiel malgrandaj... Pro kies kulpo?

Mi aprobas la pastron, ke li havigas al la homo la senton pri sia malgrandeco. Mi ĉesas lin kompreni, kiam li volas fari el tiu malgrando la centron de la mondo kaj la idealon de Dio...

La pastroj volonte riproĉas al la ateistoj, ke ili estas orgojlaj. Laŭ ili, tial ke la vanteco nin erarigas, ni ri-

fuzas genui antaŭ ilia Super-Ĝendarmo.

Ĉion bone konsiderinte, mi opinias, ke la religiulo estas centoble pli orgojla ol la liberpensulo.

Li imagas, ke infinita, eterna kaj ĉiopova Dio havas la okulojn konstante fiksitaj sur lin. Kia honoro!

Li imagas ĝis la kredo, ke Dio sin faris homo por savi lin, malkoheran muŝeton...

Pastro Brocas, paroĥestro de Ribérac, pelas la orgojlon tre antaŭen, kiam li skribas : "Mi kredas pri Dio, ĉar se ne ekzistus Dio, ne estus plu diferenco inter mia hundo kaj mi." (**Paroĥa Bulteno, septembro 1929**).

Kia malsâto al la hundoj ! Oni ja vidas, ke ili neniom ŝutas por la "denaro de la kulto"...

Ĉu nur simple pro tiu motivo, S-ro Brocas, vi kredas pri Dio? Nur por esti pli grava ol hundo? Entute do, por esti mem eta Dio...

-----

* **Animismo** estas la klarigo plej logika kaj plej simpla... por la malklerulo.

Montru horloĝon al juna infano. Mirante pri la tiktako, li diros : "Estas besteto, kiu moviĝas tie ene."

Kiam ĝi unuafoje aùdos fonografon, ĝi ektimos, kaj kredos, ke iu etulo sin kaŝis en la skatolo.

Saman klarigon donos sovaĝulo.

Ĉu ni ne vidas ankaù la infaneton frapi la tablon, al kiu ĝi koliziis - por ĝin puni ?

## LA SUPERSTIĈO PRI LA VIDEBLO

Ni ne forgesu la grandan argumenton de la klerikalaj publikaj kunvenoj : "La liberpensuloj ne kredas pri Dio, tial ke ili neniam vidis lin! Sed estas multe da aferoj, kiujn ni ne vidis, kaj tamen ili ekzistas... Ekzistas eĉ aferoj nevideblaj per si mem, kaj pri kiuj ĉiu kredas, por ekzemplo la inteligento."

La sakristiaj oratoroj multe klaĉas pri tiuj ateistoj, "kiuj volas kredi nur tion, kion ili vidas."

Unu el ili eĉ demandis min, ĉu mi neas la ekziston de Pekino, pretekste, ke neniam mi tien iris.

Ne necesas diri, ke neniam iu liberpensulo kontentiĝis per tiel infaneca kaj nekompleta neo.

Ke mi ne kredas pri Dio, tio estas ne nur tial, ke mi ne vidas lin.

Sed tial ke mi **ne konceptas** lin.

Tial, ke mi **ne komprenas** lin.

Estas tial, ke mi nenie trovas manifestaĵon ĉu de lia inteligento, ĉu de lia potenco, ĉu de lia amo.

Estas tial, ke ĉio okazas ekzakte, kvazaŭ la mondo estus liverita al si mem kaj regata de la solaj fortoj de la Naturo.

Cetere, ĉu ili estas pravigitaj por riproĉi al ni, kiel ili faras, ke ni obeas la superstiĉon de la "videblo", ili kiuj estas servutigitaj al superstiĉo pri la "nevideblo", certe centoble pli danĝera?

Ne lasi nin servutigi de la sola "videblo", konsentite. Eĉ malpli lasi nin frenezigi de la ĥimeroj de la "nevideblo". Streĉi niajn tutajn fortojn al la "kompreneblo".

La paroĥestro de Alès (Gard) faras al si pri Dio iom misteran bildon. Li asertas, ke Dio sin kaŝas.

"Li sin kaŝas, por ke ni havu la meriton pri la serĉado, kaj ke ni spertu mirindan ĝojon, kiam ni lin trovis (?). Cetere li ne por ĉiuj egale sin kaŝas (kia malvirtuleto !). Li sin kaŝas por tiuj, kiuj lin tentas (en tia

maniero, ke ili ne trovas lin) ; Li sin revelacias al tiuj, kiuj lin serĉas."

("**La Sonoriloj de Aleso**", okt.1932)

Sume, Dio sin revelacias nur al tiuj, kiuj volas trovi lin, al tiuj, kiuj jam antaŭe estas konvinkitaj, ke ili renkontos lin.

Dum iam mi ĉeestis spiritistan kunsidon, oni diris al mi : "Nenia fenomeno povas okazi, tial ke vi estas nekredema. Se vi havus la kredon, la tablo certe turniĝus."

Pri Dio estas same. Li sin montras nur al kredantoj, kio estas almenaŭ nenecesa. Ja al la nekredantoj, li devus aperi, por ilin konsterni kaj devigi konvertiĝi.

Plie, al tiu Dio, kiu kaŝludas por spiti kaj mistifiki la homojn, ŝajnas al mi tute manki digno...

# BATALO ĈIRKAŬ LA INFINITO

La modernaj religioj instruas, ke la esenca karakterizo de Dio estas lia **infiniteco.**

La primitivaj religioj ne rezonis - ne povis rezoni - sammaniere.

La homo prahistoria vivis en mondo tre limigita, kiu nemulte etendiĝis trans lia valo, lia arbaro, lia ĉas- aŭ fiŝkapta teritorio. Liaj Dioj tie loĝis apud li, gvatante lin per ĵaluza okulo en ĉiuj liaj entreprenoj. Ankaŭ ili ne estis infinitaj.

La unuaj Dioj estis finitaj Dioj, personaj Dioj.

Kaj la modernaj religioj, kiuj nur daŭrigas kaj pliaetendas la antikvajn religiojn, falas sub la pezo de tiu peza heredaĵo. Ili tamen provas puriĝi, plilarĝiĝi, kio kondukas ilin al plejaj malkoheroj.

Ilia Dio estas infinita - kaj li estas samtempe persona. Kio estas ne nur kontraŭdiro, sed neeblo.*

Se Dio estas infinita, li estas senlima. Li ĉion enhavas, ĉion enfermas en si.

Do la mondo estas implicita en Dio, - kaj ankaŭ ni.

El du aferoj unu : Dio estas infinita, aŭ ne estas tia ;

Se li estas infinita, estas nenio ekster li. Infinita laŭ amplekso, li ne estas ekstera al la universo, kaj identiĝas al ĝi.

Se li estas finita, li estas diferenca de la mondo, li estas de ĝi aparta. Tio kondukus al agnosko, ke la mondo estas egale finita, limigita. Dio estus je unu flanko, la Universo ĉe la alia.

En la unua kazo, Dio estas nenecesa, ĉar li estas integrita en la mondo.

En la dua kazo, li estas... nekonceptebla. Diri, ke la universo estas limigita, tio estas ja refali en la mallarĝegajn konceptojn de la malklera sovaĝulo. **Ĉar la mondo estas infinita !****

Estas sufiĉe pikante konstati, ke iam la kredantoj havas la pretendon povi solaj altiĝi ĝis la nocio pri infinito.

Ili ne ekvidas, ke tiu nocio estas negacio pri ĉia diaĵo.

Ĉu, jes aŭ ne, la mondo estas infinita?

Iuj filozofoj (tiu raso estas senkompata al nia cerbo) neis la nocion pri infinito, kaj proponis anstataŭigi ĝin per tiu de... nedifinito.

Tio egalvaloras al diro, ke la aferoj estas finitaj, limigitaj, sed aldoniĝas unu al alia. Post unu finita objekto estas alia, poste ankoraŭ alia, kaj tiel plu, ĝis infinito!

Ĉiam oni estas devigata reveni al tiu ĉi. Temas do pri simpla privorta kverelo.

Ĉu ni povas imagi iun lokon, kie la Naturo haltus? Ĉu ni povas koncepti limon al la substanco, al la vivo? Sed malantaŭ tiu limo, kion ni metos?

Ĉu la vakuon? la nenion? Tiuj ĉi vortoj ne havas signifon. Ili esprimas nur nian nescion. Kion ni kredas vakua, tio estas ankoraŭ la mondo. Kie ni supozas la nenion, tie pluas la substanco, en formo eble nepesebla, sed necesa. La spaco ne povas havi limojn. Kaj eĉ se estus limoj, ne estus eble, ke trans tiuj limoj estu...nenio!

NENIO! Terura kaj sensenca vorto... kiu povus havi nenian valoron ekster nia relativeco.

NENIO! Senenhava kaj morta esprimo, inventita de nia malforto.

Oni diros : la homa racio povas malfacile akcepti la nocion pri infinito? Tiu racio estas limigita, kiel ĝi povus altiĝi ĝis la infinito, la senlimo?

Tamen al mi ŝajnas, ke la ideo pri infinito estas pli facile konceptebla kaj akceptebla ol tiu pri finito. Ĉu ne estas absurde supozi, ke la spaco kaj la tempo estas limigitaj?

La nocio pri infinito trudiĝas al kredantoj kiel al ne kredantoj. Kaj tio en ĉiuj kampoj. La ideo pri eterneco, por ekzemplo, estas simple paŭsita sur la ideo pri senlima spaco. Eterno estas infinito en la tempo, senlima amplekso estas infinito en la spaco.

Oni bone priatentu, la ideo pri Infinito estas detrua al Dio.

Ĝi kondukas al ateismo, aŭ al panteismo.

La sofistoj provas aranĝi la aferojn dirante, kiel R.P. Henri du Passage, ke Dio, estante infinita, tamen havas ekziston konkretan kaj individuan [Revuo **Etudes** (Studoj) 5an de septembro 1929].

Estas propraĵo de individuo, ke ĝi estas limigita, t.e. finita.

Se Dio estas individua, se li estas persono, do li ne estas infinita.

Tio estas klara ; tio estas simpla, kaj necesas la tuta aplombo de Patro el la Jezuita societo por alporti tiel solenajn absurdaĵojn.***

Mi ripetas : Diri, ke Dio estas infinita (kaj kiel li ne estus tia, krom fariĝante parto de la Naturo kaj abdikante je sia potenco super la tuto de la mondo ?) tio estas logike atingi Panteismon.

Koncerne la Panteismon, ĉu ĝi ne finatingas, rapide, ateismon ?

Diri, ke Dio estas ĉie (kaj la katekismo tion instruas), tio estas en realo diri, ke li estas nenie kiel Esto aparta, distinga, persona.****

Kaj se li estas nenie, li ne ekzistas, kaj la ateistoj do pravas.

-----

* La bombasta predikisto de Notre-Dame, S-ro Pinard de la Boulaye, petegas sian Ĉiopovan per jenaj ŝvelaj kaj ridindegaj vortoj : "Vi semis mirindaĵojn tra la spacojn ; sed tio neniom kostis al Vi : Vi diris,

kaj ĉio estas farita. Pro amo al mi, efektivigu infinite pli belajn miregindaĵojn : pardonu, cedkonsentu, malaltiĝi tiom, kiom Vi povas sen malkonfesi Vian Sanktecon!"

Ĉu ne estas majeste stulte, tiu Ĉiopova kaj infinite perfekta Dio, kiun oni petas malaltiĝi? Tia hipotezo estas ja vere absurda. Ĝi tamen havas avantaĝon, ke ĝi montras, tra eksmoda frazeologio, ke la Eklezio konservas la kredon pri Dio eminente persona, kapabla paroli, agi, pardoni, cedkonsenti (?) - kaj MALALTIĜI sen malkonfesi (?) sian Sanktecon. Kvazaŭ la Sankteco de Dio povus esti malkonfesita aŭ malaltigita de kiu ajn ! Kaj miloj da gapantoj kaj snoboj aŭskultas kaj admiras tiujn plorinde stultajn predikojn...

** Ejnŝtejn diris, ke la mondo estas limigita, la kvardimensia spacotempo estas kvazaŭ fermita sur si mem. Sed temas pri nia mondo, la sola de ni konata kaj konebla. Ĉu ekster ĝi estas nenio ? Ni ne povas eliri el ĝi, sed se ni povus, ni povas imagi, ke ekstere ni trovus aliajn universojn, similajn aŭ ne, senfine ? (N. de la tr.)

*** Tial ke la urbestro de Pruillé-L'Eguillé (Sarthe) plialtigis la luprezon de la pastrodomo, la episkopo de Le Mans, Monsinjoro Grente, ekkoleris, kaj nuligis la kulton en la paroĥo : "La Sankta Sakramento estas retirita el la preĝejo, kaj la paroĥo tiel restos **sen la ĉeesto** kaj la benoj de Dio."

Do Dio estas ja **persona**, en la plej strikta senco de la vorto, ĉar li povas eliri el komunumo, kaj senigi ĝin je sia ĉeesto - pro simpla afero pri groŝoj.

Ĉu la paroĥestro de Chaillot ("**La Kruco**", 10an de junio 1882) ne diris al la paroĥanoj de sia kvartalo (unu el la plej riĉaj en Parizo : "Ne endas, ke Dio restu la plej malbone loĝanta!" Li ja deziras pligrandigi sian preĝejon, kio kostos kelkajn milionojn. "Dio ne devas havi malbonan loĝejon.!!!"Jen estas fetiĉismo tiel amuza kiel malmulte konscia !

**** "Tiu, kiu ekzistas per si mem, kaj estas en ĉio, tial ke ĉio estas en li..."

"Gango ruliĝanta, estas Dio ; la gruntanta maro, estas Li ; la blovantaj ventoj, la turniĝanta nubo, la brilanta fulmo, estas Li. Same kiel, de tuta eterneco, la mondo estis en la spirito de Bramo, same nun ĉio ekzistanta estas lia bildo." (Dio, laŭ la Vedoj). Mi ne konas pli belan panteistan difinon - kaj pli perfektan refuton de la persona Dio de la religioj.

"Dio, per la revelacio, ne instruis al ni, ke li identiĝas kun la universo, sed male, ke li estas distinga de ĝi, kiel la potisto estas distinga de la vazo, kiun li muldas, kaj la skulptisto de la statuo, kiun li tajlas". (Pastro Frémont, p.136). Jen estas io neta. Dio estas ja **ekster la mondo.** Komprenu, kiu povos.

## KIU FARIS LA MONDON ?

*Per Dio oni ĉion klarigas! deklaras la kredanto (malprave).*
*- Jes, sed... neniu klarigas Dion!*
*André Lorulot*

Adolphe Retté, freŝdate mortinta "en gracostato) estis komence revoluciana kaj kontraŭreliga. **"Prelegisto, li parolis en kafejoj kaj liberpensaj kunvenoj kontraŭ Dion kaj liajn pastrojn, en iel sama maniero kiel iu Sébastien Faure aŭ iu Lorulot"** deklaras pia Paroĥa Bulteno).

"Iun tagon, kiam precize li donis unu el tiuj prelegoj en drinkejo en Fontanbelo, kelkaj laboristoj atendis lin ĉe la elirejo.

"Retté, ili diris al li, ni ne kredas pri la instruado de de la pastroj, sed fine la mondo ekzistas- necesas ĝin klarigi : De kie ĝi venis? Kiu ĝin kreis?"

"Tiu demando tiel simpla, tiel natura, lasis Retté konfuzita. Vane li provis senkonsciiĝi, ne plu pensi. Meze de liaj promenadoj, de liaj duonfrenezaj kuradoj tra la najbara arbaro, en kiuj li prezentis al siaj okuloj la kvieton de la naturo, al sia brulvarma frunto la kareson de la ventoj, ĉiam revenis - lin pelante - la timinda demando : **"Kiu faris la mondon?"**

Sufiĉis malmulto al la ĉarma poeto, por deturni lin de la Libera Penso.

Antaŭ ol sin lasi konfuzi per tiu demando : **"Kiu faris la mondon ,"**, li devis meti alian : **"Ĉu la Mondo estis "farita", ĉu ĝi estis kreita?"**

Jen estas la problemo, kiun necesas antaŭ ĉio klarigi.

Kaj la studo pri tiu problemo nin rekondukas al la konstatoj, kiujn ni faris kelkajn paĝojn antaŭe :

Ĉu la Universo havis komencon?

Ĉu ĝi estas infinita en la tempo, t.e. eterna, aŭ ĉu ĝi estis kreita de iu, de estaĵo, kiun la kredantoj nomas Dio?

"**Kial ne akcepti, ke la vivo ĉiam ekzistis?** demandis la granda scienculo Gaston Bonnier, el la Scienca Akademio (**Le Matin**, 5an de junio 1911).

La Vivo (aŭ la Mondo, se oni preferas, ĉar la Vivo estas ĉie : **ĉio estas viva**) ne povis havi komencon ; ne povas esti subite, spontane aperinta, sen ke oni sciu kial kaj kiel.

"**Nenio perdiĝas, nenio kreiĝas" instruas la Scienco.** En neniu fenomenaro oni konas absolutan komencon. Ĉio ja necesigas kaŭzon. Kaj la efiko estas konforma al la kaŭzo, kiu ĝin produktis.

La ideo pri kreo estas absurda, ĉar en la mondo estas nur transformoj.

Ĉio ŝanĝiĝas, ĉio modifiĝas, nenio estas stabila en la naturo.

La evoluado estas esenca karaktero de la vivo.

**Nenio perdiĝas, nenio kreiĝas, ĉio transformiĝas!** Neniu kredanto iam refutos tiun aksiomon.

Nenio estas stabila, nenio estas senmova en la mondo Sed vi ja suspektas, ke la Klerikaro instruas la malon.

Oni legas en **La Kruco** (1an de novembro 1929) :

"Necesas morti, aŭdi la definitivan juĝdecidon, por eterna feliĉo aŭ malfeliĉo. Tiam ni estos **fiksitaj**, por ĉiam stabiligitaj, en la paco aŭ la konfuzo, la amo aŭ la malamo, la rekompenco aŭ la puno."

Tio estas absurda, tio estas kontraŭscienca, kaj tio estas malmorala.

La morto mem, kiu kaŭzas tiel grandan teruron en la simplaj animoj, la morto, kiu detruas la individuajn formojn, la morto estas nur unu aspekto de la vivo. La disigitaj molekuloj reiras en la universalan cirkuladon, kaj revivos en aliaj aspektoj, partoprenante en novaj kombinoj mineralaj, vegetalaj aŭ animalaj.

Dio ne kreis la Universon, pro jena simpla kialo : ke **la Universo neniam komenciĝis, kaj neniam finiĝos.**

Jen bela azenaĵo de kanoniko Duplessy ("**La ekzisto de Dio**", p.18).

"Diri, ke la eterneco de la mondo malnecesigus la

Kreinton, estus pretendi, ke horloĝo ne bezonas risorton, se nur ĝi havas nekalkuleblan nombron da dentradoj; estus pretendi, ke oni povas fari pentraĵon sen peniko, sen mano tenanta tiun penikon, se nur ĝi estas tre longa..."

Mi iom hontas refuti tion. Ne temas pri peniko, eĉ se ĝi estus centoble pli longa... ol la aspergilo de Pastro Duplessy. Mondo **eterna**, t.e. **nekreita**, ne povas esti **kreita**!! Duplessy ja tion scias, sed... li estas specialisto pri popola Apologetiko (sic). Povra popolo!

Prefere frandu jenan belan penson de la liberpensulo Matisse ("**La ruinoj de la ideo pri Dio**").

"Falsa interpreto de la principo de kaŭzeco kuŝas en la fundo de la rezonado. **Tiu principo estas aplikebla al fenomenoj, ne al esencoj. La fenomenoj havas kaŭzon, la esencoj ne : ili havas nur ekziston.** La faktoj de la Universo sinsekve sin estigas, sin transformas unuj la aliajn, sin pelas, aperas kaj malaperas : ili apartenas al la kategorioj de la formoj. La ŝtofo de la mondo (materio kaj energio) ne estas naskata de io alia, ĝi ne naskiĝas, ne malaperas. Ĝi ne apartenas al la mondo de la formoj, sed ja de la ekzistoj. Ĝi ne estas submetita al la principo de kaŭzeco."

Georges Matisse

Kiu teorio ŝajnas al vi pli racia, pli logika?

Inter jenaj du asertoj :

1. La mondo estas eterna, infinita, nekreita.
2. La mondo komenciĝis. Ĝi estas verko de antaŭekzistinta Dio - kiu estas eterna, infinita, nekreita.

Ĉu vi kuraĝos diri, ke la dua estas pli facile akceptebla de la racio? Ĉu ne la malo estas vera?

Ĉar finfine, antaŭ la kreo de la Mondo, kion faris via Dio? Per kio li okupis sian eternecon? sian Ĉiopovon?

Per **nenio**. Kiam oni estas infinite perfekta, oni bezonas nenion kaj neniun.

Sed do, kial, subite, li eksentis la deziron krei la mondon? Ĉu do subite li bezonis distron?

La kredantoj elturniĝas, dirante ke "la intencoj de Dio estas nepenetreblaj." Tio ĉion aranĝas.

------

* Nenio estas pli ridinda ol paroli pri Dio "antaŭ la kreo", t.e. antaŭ la Universo, antaŭ la Tempo, antaŭ la Spaco. Kia absurdaĵo ! Kiel koncepti Dion, ĉar estis nenio laŭ diro de la kredantoj. Nenio, do nek Eterno nek Infinito.

Sed atentu bone : estis nenio, sed estis ĉio. Ĉar Sankta Tomaso skribis : "Antaŭ ol Dio donis al si en la kreado kaj regado de la mondo okupon indan je ĉiuj liaj propraĵoj, li estis jam la infinita aktiveco."

**Infinita** aktiveco ! Oni sin demandas, kion la kreo povis aldoni al tiu infinita aktiveco !

Povra kreo ! Kaj tre povra kaj tre neutila Kreinto !

** R.P. Pinard de la Boulaye diras, ke "Dio posedas la plenon de esto kaj feliĉo, sen povi deziri satigon, kiu mankus al li, ĉar li ĉiujn superabunde posedas, de tuta eterneco." Sen longe insisti pri la rimarko, ke la ideo pri **satigo** tute ne akordas kun tiu pri dieco, mi demandas : ĉar Dio estis tiel feliĉa en sia nenio, kial li kreis la Universon ?

Aliflanke, kiam oni asertas, ke Dio estas Ĉiopova, kion signifas tio ? Ĉu li povas fari kvadratan cirklon ? Ĉu bastonon kun unu ekstremaĵo ? Ne. Do li ne estas ĉiopova.

## LA UNUA KAŬZO

Pelite en siajn lastajn redutojn, la kredantoj rifuĝas en lastega argumento, tiu de la UNUA KAŬZO.

Ili lasas al ni ĉion ceteran, evolucion, transformismon, ktp. Sed necesis unua motoro por starti la universalan movadon. Kiu donis tiun unuan impulson al la infinita materio, krom Dio, la Mastro, la Kreinto, la Inteligento?

Kion mi jam antaŭe diris, tio maltrudas min reveni al tiu punkto. Ne estis unua impulso, ĉar la vivo ĉiam ekzistis. La hipotezo pri unua motoro estas tute nenecesa, ĉar la mondo ne estas kreita.

Ĉiuj tiuj hipotezoj, cetere, nur komplikas kaj mallumigas la problemon.

Malantaŭ via unua motoro kaj lia ĉiela mekanikisto, mi povus demandi al vi, kio estis. Tiu mekanikisto, kiu faris lin? El kie li ĉerpis la elementojn de sia motoro? Ni estas kondamnitaj eterne turniĝadi en la sama cirklo de senpoveco.

La bonega Lamennais kredis elturniĝi, dirante ke Dio ne kreis la mondon el nenio (tia tamen estas la idiota tezo de la Katekismo), sed ke li prenis ĝin... **el sia propra substanco.**

Ĉu ni estas pli progresintaj per tiu nova klarigo?

Se Dio ĉerpis la mondon el sia propra substanco, tio signifas, ke li ne kreis ĝin, kaj simple efektivigis la transformon.

Ĉiam restus klarigenda... la ekzisto de Dio mem, lia naturo, lia esenco, lia substanco, lia deveno kaj lia ekzistokialo.*

Ĉiel, kiel ni turnas tiun filozofian kaprompilon, ni ĉiam venas al sama konkludo : se Dio estas infinita, li sin konfuzas kun la Mondo. Sed ĉar la Mondo necese estas infinita, Dio estas tute neutila.

La Paroĥa Bulteno, kiun mi antaŭe citis, finas sian biografion pri Retté per gajiga anekdoto :

"Konvertite, Retté eksentis intensan bezonon pri pento, pri riparo. Kun sonorilo en la mano, li trakuris la stratojn de Fontanbelo, senzorge pri la miro aŭ la sarkasmoj de liaj samcivitanoj.

"Mi estas Retté, li diris. Mi blasfemis, kaj ofendis Dion. Mi publike pardonpetas antaŭ ĉiuj, kiujn mi eble skandalis."

Mi ne scias, ĉu lia sonorilo estis fendetita, sed certe li tia estis! Fari tiajn strangetaĵojn kun la deziro esti agrabla al Dio, tio estas fari al si povran ideon pri tiu ĉi!

Kredeble por lin pligrandigi al niaj okuloj, la diistoj asertas, ke ilia Dio ne estas materia. Li estas "pura spirito".

(Cetere oni havas eĉ ne plej etan nocion pri tio, kio povas esti pura spirito. Pura spirito? Mi ofte vidis korpojn, kiuj ne havas multe da spirito ; sed mi neniam vidis unu solan vivan spiriton senkorpe agantan. Ni preterpasu.)

Kiel **pura spirito** povis krei **materian** mondon?

Nenio estas neebla al Dio, vi diros. Unu miraklo plia aŭ malplia (mi estis skribonta : unu absurdaĵon plian aŭ malplian), tio ne povus haltigi la anojn de supernaturo.

Mi ĵus skribis absurdan vorton : miraklo.

Sed la kredantoj ne havas eĉ la helpeblon, diri ke la Kreo estis "Miraklo". Ili ja diras, ke miraklo estas perforto al la naturaj leĝoj.

Nu, antaŭ la Kreo, ĉar estis nenio, la naturaj leĝoj ne ekzistis, oni do ne povis ilin perforti - konsekvence ĉia miraklo estis neebla ! La ideo mem pri miraklo, kiel ajn absurda, antaŭsupozas antaŭan ekziston de la mondo, - kaj de ĝiaj leĝoj.

-----

* Mi ne volas halti por refuti la klasikan argumenton : necesas horloĝisto por fari horloĝon, presisto por fari libron ; eĉ plie, ja necesis Kreanto por fari la mondon.

La komparo estas tute malĝusta. La horloĝisto ne kreas la horloĝon, nek la presisto la libron. Ĉiu laboristo estas transformisto de nekreita substanco. Dum Dio faris la mondon el nenio. Petu do horloĝistor., ke li fabriku horloĝon el nenio, kaj vi komprenos la absurdecon de la ideo pri kreado.

"Kreite ekde la komenco kaj antaù ĉiuj tempoj, diras Bossuet, la universo estis nur ornamita en la tempo." Alivorte, Dio ne estintus kapabla sukcesi sian verkon per unue provo. Li unue kreis, poste plifajnigis ĝin. La kredantoj ja ne havas altan ideon pri la kapablo de sia Dio.

## DEVENO DE LA HOMO

Se Dio ne faris la Mondon, evidente li ankaŭ ne faris la homon.

Ĉar la homo estas nur malgravega ero de la mondo.

Ni estas nek superaj nek eksteraj al la Naturo ; ni estas parto el ĝi, tiel ke ni konfuziĝas kun ĝi, obeas la samajn leĝojn kaj estas kuntrenataj en identa movado.

Mi sentas min tiel maljuna kiel la Universo, tiel eterna kiel ĝi! La molekuloj, el kiuj mi konsistas, estas nutrataj per senmemora forto. La fluo, kiu trakuras miajn vejnoj vibrigas miajn fingrojn aŭ febrigas mian cerbon, estas la sama fluo, kiu kunportas for la gigantajn mondojn en la spaco, aŭ kreskigas herberon sub miaj piedoj.

Profesoro Carrel faris vere kuriozan eltrovon, kiam li demonstris, antaŭ dudeko da jaroj, ke estas eble kulturi homajn histojn **ekster la organismo.**

Fragmento de nia korpo (haŭto, koro, muskolo, kc.) transplantita en speciale preparita kaj plurfoje renovigita medio, povas resti viva kaj daŭre kreski dum pli ol sesdek tagoj.

Ne dubeble oni sukcesos tenadi en vivo, en daŭra maniero, histojn el la korpo de animaloj - aŭ de homo.

Ankaŭ Jacques Loeb, sur alia kampo, meritas nian simpatian admiron. Li efektivigis la kemian fekundigon.

Prenante virgajn ovojn de ekinoj, li fekundigas ilin ne per efiko de la Sankta Spirito, sed metante ilin en kontakto kun grasacido.

La vivo ĉesas esti neklarigebla mirindaĵo, ĉar sciencculo, en sia laboratorio, povas iel anstataŭigi tiun faman vivan instinkton, kiun ni sukcesis nek difini nek kompreni!

Mia eminenta amiko Profesoro Herrera en Meksiko, egale efektivigis laborojn, kiuj meritus esti pli famigitaj.

Li ja sukcesis fabriki vivajn ĉelojn.

Per formolo, plumbacetato, kion mi scias plie (la ekzakta formulo de la miksaĵo estas tre simpla, kaj povas esti efektivigata de kiu ajn eksperimentisto), li sukcesis krei etajn gelatenajn masojn, kiuj moviĝas, agitiĝas, kaj eĉ reproduktiĝas per dissekciĝo.

Simplaj skizoj, ankoraŭ neperfektaj, konsentite. Sed tiu larva bildo de la vivo eksperimente, arte efektivigita, ĉu ĝi ne konfuzegas ĉiujn niajn malnovajn konceptojn?*

Efektive, ekzistas tri hipotezoj pri la deveno de la homo.

La unua, kiu eĉ ne valoras esti pridiskutata, konsistas el aserto, ke Dio kreis S-ron Adamo kaj S-inon Eva ilin fabrikante per siaj manoj - en ĉiuj pecoj (kaj perfektaj!)

La dua hipotezo, nun preskaŭ forlasita, estas nomata spontana generado. Ĝi deklaras, ke la vivo povis aperi spontane, en rudimenta formo, sur la surfaco de la terglobo, en certaj kondiĉoj de temperaturo kaj medio, kiujn estas al ni neeble rekonsistigi.

Fine tria hipotezo, la plej racia el ĉiuj, supozas, ke la rudimenta primitiva ĉelo, anstataŭ spontane eliĝi el senviva materio, devenis de aliaj planedoj, kaj estis transportita sur la teron pere de iu bolido. El tiuj organismoj (probable mikroskopaj) estus eliĝintaj, per progresiva evoluado, kiu necesigis milionojn da jaroj, la nun ekzistantaj animalaj formoj.

Mi diras, ke tiu ĉi hipotezo estas la plej racia, sed en realo ĝi ne necese nuligas la duan hipotezon, tiun de la spontana generado. Ja necesas, ke tiu ĉi okazis en iu tempo! Necesis, ke la unua viva ĉelo formiĝu en la sino de la "neorganika" materio! Ĉu tiu spontana generado okazis sur nia tero, ĉu sur alia globo eble situanta je miliardoj da kilometroj de nia kara eta planedo, estas samsignife.

Sed kial ni ligus tiel grandan gravecon al tiu paso de neorganiko al organiko?

Ni estas liberigitaj el la superstiĉo pri viva kaj neviva.

La unua viva ĉelo ne estas, niaopinie, la vera deirpunkto.

La lumo, la ultraviolaj radioj, la akvo de la oceanoj, la ĉielaj polvoj, la elektraj radiadoj, ĉio tio estas viva, ĉio tio estas riĉa je estonteco.

Ne estas dislimo inter la fenomenoj de la naturo. Ĉu ili ŝajnas al ni simplaj aŭ kompleksaj, ĉu rudimentaj kaj krudaj, ĉu noblaj kaj altaj, ili ĉiuj estas samesencaj. En mil diversaj aspektoj, ĉiam sin manifestas la vivo universala, infinita, nekreita.

-----

* Nun oni ne plu aùdas aù legas pri tiu eltrovo de prof. Herrera. Ĉu ĝi ne estas konfirmita, aù ĉu konspiro de silento ? (N.de la tr.)

## DIO KAJ ASTRONOMIO

Pastro Mandet antaŭnelonge skribis :
"Astronomio, pli belege ol ĉiu alia scienco, rakontas la gloron de Dio."

Kial?

Mi ne volas nei, ke astronomio estas belega scienco. Ĝi konstatigas al ni la eksterordinaran vastegon de la mondo, pliforigante ĝiajn limojn ĝis infinito, je granda konfuzego de la antikvaj kosmogonioj.

Sed pastro Mandet restis ĉe iom klasika admiro. Li forgesas, ke estas tiom da infinito en simpla akvoguto, kiom en astro, ĉu eĉ miliardoble pli dika ol nia tero.

Mi restas revema, kial ne konfesi tion, kiam oni diras al mi, ke la distanco inter la Tero kaj la Suno estas je 136 milionoj da kilometroj, kaj ke la lumo vojiras en rapido de 300 000 km en sekundo.

136 milionoj da km, estas tre proksime. La lumo de la Suno alvenas al ni en la daŭro de 8 minutoj.

Sed... estas iuj steloj, kiujn ni ekvidas, kies lumo, antaŭ ol veni al ni, devas vojaĝi dum **dekoj da milionjaroj** (kun rapido de **300 000 km en sekundo !**). Faru la kalkulon - kaj ne hezitu vicigi nulojn!

Estas aliaj steloj, kiujn ni ne povas vidi, tial ke niaj instrumentoj ne estas sufiĉe potencaj (sed kiujn vidos la morgaŭaj scienculoj, ĉar neniam haltas la progresoj de la sciencoj). Malantaŭ tiuj ĉi estas milionoj da aliaj. Kaj ankoraŭ milionoj pli fore. Kaj ankoraŭ pliaj, kaj ĉiam, ĉar la mondo estas infinita, ĉar ne estas, ĉar ne povas esti baro nek limo dupartiganta la frenezigan vastegon.

Ĉio ĉi konsternas nian inteligenton, mi konsentas. Kiel bele, kiel grande sin senti **integrita** en tia mondo!

"Nun oni identigis "Univers-insulojn" analogajn al nia Lakta Vojo : ili estas la spiralaj nebulozoj : "probable la materio en ili superas la sumon de la masoj kompaktigitaj en steloj." Oni registris du milionojn da spiraloj, kaj iuj el ili estas tiel malproksimaj de ni, ke ilia lumo venas al ni en **du milionoj da jarcentoj**.

"Nia scio pri la steloj samtempe progresis. La Lakta Vojo enhavas plurajn miliardojn da steloj. Estas almenaŭ dek mortintaj astroj kontraŭ unu brilanta. La interna temperaturo de la steloj atingas facile kvardek milionojn da gradoj.

"Oni interkonsentas pri la opinio, ke la homo ekzistas jam 300 000 jarojn* : ni povas rigardi nin kiel la dekmilan generacion de la specio. Kaj la 9990 unuaj kredis, ke la Tero estas la centro de la Universo." (Laŭ Paul Couderc : **Arkitekturo de la Universo.** Eld. Gauthier-Villars, Parizo)

La infinite granda min superegas, kaj mi komprenas, ke pastro Mandet estas imponegita fronte al la eltrovoj de astronomio. Ili montras al ni Universon ja multe pli majestan ol la ridinda biblia Jehovo, vilaĝa tiraneto, dio de foira festo, idolo de popolo tiel vaganta kiel malpurega.

Sed la infinite malgranda, S-ro pastro, estas tutsame superbela.**

Unu mikrono da akvo enhavas 228 milionojn da molekuloj.

Necesas 100 kvadrilionoj da ĉeloj por konsistigi homon.

La homa ovolo, el kiu ĉiu el ni eliĝis, ampleksas proksimume 0,25 mm. Ĝi tamen jam posedas en ĝermo ĉiujn niajn kapablojn, ĉiujn niajn kvalitojn - kaj egale ĉiujn niajn difektojn, ho ve!

Tiuj spermatozoidoj, kiujn ni tiel volonte misuzas, kaj kiuj estas nemalhaveblaj por la fekundigo de la ovoloj, ampleksas nur 55 mikronojn.

En la Naturo estas nenio malgranda, nenio granda. Tiuj vortoj havas sencon nur por ni. En rigardo de la Infinito, de la Eterno, de la Nekreito, niaj homaj esprimoj, tiel malriĉaj, perdas ĉian signifon, ĉian realan valoron.

Tre freŝdate, en la Diĵona kazino, antaŭ 1500 personoj, S-ro pastro Kir faris al mi kontraŭdiron tiel "astronomian" kiel tiu de pastro Mandet.(°)

Laŭ li la ekzisto de milionoj da astroj gravitantaj tra infinito necese subkomprenigas la ĉeeston de superega Estaĵo, de inteligenta kaj atentega Administranto. Pastro Kir ne kredas, ke la planedoj povus daŭrigi sian gravitadon, se Dio ĉesus ilin movi.

Tio estas iom stulteta.

Kio ne estas multe malpli, tio estas konservi en tiu ĉiela pentraĵo nur la belajn partojn, por pli bone glori la saĝon de la granda arkitekto de la steloj.

"Ili neniam interrenkontas, S-ro Lorulot! kriis pastro Kir kun bongustega burgonja paroltono.

Kaj kompreneble, estas la bona Dio, kiu ĉion ĉi senlace superrigardas, por eviti la koliziojn.

... Ne nur ili kolizias kaj pulvoriĝas, sed ili ankaŭ mortas, la planedoj! La suno progresive malvarmiĝadas. La tero iam fariĝos neloĝebla...

En sia tute freŝdata libro ("**En la suna kampo**") S-ro Paul Couderc elvokas tiujn "ekpluvojn de meteorŝtonoj" produktitaj de la diseriĝo de kometoj. Li parolas ankaŭ pri la falantaj steloj : "Eĉ ne kalkulante la neregulajn ekpluvojn, la Tero ricevas ĉiujare plurajn centmiliardojn da flugantaj steloj, kies reziduoj pezas eble 100 000 tunojn : maspliiĝo, kies influo al la movoj de la Tero estas neglektebla. Tiuj cindroj aŭ etetaj globetoj el metaloksidoj tapiŝas la neĝojn de la polusoj, la montojn kaj la fundon de la maroj ; oni trovas da ili en la kerno de hajleroj. Ĉar ilia malpezeco estas kompensata per grandaj rapidoj, tiuj kosmaj pafaĵoj konsistigos seriozan danĝeron por la interplaneda navigado." (p.196). Mi respekte signalas tiun danĝeron al S-ro pastro Kir.

Ni ricevas kvanton da kosmaj pafaĵoj, iafoje pezantaj dekojn da tunoj ; oni nomas ilin aerolitoj aŭ meteorŝtonoj. Ĉe Pultusk (Polio) areo de 10 kvadratkilometroj estis borita de pli ol 100 000 ŝtonoj tiel falantaj de la ĉielo.

Ĉu tiu bombardado ne ŝajnas al vi atesti kontraŭ la admira tezo de S-ro Kir?

Kaj tamen ne mankas loko tie supre!

En la Lakta Vojo, por ekzemplo, la meza obstrukco estas komparebla al tiu de kvin aŭ ses tenispilkoj dislokitaj en volumeno egala al tiu de la Tero. Do la senperaj interbatoj estas maloftegaj kataklismoj. Iom pli oftaj estas la duon-interbatoj, t.e. proksimiĝoj sufiĉaj por dinamike egalvalori elastan interbaton (**"En la suna kampo"** p.222).

Entute la rolo de la Superzorganta Dio estus facile plenumebla.

Pastro Frémont post multaj aliaj uzas kaj trouzas la astronomian argumenton : "La steloj ne ŝanĝas sian lokon... nur kelkaj moviĝas, kaj iliaj movoj estas unuformaj : oni konas ilian ĉiam saman vojon. La sep steloj de la Granda Ursino ĉiam prezentas al ni la saman pozicion. Ili radias en nefleksebla plano. La montoj de Svisio ne transportiĝas en la ebenojn de Beauce. Luaro ne laciĝas fluante en Francio, kaj ne iras ĵeti siajn akvojn en Hispanion. La Naturo estas inteligente organizita, tio estas klara." (Pastro G. Frémont **"Scienca Demonstro pri la ekzisto de Dio"** p.114).

Estas Dio, kiu puŝas tre rekte la planedojn ; estas Dio, kiu fluigas Luaron! Estas Dio, kiu subtenas la montojn!

S-ro Frémont nepre volas enŝovi ĉien la inteligenton de sia Dio. Li neniom kalkulas la fizikajn kaŭzojn, la ekvilibrojn de fortoj, la altirajn kaj forpuŝajn potencojn, kiuj regas la tutan Universon. Li preferas kredi, ke se la bona Dio endormiĝus, Luaro irus flui en la Lunon, aŭ en lian inkujon.

Ke du planedoj povus interrenkonti kaj interpulverigi, tio ŝajnas al ni terurega, nepriskribebla katastrofo. Efektive, la lumaj fontoj de la Kolonia Ekspozicio ŝajnus tre palaj en komparo kun tiuj eksplodoj de grandegaj masoj, tiuj gigantaj incendioj. Sed la du formikoj,

kiujn mi senzorge premegas, promenante? Kiu scias, ĉu tiu fakto, ŝajne sensignifa, ne havos konsiderindajn efikojn, kvankam ili restas ekster mia serĉado?

Kiam do ni ĉesos rigardi la Mondon per okuloj de antropomorfistoj?***

-----

* "La homo ekzistas jam 300 000 jarojn." La progresoj de paleontologio nun multe plilongigis la antikvecon de la homaro, ĝis almenaŭ 3 milionoj da jaroj. (N. de la tr.)

** Se necesis inventi novajn mezurunuojn por la grandaj nombroj ; se necesis krei lumjarojn, necesis ankaŭ krei mikronon (milionon da milimetro) kaj angstromon (dekmilonon da mikrono).

(°) Pastro Kir, fariĝinta kanoniko, estis poste konata kiel deputito kaj urbestro de Diĵono. (N. de la tr.)

*** Meditu tiujn versojn de Lamartine :

"Mi malŝatis la insekton kaj trovis min granda.
Kaj nun, dronante en la abismo de la esto,
Mi dubas, ĉu rigardo de Dio povus distingi min disde ĝi..."

Kaj la penson de Goethe :

"Neniam la homo scios, kiom antropomorfista li estas."

"Kio estas la belo, la vero, la bono, krom vantaj konceptoj, abstraktoj de abstraktoj ? Nu, koncepto respondas al nenio objektiva. En la Naturo estas nek bono nek malbono, nek vero nek eraro, nek belo nek malbelo. Tiuj fantomoj vizitadas nur nian spiriton ; ili forsvenos kun la lasta homo. Ni ĉiam nescias pri la ŝtofo, el kiu estas farita tiu ĉi mondo. Ni neniam scios, ĉu estas en la Universo io alia ol mekanikaĵoj. Kaj kie regas la leĝoj de mekaniko, tie ne estas Dio, ne estas animo, ne estas religio nek metafiziko." (Jules Soury)

## KIEN IRAS LA MONDO?

*Estas nur unu vivo en la Universo ; kaj vi estas tiu vivo.*
*Kriŝnamurti*

Nenien! Kien vi volus, ke ĝi iru?

Ĉar la Mondo estas infinita, kiel oni povus aldoni al ĝi aŭ depreni de ĝi ion?

Do la demando estas infaneca.

"Post cent miliardoj da jarcentoj, skribis Maeterlinck, la situacio estos sama kia hodiaŭ, sama kia ĝi estis antaŭ cent miliardoj da jarcentoj, sama kia ĝi estis de post komenco, kiu cetere ne ekzistas, sama kia ĝi estos ĝis fino, kiu ankaŭ ne ekzistos."

Kaj eĉ se estus iu Dio, li povus en tio nenion ŝanĝi.

La Mondo ekzistas kaj ekzistos. Ĝi estis, estas kaj estos...

Tio ne signifas, ke la Mondo estas fiksa kaj ŝtonigita. Ni scias, male, ke ĝi estas skuadata de daŭraj kirloj, ĉar ĝi estas viva. Tial ĉio moviĝas, ĉio ŝanĝiĝas kaj transformiĝas.

Maeterlinck aldonas :

"En la Universo ĉio estas necese entenata, kaj nenio povas, en la tempo aŭ en la spaco, troviĝi ekster ĝiaj limoj, ĉar ne povas esti limoj."

Do, ne estas loko por Dio, nenie!

Oni konfesu, ke estas tre facile respondi al la "vitalaj" demandoj metitaj de la tenebra Bergson.

**De kie ni venas?** De Dio, asertas la kredantoj. De la universo, ni diras.

**Kio ni estas?** Ĉu verko de Dio? Ne : parto el la evoluanta Mondo.

**Kien ni iras?** Ĉu al la juĝo de Dio? Kia farso! Ni reiros tien, de kie ni venis : al la eterna cirkulado de la universala vivo.

Komparu la du kategoriojn de respondoj, kaj diru al mi sincere, ĉe kiu flanko troviĝas la logiko kaj la klaro?

## LA NATURAJ LEĜOJ

*Herezulo pro amo, ateisto pro tro da kredo. Prefere nei ol profani tion, kion oni amas.*

*Petro Paraf*
*("**Kiam Izraelo amis**")*

Tamen, diros la obstinuloj, la Mondo obeas al leĝoj. Estus sensence kredi, ke ĉio funkcias hazarde, blinde. La materialistoj mem parolas pri "neŝanĝeblaj leĝoj regantaj la iradon de la Universo."

Nu, se estas **Leĝoj**, ja necesis **Leĝdonanto**!

Ridinda eraro, kiu konsistas el konfuzo inter naturaj kaj homaj leĝoj.

La natura leĝo (aŭ pliĝuste : la scienca leĝo) limiĝas je konstato, ke la faktoj okazas tiel aŭ tiel ĉi, en iu donita cirkonstanco - kaj ĉiam same, ĉiufoje kiam estas efektive realigitaj identaj cirkonstancoj.

La homa leĝo estas verko de Parlamento, de Tribunalo aŭ de Reĝo, ĝi estas regulo trudata al la individuoj.

La homa leĝo intervenas en la aktiveco de la homaj estaĵoj por direkti ĝin laŭ iu aŭ alia senco. Dum la natura leĝo ne influas al la produktado de fenomenoj, ĝi limiĝas je ilia registrado.

La scienca leĝo konstatas. La homa leĝo ordonas, reglamentas, disciplinigas.

Estas bedaŭrinde, ke sama vorto povas signi du tiel malsamajn aferojn. Tio kondukas la malklerulojn (aŭ la mistikulojn) al kredo, ke ekzistas formalaj leĝoj, speciale kombinitaj por devigi la Universalan Vivon okazadi laŭ antaŭdifinita ritmo.

La Mondo ne obeas al direktanta Inteligento. Ĝi estas prilaborata de fortoj, kiuj agas kaj reagas unuj al aliaj, kreante aŭ detruante tion, kion ni nomas ekvilibro aŭ harmonio, - pompaj esprimoj... kiuj havas signifon kaj valoron nur por niaj homaj cerboj.

Poeto admiras la universalan ordon. Li iafoje prikantas ĝin en tre lirika maniero... kaj per sama okazo li kantas Dion.

Li forgesas, ke la ekvilibro, relativa kaj nestabila, de la mondo, efektiviĝas nur per la forto - kaj la sufero.

**Determinismo!**

Ĉio estas determinita, ĉio estas kondiĉita, ne de "leĝoj", sed de "fortoj".

La Mondo estas tia, kia ĝi estas. Ĝi ne povus esti alia.

La flategantoj de Dio, por lin flati kaj glori, uzas plej bombastajn epitetojn.

Ili nomis lin : la fulmanto! la flamanto! la blindiga!

Cetere Dio (**Deus**) signifas : la brilega.

Senkonscia rememoro pri la iamaj sunaj kultoj. La religioj volonte envolviĝas en lumo. La frunto de la sanktuloj estas kronita per ardaj radioj. La pastro metas sur sian dorson mesveston ornamitan per bela brodita suno.

La Biblio instruas, ke Moseo ne povis fronte rigardi Dion, pro timo esti blindigita. La religianoj ĉiam kredis, ke Tie Supre regas plej puraj kaj vivaj heloj.

Nu, se ne ekzistus la atmosfero,* la aspekto de la tero kaj de la ĉielo estus malluma. La suno estus nur punkto apenaŭ brila en la spaco. Probable la ĉielaj spacoj ne nur ne estas magie lumigataj, sed estas mergitaj en plej nigraj tenebroj.

Ankoraŭ unu iluzio, kiun ni devas forlasi!

----

* Ja la atmosfero, difuzante la sunradiojn, iluminas nian Teron.

## BALBUTAĈOJ DE GENIO!

Malagrabla aventuro trafis S-ron Le Roy, profesoron ĉe la Kolegio de Francio. Aŭtenta katoliko, li eksentis la bezonon igi la problemon pri Dio atingebla de komprenpovo. Li do skribis libron, kvazaŭ ne sufiĉus la Katekismo!

Tiu libro ne plezurigis la klerikajn aŭtoritatojn. En siaj klopodoj por igi Dion proksimume komprenebla, S-ro Le Roy skuegis la klasikan... kaj dogman koncepton.

"Dio estas superega fonto de universala ekzisto. Ne esto, se oni volas paroli en tuta rigoro, sed neesprimebla principo de esto. Li estas menciinde la fonto, el kiu ni ĉerpas nian propran realon ; li estas en ni realiganta inspiro." (**"La problemo pri Dio"**)

Dio ne estis plu Esto : li estis forlokita en la rango de neesprimebla principo de Esto...

La teologiistoj ne povis toleri tian skandalon, kaj la neesprimebla teorio de S-ro Le Roy estis de ili senkompate kondamnita. La legado de tiu danĝerega libro estis formale malpermesita, kaj S-ro Le Roy estis metita en la Indekson. Tio instruos lin pri la intenco rezoni!

Li juĝu sin feliĉa, tiu brava filozofo, ke li ne vivas en la tempo de Vanini, de Dolet, de Giordano Bruno*...

Alia specimeno pri balbutaĉo, liverita de la **"Tribuno de Ĝenevo"**. Per ĝia legado oni povas konstati, ke la protestantoj estas tiel kapablaj kiel la katolikoj en la arto misrezoni.

"Oni jam demonstris, ke ateista kredkonfeso estas maniero agnoski, ke Dio ekzistas, ĉar, rifuzante akcepti, ke li ekzistas, oni rekonas, ke li povus esti, kaj ekde kiam eblus, ke li estas, la homo ne povas prezenti ian pruvan aserton, ke li ne estas. Aliflanke, se oni konsentas, ke Dio estas, kaj se oni kritikas lian manieron regi la Universon, oni rekonas, ke ekzistas iu eterna Ĉiopovo, al kiu la senpoveco, enkarnigita por fuĝa daŭro, kiu ni estas, pretendas kontesti la moralan valoron de liaj or-

donoj. Tio estas plorinde stulta."

Diri, ke ateismo estas maniero agnoski la ekziston de Dio, egalvaloras aserton, ke diismo estus maniero agnoski ateismon. En alia diro, blanko estas nigro, nigro estas blanko, la vortoj havas nenian sencon, kaj la ideoj nenian valoron.

La aŭtoro ja pravas. Tio estas plorinde stulta. Li ne kredis tiel bone diri.

Kiom mi preferas la deklaron de Charles Moureu, granda kemiisto kaj granda kredanto, kiam li diras :

"Vi ĵus ekvidis Dion, sed post kiam vi elŝteliĝis el la kampo alirebla de la scienca esplorado, en kiu regas la inteligento ; vi alvenas en la kampo de la sento, vi estas ĉe la sojlo de la Religio : la pozitiva scienco restas malproksime post vi."

Por veni al Dio, necesas iri kontraŭdirekte al la Scienco kaj al la Inteligento. Jen estas utile notinda konfeso!

Por veni al Dio, necesas eniri en la kampon de la Sento, diras al ni S-ro Moureu. Ja certe!

Plej ridige, la plimultaj katolikaj gazetoj reproduktis tiun frazon kun admiro - kaj kun stulteco. Ne ekvidante, ke ĝi rifuzas al Diismo ĉian racian fundamenton kaj ĉian pozitivan valoron, por fari el ĝi konfuzan aspiron mistikan kaj sentimentan.

Kaj S-ro Maurice Barrès? Kun ĉarma mentonmovo** li suspiras : "La homo, sola en la Universo, petas pri Dio ; li postulas Dion. Tiu postulo, kia miregindo! La Naturo nenion respondas. Tiu silento estas alia miregindo..." (**"Intimaj Kajeroj"**) Barrès, koncerne miregindojn, ja ne estis postulema!

La sekvo estas eĉ pli kapturna : "Super la Naturo estas Dio, kiu, iam, sendis al ni sian Filon por diri al ni : "Mi estas tie". Vi petis informojn pri Dio, jen estas ili : Li loĝas "super la Naturo". Do la Naturo kunhavas superon (kaj kredeble ankaŭ malsuperon, kiel instruis la kosmogonio de la kaldeaj paŝtistoj).

Kaj Dio sendis sian filon, por ke li estu mortigita anstataŭ li. (Barrès faris samon, kio estas neniel heroeca)***

Ni finu per Sankta Tomaso de Akvino, la anĝela doktoro.

Li multe parolis pri Dio. Por klarigi, ke Dio estas neklarigebla.

Grava parto de lia **Sumo** estas dediĉita al kredo pri Dio. Sed li zorge indikas : tiu kredo elkaptiĝas el la racio.

Ĉar la Racio estas senpova, feliĉe restas al ni... la Kredo. Mi nenion inventas : "Ja certe, la homo ne devas provi ekkoni per sia racio la aferojn, kiuj superas tiun racion ; sed tiuj aferoj, revelaciitaj de Dio, devas esti ricevataj per la Kredo."****

La homo ne devas provi ekkoni Dion per la vojoj de la Racio. Li devas kredi, kun fermitaj okuloj, pri... la Revelacio.

T.e. pri la historioj de Moseo kaj Abrahamo, la trapaso de la Ruĝa Maro kun sekaj piedoj, la heroaĵoj de la filinoj de Lot kaj la revivigo de Lazaro - se ne paroli pri la multobligado de la bulkoj far Jesuo, kaj multe da aliaj miregindaĵoj. En lasta juĝo, estas ĉio, kion oni proponas al ni : kolekto da legendaj kaj strangegaj fabeloj.

Ĉu tio ŝajnas al vi sufiĉa, kara leganto?

-----

* Cetere S-ro Le Roy respekteme submetiĝis al la Eklezio, kaj li senhezite malkonfesis sian propran penson, tuj kiam oni tion ordonis al li. Ne multe fiera, tiu filozofo !

** kaj *** . Aludoj al fama anekdoto. En 1914, la unuan tagon de la milito, la granda verkisto kaj akademiano Maurice Barrès renkontis sian kolegon Lavedan, kiu rakontis en ĵurnalo : "Li diris al mi, kun beleta mentonmovo : mi volontuliĝas." Sed li ne volontuliĝis, kaj li trankvile pasigis la kvarjaran grandan militon en Parizo, kiel multaj similaj patriotoj, kiuj instigis aliajn iri morti sur la batalkampoj.

N.de la tr.

**** Paskalo diris proksimume la samon : "Ni parolu laŭ la naturaj lumoj. Se ekzistas Dio, li estas infinite nekomprenebla, ĉar, havante nek partojn nek limojn, li povas havi nenian rilaton kun ni : do ni estas nekapablaj scii, kio li estas nek ĉu li estas. Ĉar tiel estas, kiu aŭdacos entrepreni solvon de tiu demando ? ("**Pensoj**")

## "DIO PAROLANTA...KAJ LABORANTA"

*Feliĉa, kiu lin konas.*
*Pli feliĉa, kiu lin ne konas.*
*André Lorulot*

Ĝis nun mi pridiskutis precipe la principon, la ideon pri Dio.

Endas nun, pli facila tasko, senmaskigi la ekspluatistojn de Dio, refuti iliajn sofismojn, renversi la krudan Idolon, kiu servas al ili por teruri la simplulojn.

Sinjoroj katolikoj ne embarasiĝas per filozofio. Ilia Dio estas tiel palpebla, tiel feliĉa, kiel tiuj de la Zuluoj aŭ de la Botokudoj.

Ili ne volas konfuzan Dion, diluitan en Panteismo. Neesprimeblan kaj senvertebran Dion, kiel tiu de S-ro Le Roy. Al ili necesas Dio el karno kaj ostoj, Dio barbhava kaj grumblanta (kiel tiu de la Biblio), granda bonhomo, kiu konstante koleras, kiu minacas kaj insultas la malfortajn kreaĵojn de Li fabrikitajn, kaj preparas por ili plej kruelajn torturojn.

S-ro Pastro Merklen starigas en **"La Kruco"** (11an de julio 1931) "Programon de pensado kaj agado por la junaj katolikoj de Francio". Povra juneco! Se ĝi englutos tian programon, mi ĝin kompatos... Jen estas la aspiroj, kiujn pastro Merklen supozas al tiu inteligenta junularo :

"Ne plu miton ĝi serĉas : ja Dio necesas al ĝi.

"Sed ĉi-foje vera Dio, fine kapabla anstataŭi tiom da idoloj.

"Dio ne plu muta, sed parolanta ; pri kiu oni sciu, kiu estas lia nomo, por ke oni povu iri al li en okazo de bezono.

"Dio, kiu ne estu ideo, sed iu, al kiu oni povu fidi. Dio, kun kiu oni persone havu aferon, kaj kiu povu sin ŝarĝi per ies vivo.

"Dio, kiu volu de ni ion precizan.

"Dio, kiu havu laboron por fari, kaj kiu dungu nin en sia afero.

"Dio forta, Dio potenca, Dio mastro de la mondo,

kiun oni sciu miloble kapabla transturni ĉion ĉi.
"Dio, kiu estu ĉefo, kiin ni aŭdu kaj sekvu."

Kun la Dio de "**La Kruco**" oni ne trafas meningiton. Li estas atingebla al ĉiuj cerboj. Ciu lin ekkaptos, unue la pordisto de la stratangulo kaj la fronta spicisto.

Dio laboranta kaj kuspanta siajn manikojn. Dio muskolforta, kapabla "transturni ĉion ĉi". Dio parolanta, al kiu oni povu senpere sin turni.

Sankta pastro Merklen, ci! Necesas ja, ke ci malŝatu la malgrandajn JOC'anojn*, por ke ci instruu al ili ciajn azenaĵojn!

-----

* JOC'anoj : membroj de JOC, Jeunesse ouvrière chrétienne (Kristana laborista junularo). (N.de la tr.)

## LA MONDO ESTAS DIFEKTA

Nu, tiu Dio ege persona, tiu Dio, kiu scias "kiu estas lia nomo", tiu rigora ĉefo, tiel potenca kiel vulgara, ni amuziĝu lin iom senŝeligante.

Unue, li maltrafis sian verkon.

La mondo estas difekta.

Por tion aserti, mi evidente ne situigas min el universala vidpunkto.

En la Naturo estas nek bono nek malbono, nek perfekto nek malperfekto. Tiuj ĉi konceptoj estis imagitaj de la homo. Ekster li ili havas nenian valoron. Tio ĉi estu bone komprenita, unu fojon por ĉiam : kiam ni parolas pri bono, belo, vero - aŭ pri malbono, malbelo, malvero - estos ĉiam rilate al la homo.

Oni invitas nin admiri la Mondon, tiun mirindon el la mirindaĵoj, verkon de la plej superega el la verkistoj.

Ni ne forgesu, ke tiu Mondo estis speciale kreita por ni. Konsekvence ni staras en taŭga loko por koni kaj taksi ĝian malbonfaron kaj ĝian difektecon.

"**Mi servas**", malgranda klerikala gazeto tutplene amuza) volonte citas penson, kiun ĝi atribuas al Neŭtono : "Vi juĝas, ke mi havas inteligentan animon, tial ke vi ekvidas ordon en miaj paroloj ; juĝu, vidante la ordon de tiu ĉi mondo, ke estas suverene inteligenta animo."

Voli pruvi Dion surbaze de la ordo en la Mondo, estas iri fronten al bruldolora elreviĝo.

Kiel facile estus inversigi la rezonon de Neŭtono, kaj diri : "La Naturo estas blinda ; en ĝi ni malkovras nek ordon, nek belon nek juston, kaj konsekvence mi formale kontestas, ke tiu ĉi Mondo estas verko de pretendata Dio el amo!"

Mi vidas nur plagojn, ĉiajn katastrofojn, inundojn, tertremojn, vulkanajn erupciojn, ŝtormojn... Ne parolante pri plej doloraj malsanoj, kiuj premegas la malfortulon kaj la senkulpulon...

Kompreneble, mi tie ĉi situas strikte el homa vidpunkto.

Kiam mi priploras kataklismon, kiu forbalaas milojn da homoj, mi ne pretendas, ke la loĝantoj sur Siriuso aŭ Marso devas esti de ĝi kortuŝitaj. En la tuto de la infinita Universo certe niaj mizeroj ne estas tre gravaj. Sed temas ja pri ni... De ni oni petas, ke ni danku Dion, ke ni gloru lian bonkorecon, kaj admiru la bonfarojn, per kiuj li preme superŝutas nin.

Do la argumento de Sankta Aŭgusteno ne estas akceptebla, kiam li asertas, ke "kio vundas sur unu punkto, informita homo pri tio konscias, tio vundas nur tial, ke oni ne ekvidas la tuton, kun kio ĝi tiel admirinde harmonias..."

Ĉu mia propra sufero povas akordiĝi kun la admirinda harmonio de la Mondo? Jes, se la Mondo estas blinda, kiel mi pretendas, kaj obeas nur al fortoj. Ne, se ekzistas inteligenta Mastro, kun dika tute sanganta koro.

"La Mondon regas la saĝo de Dio!" diris Linneo. Ĝi regas ĝin malbone, sinjoro, tre malbone!

**Senlimaj kiel li, liaj perfektaj verkoj**
**Naskiĝe benas la manon, kiu ilin faris!**
**(Lamartine)**

Ke la tigro dankas Dion, ĉar li donis al li solidajn dentojn, konsentite. Sed la ŝafido, la gazelo? Ĉu ili gloras la Tre-Altan, ke li memvole fabrikis ilin, por ke ili servu kiel voraĵo al rabaj karnomanĝantoj?*

La mondo estas abomena areno, sur kiu konstante fluas sango. Ĉie kaj senĉese la malfortulo estas subpremata, disŝirata, vorata de la fortulo. En la vastega kirlo de la universala vivo estas nek belo nek justo. Doloro, terurego, krimo!

"La belo de la Tero, diris Sankta Aŭgusteno, estas kvazaŭ voĉo de la muta tero. Ci ĝin konsideras, kaj ci vidas ĝian belegon, ci vidas ĝian fekundon, ci vidas ĝiajn fortojn, kiel ĝi formas semojn, kaj kiel ofte ĝi produktas

eĉ tion, kio ne estas semita ; ci vidas, kaj per la kontemplado ci ŝajnas pridemandi ĝin, kaj la serĉado mem estas demando. Kiam ci serĉis kun admiro kaj ekzamenis, kiam ci eltrovis grandan potencon, kaj grandan belon kaj mirindan perfekton, tuj ekvenas en cia menso, ke ĉio ĉi ekzistas ne per si mem, sed per Kreinto. Kaj kion ci trovis, tio estas voko al laŭdo, por ke ci gloru la Kreinton..."

Se Dio vere estus kreinta la Mondon kun la intenco esti glorota (stranga malforto de li!) li estus evitinta fuŝi sian verkon.

Kiom da fortoj senutile foruzitaj (se nur tiu, kiu estas liverata de la maraj ondoj), kiom da vantaj perdoj en la Naturo!

Itala senatano ekhavis grandan ideon. Li proponis fondi, sub aŭspicioj de la Societo de Nacioj, mutualan internacian kason por asekuro **kontraŭ la Plagojn.**

El la vidpunkto de homa solidaro, la ideo estas belega, kaj esperinde ĝi iam celatingos (kaj tiu mono estus pli utile investita ol en la fabrikado de sufokaj gasoj, ĉar la homo estas tiom stulte detruanta kiom sia Dio)**

Sed tiu neceso grupigi ĉiujn homojn en luktado **kontraŭ la plagojn** estas, en bona logiko, neado de Dio kaj precipe de lia boneco.

Tio egalvaloras proklamon, ke oni ĉesis fidi al la Providenco - kaj ke la homaro estas decidinta sin elturni tute sola en fuŝita mondo.

La "**Katolika Dokumentado**" (20an de junio 1931) reliefigas studon de S-ro Henri Bon, en kiu estas dirite :

"La scienco ebligas al ni koncepti mondon, en kiu la mikroboj ne estis infektaj, en kiu ĉiuj kreitaĵoj estis sanaj, kie estis en ili nenio kontaĝa kaj mortiga, kaj en kiun malsano kaj morto eniris pro malobservado de la reguloj donitaj de Dio al ties kreitaĵoj."

Dio estis kreinta la mikrobojn nedanĝeraj. Tion vi ne estus eltrovinta, amiko leganto?

La mikrobo de ĥolero malutilis al neniu, nek tiu de la tuberkulozo, de la pesto aŭ de la sifiliso.

Sed tiam, per kio ili vivis? Por ekzemplo, la sifilisa treponemo, kiu povas vivi nur en la homa sango, kiel li sin nutris?

Tamen Dio scias ĉion, Dio antaŭvidas ĉion. Li ne povis nescii, ke liaj nedanĝeraj mikroboj iam fariĝos timegindaj mortigantoj. Li tamen kreis ilin! li estis malpli bona ol S-ro Bon (Henri).

-----

* Kiel bela estas mansako el lacerta haùto, ĉu ne, Sinjorino ? Nu, ĉu vi scias la konsekvencon de tiu modo al la popoloj de Bengalio ? Bonvolu min aùskulti :

La lacertoj monitor, kies haùto iras ĉe la ledaĵiston, sin nutras per insektoj, sed ankaù per ovoj de serpentoj kaj serpentidoj.

Tiuj serpentoj estas venenaj. Ĉar la lacerto malplimultiĝas, la serpentoj plimultiĝas, kaj sekve la morto de indiĝenoj.

"Ĉio sin kuntenas en la naturo ekvilibrigata de la superega saĝo de Dio" (**"Le Pélerin"**, La Pilgrimanto, 18an de aùgusto 1920).

"La Pilgrimanto" ne estas malfacile kontentigebla. Ĉu ĝia Bona Dio ne estus plibone farinta... ne kreante la serpentojn ?

## LA "DIA JUSTO"

*Se Dio estas respondeca pri la ekzisto de la homo, Dio estas, pro sama motivo, respondeca pri la agoj de la homo.*

*Robert Blatchford*

Paroli pri Dia justo, tio estas absurdaĉo.

Justo estas... homa koncepto, cetere tre relativa kaj konfuza.

Pastro Crampon, kanoniko en Amiens, en verketo pri "La Dia Korpardono", skribis : "Ĉu estas maljusto en Dio? Tute ne! Ĉar li diris al Moseo : "Mi **pardonos** al kiu mi volas korpardoni, kaj mi kompatos al tiuj, al kiuj mi volas kompati." Tio ja ne estas justo, sed fantazio. Justo konsistas el dono al ĉiu de tio, kio estas al li ŝuldita - kaj ne de tio, kion plaĉas al ni doni al li.

La paroĥestro de Saint-Etienne du Grès, klarigante al siaj paroĥanoj, el kio konsistas la "**Rogations**" (publikaj preĝoj kaj ceremonioj por beni la kampojn kaj la brutarojn), skribis : "La "Rogations" estas solenaj preĝoj farataj laŭ ordono de la Klerikaro, por ricevi de Dio la pardonon pri niaj kulpoj kaj la spiritajn kaj materiajn havaĵojn, kiuj estas al ni utilaj. Tiuj petegoj nin kunigas kun la preĝado de la Kristo, de la Bona Virgino Maria kaj de ĉiuj sanktuloj. Ili certe estas efikaj, ĉar Dio aŭdas ĉiujn niajn preĝojn, sed li rezervas al si ilin plenumi kiam kaj kiel li volas. Ni do lasu al li la elekton kaj la tempon de liaj donoj!"

Tiu teorio estas oportuna por Sinjoroj Paroĥestroj, ĝi ebligas, ke ili sin ŝirmu kontraŭ plendprotestoj de sia klientaro.

Kion vi volas? La Mastro faras, kion li volas, kaj kiam li volas. Se li vin suferigas, estas tial, ke li amas vin. Aŭ eble tial, ke vi ne sufiĉe preĝis, ne sufiĉe pagis...

Frandu jenan citaĵon de R.P. (jezuita) Lucien Roure:

"**Vidit Deus quod est bonum**" (Dio vidis, ke tio estas bona) estas dirite en la Genezo. Kio faras la aferojn

bonaj, tio estas, ke ili respondas al la penso de Dio. Estas tial, ke ili manifestas la perfektaĵojn de Dio. Oni povas diri, ke sin mem amas Dio tra tiuj aferoj, kiel sin mem amas la artisto en sia "kreaĵo". Se la amo de Dio trairas la aferojn sen fiksiĝi en ili, la amo de Dio ne estas malpli altvalora por ili, kaj ili ne malpli devas omaĝi al li pro lia amo. Ĉar ilia indeco konsistas el tio, ke ili estas trairataj de la amo de Dio, kaj ili estas tiaj laŭ la mezuro de sia perfekteco.

"Estas ĉiam io el si mem, kion Dio amas en siaj kreitaĵoj.

"Ni supozu (neeble) iun estaĵon venintan al ekzisto ekster ĉia interhelpo de Dio : ĝi havus nenian meriton por esti amata de Dio. Fremda al Dio, ĝi estus al Dio indiferenta."

(**Studoj**, 5an de marto 1928)

Kion vi opinias pri tiu babilaĉo?

Ke Dio estas kontenta de sia verko, tio estas tute senbaza hipotezo. Tio pruvus, ke li estas facile kontentigebla, kvankam li estas perfekta (kio devus ŝirmi lin kontraŭ tiel ridinda vanteco).

Ĉiuj kreitaĵoj estas **trairataj** (jes, fraŭlino) **de lia amo.** Ĉu ankaŭ la cimo? la pediko? Kiam naŭzega blato aŭ malbelega araneo plonĝas en mian teleron, mi devus beni Dion en la persono de tiuj bravaj insektoj, kiujn li ne nur kreis, sed "trairis per sia amo", kaj kiujn li sendube profunde amas, kiel ĉiujn siajn verkojn.

La lasta frazo estas eĉ pli komika. Estaĵo fremda al Dio havus nenian meriton por esti amata de Dio! Kian malaltecon de animo kaj koro vi atribuas al via Dio... Li estus tiom malnobla, tiom egoista, tiom kruela kiom iuj nekonsciaj homoj, kiuj iafoje rifuzas etendi la manon al "infanoj de aliaj".

## LA "BONKORECO" DE DIO

Dio povus preterlasi esti justa, se li estus bona. Estus eĉ multe pli bone.

Bedaŭrinde li estas nek justa nek bona.

Li ne estas bona, ĉar li punas. Ni memoru pri la humoraĵo de la kuraĝa Hyacinthe Loyson (majstro en teologio, kiu fine perdis la kredon) : "Dio estas la sola patro, kiu bruligas siajn infanojn."

Tiu simpla detalo sufiĉas por lin juĝi.

Patro Pinard asertas, ke Dio estas "oceano de boneco". (En ĝi oni facile dronas).

Poste li rezonaĉas pri la respondecoj de la Eterna Patro :

Iuj el niaj suferoj estas kaŭzitaj de Dio, li konfesas. Sed ne la plimultaj, tute male.

"Al Dio imputu nur tiujn plorojn, kies kaŭzo li vere estas : tiu maro (el larmoj) troviĝos tri-kvarone sekigita."

("**La boneco de Dio**", p.49)

Ke la oceano de boneco verŝiĝas en maron el larmoj, jen io miriga. Kaj ne tre agrabla.

La kalkulo de Patro Pinard de la Boulaye estas sufiĉe arbitra. Dio estus respondeca pri niaj mizeroj nur en la proporcio de 25 procentoj. Lia boneco jam ne estas "infinita".

Estus en Dio 75 procentoj da bono kaj 25 procentoj da kruelo.

Nu, kruelo estas difekto.

Se Dio estas difekta, li ne estas perfekta.

Kaj se li ne estas perfekta, li ne estas Dio.

Ni iru pli funden. Dio estas centprocente kulpa.

Li estas respondeca pri la tuta ekzistanta malbono.

Li povus malebligi la suferon, ĉar li estas ĉiopova. Li tion ne faras, dum li sola povus tion fari. Do li estas la kulpulo, - la sola kulpulo. La konfuzaj homilioj de P. Pinard de la Boulaye restos senpovaj kontraŭ tiu

argumento.

La subtila Jezuito alvokos la "Liberon" de la homo. Dio volis, ke la homo estu libera, ja sciante, ke li eraros, kaj falos en pekon. Kaj tio, tute simple, por havi poste la sadisman plezuron frapi kaj puni lin, kun kia kruelego!

Ĉu la homo estas vere libera? Ne!

Li estas produkto de sia heredo, de sia edukado, de sia medio. Li estas superata de siaj instinktoj, kaj submetita al mil eksteraj influoj, pli fortaj ol lia volo.*

Ekde la naskiĝo li kunportas en si pereigajn emojn, pri kiuj li estas neniel kulpa. Ĉiutage ni konstatas la malbonfarojn de degenerado, rezulto de blinda, senpripensa naskigado (pri kiu la Klerikaro estas varma aprobanto, pro profitemo!)

Aliflanke la socio, bazita sur tiraneco, konkurenco, ekspluatado, kontraŭas la ekfloron de altruismaj emoj. Ĝi kuntrenas ĉiujn siajn anojn en senkompata lukto por ekzisto.

Ne, la homo ne estas libera - aŭ nur tre malmulte.

Por plibonigi la individuon, necesus renovigi kaj liberigi la socion.

Koncerne Dion, laŭ kiu rajto li postulus de ni pravigojn? Povante fari nin virtaj kaj bonaj, li permesis, ke ni estu pekuloj. Li favordonis al ni tre malfortan volkapablon, kaj li cerbume penadis ĉirkaŭi nin per kaptiloj kaj tentoj, antaŭsciante, ke ni estos truditaj falŝanceliĝi. Ne nomu tion "esto de boneco".

Devotulino, kredante mistifiki min, iam diris al mi : "Ne Dio tentas vin ; ja la Diablo!" Estas eble, ke Satano puŝas nin en kaptilon ĉiufoje, kiam li povas. Ne mankas aŭdaco al li, la Tenebrulo, ĉar li aŭdacis provoki Jesuon mem, kaj proponi al li la mondon (kia stulteco!).

Al tiuj, kiuj akuzas nur Satanon, mi rebatos, citante la sanktan "**Krucon**" (7an de junio 1921) : "Ke Satano havas la povon fari malbonon, estas **tial, ke Dio tion permesis al li**".

Tio estas evidento mem, ĉar Dio estas ĉiopova.
Do ne kontraŭ Luciferon ni devas ribeli, sed kontraŭ lia mastro, la abomeninda Eterna Patro.

Estas dirite en la libro de Ijob : "Dio ŝanĝas la koron de la princoj, kiuj estas instalitaj super la popoloj de la tero : li trompas ilin, kaj marŝigas ilin laŭ eraraj vojoj." (XII, 24, 25)
Laŭ Sankta Paŭlo : "Al tiuj, kiuj ne ricevis kaj amis la veron, Dio sendos efikecon de eraro, kiu kredigos ilin pri mensogo." (II, Thess II. 11, 12)
Tio rememorigas la vorton de la milda Jesuo, konfesanta, ke li parolis per paraboloj, por malhelpi la homojn kompreni - kaj por ke ili estu punitaj!
Ĉu la kredanto, kiam li preĝas sian Dion, ne petas, ke li **ne enkonduku lin en tenton?**
Kia makiavelismo de li! Ĉiopova, li amuziĝas puŝante nin al malbono...
Eĉ plibone, li malhelpas, ke ni nin savu.
Ja, se la konvertiĝo estas neebla, krom se oni ricevas ĝin per favordono, kia kulpo estas en nekonvertiĝo? "Kia kulpo?" rebatas Sankta Tomaso : "La kulpo, kiu malebligas la donon. Ĉar la kaŭzo de tiu retenita dono estas tutplena en tiu, kiu ne ricevis ĝin. Ankaŭe, neniu povas vidi la taglumon, se la Suno ne lumas. Sed, eĉ se la Suno brilas, ĝin ne vidas tiu, kiu fermas la okulojn. Tiel, nur la peko, la peko de la fermitaj okuloj, estas obstaklo al la donoj de Dio."
Miaj okuloj estas obstine fermitaj. Kiu kulpas? Se Dio volus ilin malfermi, estus al li tre facile. Ĉiuj ĉi argumentoj, en fino, nur plifortigas nian argumentadon kontraŭ la malkoherecan ĥimeron ekspluatatan de la pastroj.

-----

* La ĵusnaskito venas en la mondon kun pasinteco de amplekso kaj komplekseco, kiuj spitas ĉian analizon... pasinton, kiun preskaŭ sen troigo oni povus kvalifiki infinita.

** "Satan tre dezirus daŭrigi la laboron tiel bone komencitan en la Tera Paradizo. Tio estus senkuraĝiga (ni estas jam tiel malfortaj !), se ni ne estus certaj, ke Dio gvatas la malamikon, kaj lin trudas. Liaj atakoj kaj liaj ruzoj ne iras trans la limon fiksitan de la Korpardono aŭ la Justo." (Monsinjoro D. Roland-Gosselin, **"Ĉu la Amo havas ĉiujn rajtojn ?"**, p.85.

Ĉu ni ne estas pravaj, en tiaj kondiĉoj, dirante, ke Dio, se li ekzistus, estus sola respondeca pri la sufero kaj la malfeliĉo ?

## DIECO DE LA SUFERO

*Riskate en Teologio, ĉiam plumo de homo faras sur la papero ian bruon de rikano ; eĉ la respekto mem ŝajnas mokridi samtempe la Diojn kaj iliajn adorantojn.*

*Han Riner*

Ni ne nur ne devas koleri kontraŭ Dio, kiam li frapas nin, sed endas danki lin.

La sufero estas bona, ĝi estas dia. Jesuo faris al si la penon mem deklari tion al Sankta Tereza : "Kredu tion, mia filino, diris Nia Sinjoro al Sankta Tereza, tiuj ricevas de mia Patro la plej grandajn suferojn, kiuj estas de Li plej amataj, kaj tiuj suferoj estas la mezuro de Lia amo... Kiam ci estos tion kompreninta, ci helpos min priplori la perdon de la mondanoj, kies ĉiuj deziroj, ĉiuj zorgoj, ĉiuj pensoj celas al tuta malo."

(Citita de P.Pinard : "**La Boneco de Dio**", p.49)

Vi ĝuste legis : Dio trudas la plej grandajn suferojn al tiuj, kiujn li amas!!

Tio estas freneza.

La sama Pinard de la Boulaye rakontas la historion de leprulo, "montranta al misiisto siajn membrojn ronĝitajn de la malsano, radia pro ĝojo : "Inter Dio kaj mi estas nur tiu muro : mia karno. Ĝi disfalas. Baldaŭ mi vidos lin!" (op.cit. p.38)

Koncepto kontraŭnatura, malhomeca.

La kredanto akceptas sian suferon kun ĝoja koro, imagante esti agrabla al sia Dio.

De tio ĝis trudi turmentojn al si mem, estas nur unu paŝo - kaj la fanatikulo ne hezitas transi ĝin.

Oni vidas, en Orano, virinojn supreniri kun nudaj piedoj la monton al la kapelo de Santa-Cruz (1 ½ horo da marŝado sur rokeca pado.)

Oni vidas en Marsejlo, ĉe N.D. de la Garde, pentofarantinojn grimpi la ŝtupojn surgenue, aŭ nudpiede, aŭ

kun kikeroj en siaj ŝuoj, por sin vundi (Ho tiuj kikeroj dediĉataj al Dio kiel ofero!) Kvazaŭ la vivo ne estus sufiĉe kruda! Kvazaŭ Dio ne estus jam... tro ŝparema pri siaj bonfaroj!*

Oni sin skurĝas. Oni sin vergas. Oni ŝiras ĝissange sian haŭton. Oni kuŝas sur malmolo. Oni senigas sin je manĝo, je trinko - kaj ankaŭ de io alia. Oni sin trudas al malpuraj aŭ penigaj agoj, kiel Marie Alacoque gluttante la kraĉaĵojn de malsanuloj aŭ lekante iliajn pusajn vundojn. Oni oferas ĉion ĉi al Dio, kun tiel granda ĝojo, kiel la eta Tereza de Lisieux, feliĉa kraĉi sangon en sia dudeka jaro, kaj esti baldaŭ mortonta, por fine vidi sian Dion - torturiston.

La sufero estis rigardata de la malkleraj homoj kiel manifestaĵo de la dia kolero. Dio frapis por puni, por sin venĝi. Akceptante la suferon, oni malarmis lian furiozon, kaj oni elpetis lian pardonon.

Tial estis inventita la ofero. Ĉar estas malpli aflikte oferi alies suferojn ol siajn. Oni mortigis ian beston (La Biblio estas plena je la rakontoj pri tiaj naŭzigaj favorigaj aŭ prokulpaj ofero.) Oni mortigis ankaŭ homojn, militkaptitojn, buĉatajn sur la altaro mem, por trankviligi Dion!!

En unu el miaj libroj ("**La Eklezio kaj la Milito**") mi publikigis multajn dokumentojn kaj citaĵojn por montri, ke la Klerikaro rigardas la militon kiel punon senditan de Dio. De Joseph de Maistre ĝis marŝalo Foch, ĉiuj bonaj katolikoj (kaj ni ne forgesu Patron Pinard!) estas en akordo por diri, ke la milito estas dia.

La homoj koruptiĝas, kiam ili fariĝis tro multaj, eksplikas P. Pinard. La milito, kun siaj suferoj kaj siaj abomenaj funebroj, reevokas lin al realo - kaj al saviĝo.

La bona Dio utiligas la suferon kaj la doloron por atingi siajn celojn. Sendube li estis nekapabla eltrovi malpli krudajn rimedojn?

Sankta Aŭgusteno longe disertis pri tiuj temoj. Li konsentas, ke nia sorto estas antaŭe difinita en la spirito de Dio. La Eterna Patro scias, de antaŭ centoj da jarcentoj, ĉu ni estas savitaj aŭ ne.

"Kaj tiuj, pri kiuj li antaŭe scias, ke ili ne estos savitaj, li destinas ilin al la avantaĝo de la savotoj, kaj al la kontrasto inter ambaŭ interkontraŭaj civitoj. Tiel, ne vane li kreis ilin, laŭ sia admirinda kaj tre justa intenco pri ĉiuj racihavaj kreitaĵoj." (**De civit Dei** , pri la Dia Civito, XVII, 11)

"**La Kruco**" komentas tiun tekston en jenaj vortoj :

"Ĉi tie ni ne povas deteni surprizan ekmovon. Ĉar tiu doktrino ŝajnas severega. Por ĝin plene kompreni, necesos ligi ĝin al la tuto de la instruoj de Sankta Aŭgusteno pri la graco. Sed, se estas vere, kiel instruas la granda Doktoro, ke konsekvence de la origina peko la tuta homaro estas **massa peccati, massa damnationis**, la savo de kelkiuj aperas kiel verko de superega korpardono de Dio. Anstataŭ lasi ĉiujn homojn impeti en inferon, Dio savas kelkajn, tiujn, kiujn li volas, per la senpaga dono de sia amo, kaj li utiligas al ilia instruado, al ilia konverto, al iliaj progresoj en scienco, en humileco, en dankemo, la damnon mem de la maliculoj.

"Ni ne jam komprenas ĉiujn tiujn oferojn, sed ni komprenos ilin pli malfrue.

"Kiel ajn, unu afero restas certa, al kiu ni devas teniĝi pli ol al ĉio cetera : Dio estas bona, kaj li amas nin." (6an de januaro 1931)

Suferigi sennombran multularon (senkulpan, kiel mi montris en antaŭaj ĉapitroj) por savi kelkajn malmultajn privilegiulojn... tio estus kulmino de sovaĝeco, kaj via Dio estus monstro, Sinjoroj!

## ĈIUJ HOMOJ KREDIS PRI DIO

"Ĉiuj homoj kredis pri Dio, de tuta antikveco, ĉe ĉiuj popoloj."

Jen estas la "klaba" argumento, per kiu iuj kontraŭdirantoj ofte provis faligi min.

Unue, ĉu tio estas vere ekzakta?

Iuj esploristoj povis proksimiĝi al popoloj, kiuj havas nenian ideon pri iu diaĵo, laŭ sia diro.

La kredo verŝajne aperis en jam progresinta periodo de la homa evoluado.

La primitivulo - la tre primitiva - vivante pure animalan vivon, kredeble pensis precipe pri trinko kaj manĝo (oni ankoraŭ trovas tiel konsistantajn homojn...) kaj li verŝajne nesciis pri iu provo kompreni kaj klarigi la mondon.

Tiuj provoj alvenis poste, kun pli granda cerba elvolviĝo. Tiam la mondo ekpleniĝis je fantomoj, spiritoj, dioj kaj demonoj.

Kaj oni povas ja akcepti, ke la homaro necese pasis tra tiu etapo.

Sed kion tio pruvas?

La evoluado devas pludaŭri.

La erao de la Dioj proksimiĝas al sia fino. Nova erao komenciĝis, tiu de la pozitiva scienco, de la objektiva Racio, tiu de ateismo.

Periodo revolucia inter ĉiuj. Kaj kiu rapide konstruos mondon tute novan, tute liberan.

Pastro Desgranges iam donis al mi triumfe jenan argumenton : "Ĉiuj homoj kredis pri Dio!" Mi rebatis al li :"Ĉiuj homoj kredis pri la milito. Tio ne pruvas, ke la milito estas bona. Ĉiuj homoj drinkis alkoholon. Ĉu sekve alkoholo ne estas veneno?

"Ĉiuj homoj kredis pri sorĉistinoj kaj pri divenistoj. Tamen tiuj superstiĉoj estas nun foriĝantaj.

"Ankaŭ la mizero, la prostituado, la ekspluatado ĉiam ekzistis. Ĉu vi konkludos pri ilia neceso, pri ilia bonfarado?"

Pastro Desgranges ne respondis.
Sed lia silento estis tre elokventa.

Konsentite, la ideo pri Dio estis longatempe disvastigita universale. Des pli universale, ke persekutadoj, torturoj kaj brulŝtiparoj estis tie por hezitigi la nekredantojn.

Dum 30 aŭ 40 jarcentoj oni diskutadis pri Dio. Ĉu oni estas pro tio pli progresintaj?

Pri lia ekzisto estis instruitaj centoj da generacioj. Sed pri ĝi ni nenion pli scias ol niaj foraj prapatroj.

Ĉiuj branĉoj de la homa scio ege evoluis. Sola la scio (?) pri Dio restis sur la sama punkto.

La religio estas la sola kampo, sur kiu efektiviĝis nenia progreso.

Oni daŭre staras ĉe la revelacio (pli ĝuste pri la revelacioj, ĉar da ili estas nenombreblaj, kaj interkontraŭdiraj), ĉe la mirakloj, ĉe la supernaturo - ĉe kolekto da groteskaj, fantaziaj asertoj, kiuj ŝokas la racion, kiuj eskapas el ĉia scienca esplorado, kiuj povas esti nek kontrolataj, nek pravigataj nek demonstrataj.

Bazo ja malfirma por sistemo, kiu pretendas konduki kaj regi la homaron.

Tiu fiasko de la religia spirito estas konstatebla en ĉiuj kampoj de la Kredo.

Estas laŭfame pli ol 800 diversaj religioj en la mondo. Nur en Usono oni nombris 213 religiojn aŭ sektojn diversajn! Ni havas pli ol sufiĉe por elekti, sed kiel rekoni la veran "revelacion" el tiu amasaĉo el stultaĵoj kaj legendoj?

Konsideru, por ekzemplo, la senmortecon de la animo.

Multaj homoj ankoraŭ kredas pri ĝi. Sed pri tio, kion seriozan oni povas aserti? Ja nenion.

La homa pluvivado estas nur senfundamenta hipotezo.

Dudekmil jaroj da penoj, da diskutoj, da serĉadoj ne povis havigi eĉ plej malpezan komencon de pruvo. Oni nenion scias. Pli ekzakte : ĉio okazas, kvazaŭ la morto kaŭzus kompletan kaj definitivan detruon de la persono.

Tiu stagnado de la homa spirito - en la solaj kampoj de la animo kaj de Dio - ĉu ĝi ne estas impresa?

Kaj ĉu ni ateistoj ne devas tiri el ĝi argumenton favoran al nia neado?

Ĉiaokaze, estas certe : la nombro de la ateistoj estas kreskanta.

Ĝi estis tre malgranda antaŭ unu aŭ du jarcentoj. Tiam preskaŭ ĉiu kredis pri Dio.

Nun la nombro de la nekredantoj estas jam konsiderinda (kaj kiom ankoraŭ **praktikas**, kiuj jam ne kredas!)

Post kvindek jaroj, post cent jaroj, la nombro de konvinkitaj ateistoj, de deklaritaj liberpensuloj, estos kreskinta eĉ multe pli konsiderinde. Tio estas certa.* La bonefika evoluado pludaŭros ĝis fina venko de la Racio.

La Estinteco apartenis al vi, Sinjoroj reprezentantoj de Dio. Ni ĝin lasas al vi. Sed la Estonteco estas nia.

-----

* Ŝajne Lorulot eraris : nun, post duonjarcento, oni povas konstati rekreskon de la religia superstiĉa, malracia mensostato. Ofte sub masko de pseŭdoscienco.

N.de la tr.

## DIALOGO KUN PASTRO MUGNIER*

Jam kelkan tempon li estas saĝa kaj korekta. Li ofte kontraŭdiras min, kaj mi atente aŭskultas lin.

Liaj hezitoj min amuzas. Ho! mi estas sufiĉe lojala kunludanto por noti la bonajn argumentojn kaj la trafajn batojn, sed ili estas maloftaj, tre maloftaj. La brava pastro sufokiĝas, lacegiĝas por provi havigi iom da viglo kaj da brilo al la kompatindaj objetoj ellaboritaj en la seminarioj. Ili estas tiom malbrilaj kiom klasikaj. Tio ne multe mordas, kaj la publiko restas malvarma, krom la junuletoj de la paroĥa infanklubeto Sankta Jozefo, kiuj aplaŭdis pro fido laŭ signo de la aplaŭdistestro. S-ro Mugnier ekkonscias pri tio, pli kaj pli laŭte kriadas, ekprenas indignan mienon kaj vokas ĉielateston, kaj proklamas, ĉiuflanke turnante terurajn okulojn, ke ateismo estas pura frenezo.

- Ha, Sinjoro Lorulot! Vi insistis pri la ekzisto de sufero kaj de malbono...Vi aŭdacis diri : Se la mondo estas malbona, kiel Dio povus esti bona? Kial Dio permesas la mizeron, la malsanon, la maljuston, la militon? Tia estas, ĉu ne, la esenca bazo de via neado pri Dio?

- Se ne mia sola argumento, S-ro Pastro, almenaŭ unu el tiuj, kiujn vi malplej facile refutos.

- Elerarigu vin! La respondo estas multe facila, tre facila.

Aŭskultu. Bone sekvu mian rezonadon.

Dio kreis la homon perfekta. Malbono kaj sufero ne ekzistis.

Sed la homo malobeis. Kaj Dio punis lin.

Do la malbono ne estas senpera kaj konscia verko de Dio, sed rezulto, konsekvenco de la peko.

- Ĉu ĉio?

- Evidente. Vi ne estas kontentigita?

- Tute ne.

Vi diras, ke Dio kreis la homon perfekta. En tiaj kondiĉoj, kiel la homo povis kulpi la pekon ?

- Tial ke li estis libera. Dio donis al li la liberon, por igi lin kapabla meriti la belegajn rekompencojn,

kiujn li destinis al li.

- Kiam oni estas perfekta, ŝajnas al mi, ke oni ne bezonas rekompencojn...

- Estu serioza, S-ro Lorulot!

- Sume, Adamo posedis du aferojn : perfektecon (kiu devus sufiĉi al si mem) kaj liberon - t.e. la kapablon erari - kaj fariĝi neperfekta. La dua donaco igis la unuan neutila.

- Neniel, neniel! La homo tre bone povis ne malobei...

- Kion vi scias?

Tie ĉi necesus povi ekzameni, kaj iel pesi la agmotivojn, kiujn povis havi Adamo kaj lia dolĉa kunvivantino. Mi nescias, kion mi estus farinta en ilia loko - kaj ankaŭ vi ne scias.

Sed mi dezirus meti al vi kelkajn aliajn demandojn.

- Faru tion.

- Ĉu via Dio ne sciis antaŭe, ke Adamo malobeos?

- Certe. Dio scias ĉion, konas ĉion, antaŭvidas ĉion.

- Tre bone. Ĉio estis antaŭdecidita. Mi aŭdacos diri, ke ĝi estis... komedio!

- Ne forgesu, ke la homo estis libera, ke nenio trudis lin malobei...

- Sed ja! Ĉar ĉio estis antaŭvidita. Dio ne povis, kune, antaŭvidi blankon kaj antaŭvidi nigron. Li sciis, ke Adamo malobeos. Konsekvence Adamo estis trudita malobei.

- Vi ĉikane diskutas.

- Prefere konsentu, ke via koncepto pri "libero" estas malfacile defendebla, kaj ke, ĉiaokaze, estas tute neeble akordigi ĝin kun via kredo pri la Ĉiopotenco kaj la Ĉioscio de via Dio.**

Ĉu ankoraŭ alia demando?

- Mi respondos.

- Antaŭdanke.

- Ĉu vi ne instruas, ke Satano estis la ĉefa aganto por la homa malobeo? Estas ja li, kiu provokis la pekon. Serpente alivestinte sin, por prononci la lertan paroladeton, kiu faris tian efekton al S-ino Eva, kiu ne-

niam tion aŭdis...

- Ne faru facilan spritaĵon!

- Mi petas vin precizigi unu punkton : Ĉu Satano, feo de malbono, ekzistis antaŭ la homo ?

- Evidente.

- En tiaj kondiĉoj, ne la homo kreis la malbonon, kiel vi diris.

Ja Satano kreis ĝin. Kaj ĉu ne Dio kreis Satanon, permesis al li, kaj ankoraŭ nun permesas, ekzisti kaj pluigi sian malbonefikan taskon?

Kial Dio ne neniigis Satanon antaŭ ol krei la homon? Tiel ni havus nekontesteblan pruvon pri lia bona volo...

- Pardonu! Satano estis necesa, por ke la libero de la homo ne estu vanta vorto.

- Ne estas serioze, S-ro Pastro! Satano estas nemortema, li estas potenca, li estas nevidebla. Kiel ni povus efike lukti kontraŭ lin?

- Dio subtenos nin.

- En lasta juĝo do, estas via Dio la unika respondeca kaj la sola kulpa pri ĉiuj niaj plagoj. Ĉar se li rifuzas min subteni, mi estas jam antaŭe venkita.

Ĉar la batalo inter Satano kaj la homo ne estas egala, estas ridinde paroli pri nia Libero!

........................................................................................

Mi ricevis la impreson, ke pastro Mugnier... iomete padelas.

Li eĉ riproĉis al mi, ke mi ironie parolis pri la Genezo (nu! la aŭtoro de la "Komika Biblio" ja povas tion permesi al si...) kaj konsentis tro da graveco al **fantazioj.**

Tiu vorto ekskuis min. Ĉu fantazioj, la Bibliaj rakontoj? Kia herezaĵo!

En mia rebato mi rimarkigis al S-ro Mugnier, ke la Vatikana Koncilio ordonas al ĉiuj kredantoj akcepti **laŭvorte** la enhavon de la "Sanktaj Skriboj", kaj ĵetas anatemon kontraŭ tiujn, kiuj pretendas, ke tiuj rakontoj estas **bildoj** aŭ **simboloj.** Des pli prave kontraŭ tiujn, kiuj ilin kvalifikus **fantazioj.**

La tuta, aŭ preskaŭ tuta ĉeestantaro ĝojegis kaj aplaŭdis.

Pastro Mugnier ne malfruis por rerektigi. Ne ekzakte tion li intencis diri... Li uzis la vorton "fantazio", ĉar mankis al li eltrovi pli propran, pli ĝuste tradukantan lian penson...

- Sed fine, ĉu Adamo kaj Eva ekzistis, jes aŭ ne? Ĉu ili manĝis la malpermesitan frukton? Ĉu ili aŭskultis la serpenton? Kaj la origina peko, pro kiu ni estas ankoraŭ premegataj, ĉu vere ĝi naskiĝis de tiu tripersona farso?

Pastro Mugnier subite sin deklaris tre laca, preskaŭ senvoĉa. Li senkulpigis sin, ke li ne povas tiun vesperon plu daŭrigi la diskuton, kaj forlasis la ĉambregon sen atendi la finon de mia eksponaĵo.***

-----

* Pastro Mugnier estis tre bonkora homo, kiu atribuis al Dio saman bonkorecon. Oni citas de li jenan aserton : "Jes, la infero ekzistas ! ... sed en ĝi estas neniu !" N. de la tr.

** En "**Mi servas**" oni tiel klarigas la originan pekon :

- Aŭskultu : kiam ci maldungis la komizon, kiu priŝtelis cin, ĉu ci zorgis pri tio, kio fariĝos liaj infanoj ? Ĉu ci scias, ke ci destinis ilin al mizero ?

- Ne estas tamen mia kulpo : ilia fripona patro devis marŝi rekte !

Dio faris kiel ci. Li punis la gepatrojn, kaj konsekvence la infanojn." (22an de decembro 1920).

Tiel, pretekste, ke mastro povas agi maljuste kaj suferigi senkulpulojn, oni deduktas, ke Dio (ĉiopova kaj infinite bona !) devas same agi !

Sed "**La Kruco**" iras pli antaŭen. Ĝi sin apogas sur la origina peko por pravigi... la mortpunon !!

"En la origina dekadenca stato de la homo, por ŝirmi, por preventi, por puni, la socio estas devigita ordoni la morton. Necesas scipovi voli tiun oferon, kiel ajn kruela ĝi estas, pro ĝia neceseco. Solaj la socioj en dekadenco ne plu havas eĉ la forton prononci tiun ener-

gian "Mi volas" (Henry Reverdy, 10an de junio 1932).

Kia sangosoifa lingvaĵo por kristano ! Ĉu do la Eklezio ĉiam restos tiom malhumana ?

*** Tio ĉi okazis en julio 1932 en la minbaseno de Decazeville.

"Ĉi tie situas okazo tiel kurioza kiel neatendita.

"S-ro Pastro Mugnier subite sin deklaris tro laca por povi daŭrigi sian kontraŭdiradon. Li eĉ senkulpiĝas, ke li ne restos por aŭdi la rebaton de Lorulot, kaj jen li forsoviĝas je la duono post la kvina."

"Lorulot tuj deklaras, ke li estas malagrable surprizita de tiu neantaŭvidita foriro.

"En vipa kaj tranĉa respondo, kiu entuziasmigas la aŭdantaron, li montras, ke la unuaj disĉiploj de la kristo altiris al si la simpation de la malaltranguloj ĝuste tial, ke ili sin miksis kun ili kaj dividis iliajn pensojn. Ĉu estas same hodiaŭ ?

"S-ro Pastro Mugnier konsentas nenian meriton al la fortuzo. Kial do li tiom laŭdas la meritojn de tiu Klerikaro, kiu starigis sian superecon nur helpe de perforto, ktp ktp." ("**La Dépêche**" de Toulouse, 20an de julio 1932).

# PSIKOLOGIO DE LA KONVERTITOJ

La psikologio de la "konvertitoj" ĉiam vive interesis min.

Nenio estas pli pasiiga ol provo por surprizi la plimalpli sekretan mekanismon de tiuj evoluoj - kiuj ĝenerale estas mirigaj nur por supraĵa aŭ misinformita observanto.

Preskaŭ ĉiam la esencan rolon ludas la Amo - aŭ pli ekzakte la mallumaj fortoj de la seksimpulso, falsitaj, mise direktitaj aŭ difektitaj.

Mi jam havis okazon por diri : Tro ofte Dio ricevas nur la neelektitojn de la homaro!

Malbelaj knabinoj, kiuj ofertas al li ĉarmojn... de neniu viro deziritajn.

Koroj kontuzitaj de forlasiteco, aŭ malĝojegaj pro malfideleco, aŭ malesperaj pro funebro...

Je la morgaŭo de amaraj elreviĝoj aŭ de kruelaj malsukcesoj, oni pensas pri Li... Mi dubas, ĉu li povas esti plene kontentigita pro la nemulte flata rolo de anstataŭa rimedo, kiun la kredantoj ludigas al li.

Estas ankaŭ la lacaj animoj, kiuj ne kuraĝas fronte rigardi al la vivo - ĝi estas ja tiel malofte agrabla - kaj sin lasas forporti, senreage, de la lulanta fluo de stultaj kaj pigraj esperoj. Molaj kaj obeeme flosantaj ŝipruinoj, kiujn la Klerikaro povas laŭvole direkti kaj konduki...

Estas ankaŭ la viktimoj de kontraŭnatura edukado ; ĉiuj, kiuj vivis tro kuntirite en si mem, pistitaj de sengusta kaj tiraneca moralo, anemiitaj per solulaj praktikoj, sola elturniĝa rimedo por iliaj tamen rajtaj deziroj... Estas ĉiuj venkitoj, ĉiuj sentaŭgaj, la duonviraj, senvolaj, tremantaj, timantaj... Kompatinda armeo, al kiu ni havus nur simpation, se la malfirmeco de la karno kaj la flirtado de la penso ne transformiĝus, en la lertaj fingroj de la pastro, en seninteligentan sektismon, en invademan fanatikon, en minacan kaj iafoje kruelan prozelitismon...

La psikologio de la homo estas strikte ligita al lia fiziologio. Tio signifas, ke lia inteligento, lia "animo" (oni komprenu tiun ĉi vorton en senco tiel larĝa, tiel profunda, tiel potenca, kiel oni volos) estas sub senpera, absoluta dependeco de kelkaj glandoj malgrandegaj, apenaŭ videblaj, ankoraŭ tre malbone konataj, sed kies mistera laboro ordonas al la tuta organismo. "Tiroidaj", "surrenaj", "ovariaj", nia vivpotenco venas de vi. Ne nur la potenco por vivi vegetan, senkoloran kaj pasivan ekzistadon, sed la potenco por batali, por senkalkule sin foruzi, ĝoje sindoni - la potenco por ami.

Mi ne volas subkomprenigi, ke la grandaj konvertiĝoj, la grandaj sentimentaj kaj religiaj malvenkoj estas ĉiam konsekvencoj de glanda nesufiĉeco, de nerva senpoviĝo aŭ de la organa konfuzo. Sed mi kredas, ke ofte tiel okazas!

Ho ! mi ne volas hodiaŭ paroli al vi pri la "Konvertitoj". Estus tuta volumo al ili dediĉenda. Eble mi iam skribos ĝin, se mi disponos la necesan tempon, ĉar la jaroj forpasas - kaj la haroj forflugas.

Hodiaŭ mi deziras paroli nur pri Ernest Psichari, mallonge.

Li estis nepo de Ernest Renan.

Kaj li mizerete revenis al la katolika kredo.

Granda sukceso (?) por la Eklezio. La paroĥaj bultenoj senĉese parolas pri Psichari, kaj montras lian admirindan ekzemplon.

Ĉu admirinda? Mi permesas al mi dubi. Kiujn argumentojn li proponis por pravigi sian "revenon al Dio" ?

Tiuj argumentoj estas senkompare malriĉaj, kvankam envolvitaj en sentimentaleco tiel senkolora, ke eĉ dekokjara servistineto ne lasus sin per ĝi kapti.

Kompatinda Psichari! Mi ne konis cin. Mi havas nenian informon pri ci, cia heredo, ciaj malsanoj, pri la motivoj, kiujn ci povis havi por plori kaj nutri nigrajn pensojn. Ci suferis, - kaj mi kompatas al ci el la fundo de mia povra koro, kiu ankaŭ multe suferis. Sed... mi

konstatas, ke la religio ne pacigis, konsolis, revivigis cin. Ci mortis, viktimo de la abomena milito, stultega amasbuĉado. Eble ci lasis cin mortigi? Eble ci propravole iris fronte al la hommortiga kuglo, kiu neniigis cian senutilan junecon?

Negrave. Mi legas jenajn liniojn de ci, reproduktitajn de ĉiuj paroĥaj bultenoj en Francio (certe iliaj stultaj legantoj konsentis al ci malpli da respekta kaj ama atento ol mi mem). Ci cin turnas al cia Dio, kaj diras al li:

"Kiel, ho ve! mi uzis la belegajn donojn, kiujn vi vokis sur min? Mi sentas ĝis en la fundo de mia koro, kiom ili devigas min, ĉar la Providenco metis min sur la teron en loko, en kiu oni devas esti ekzemplo, kaj kie la ricevitaj privilegioj ŝuldigas pezajn devojn. Sed la naturo estas tie, kaj mi sentas la mian tiel malperfekta, mi sentas min tiel nesufiĉa fronte al la plenumenda tasko, ke mi ruĝiĝas pro la trezoroj, kiujn mi tiel malinde ricevis. Kion mi povas fari por la Dia Mastro, kiu etendis al mi siajn sangantajn manojn, kion mi povas por la Eklezio, kiu min akceptis en la plejforto el mia mizerego? Ha! ne estas horo, en kiu mi ne petegas Jesuon kaj Marian lumigi min, doni al mi la forton por esti senpartige ĉe la piedo de la kruco, unike atenta pri iliaj ordonoj. Via Grandeco bonvolu helpi min ĉe ili, kaj sendi al mi, favore al mia bonvolo, sian patran benon!

(Ernest Psichari, **paroĥa bulteno de Saint-Ouen**, jun.1932)

Nu! nu! ne endas tiel ekscitiĝi! Ĉu ci perdis ĉian memkontrolon - kaj ĉian malvarmsangon?

Ci konscias pri cia malferteco. Kaj ci parolas pri la "belegaj donoj" de ci ricevitaj (kio estas iomete pretendeme, permesu al mi pasante tion rimarkigi).

Tio estas jam unu kontraŭdiro. Se ili estis vere belegaj, tiuj donoj devis ebligi, ke ci sane agu kaj kondutu... kiel eble plej bone, por ci kaj por aliaj.

Kian bezonon ci sentas, ion fari por "la Dia Mastro"? Ĉu tia aspiro ne estas nepravigebla?

Mi timas, ke ankaŭ tiu deziro venas de ia malsano de cia Memo, kredeble hipertrofiita. Ci donis al ci tro da gravo, amiketo!

Sincere, ci kredis, ke la Kristo kun sangantaj manoj (mil naŭcent jarojn poste...) havas la okulojn fiksitaj al ci. Tiu penso, per sia fikseco, per sia obsedo, fine funebrigis cian vivon. Ci estis granda turmentato kaj granda senpovulo. Ĉar tiu sensenca fantomado malhelpis cin ion ajn fari. Ci suferis multe - kaj sencele. Ci venkite falis, kaj el cia ofero eliros nenio bela, nenio granda, nenio palpebla.

Mi kompatas al ci - kaj mi konservas rankoron kontraŭ tiuj, kiuj cin kondukis al tiu elreviga filozofio, al tiu ofero de stulto kaj malsereneca vanto...

Sed... al mi, kiu serĉis kelkajn verradiojn al cia Dio, permesu diri al ci, kiom paleta mi trovis cian lumon, kaj kiom mallarĝa, mallerta, malsaneta, malnormala - kaj multe tro persona - cian rezonadon!

Ne cia dolora ekzemplo, Psichari ; ne cia konfuza, subtilaĉa, febra penso kuracos min el mia ateismo ĝoja, vibra, optimisma... kaj moke spitema!

# ĈU ONI POVAS ESTI SCIENCULO KAJ KREDANTO?

*La kredoj de la homo estas malsanoj de lia inteligento ; same liaj preĝoj estas malsanoj de lia volo.*

*Emerson*

Kaj tiuj scienculoj, kiuj estas kredantoj?

Ĉar oni povas esti, **kune**, eminenta scienculo kaj konvinkita kredanto.

Do ne estas opozicio inter Scienco kaj Religio!

Jen estas ankoraŭ argumento ofte aŭdata. Argumento, kiun niaj kontraŭuloj opinias la plej premega, la plej nerefutebla el ĉiuj.

Kiu ne aŭdis ilin citi Pasteŭron, kaj Branly, kun triumfaj akcentoj?

S-ro Pastro Mandet lastjare verkis libron : "**La falo de Idolo, aŭ la fiasko de Sciencismo**" (Moulins. Les Imprimeries réunies)

Se la pastroj komencas faligi la idolojn, kio fariĝos el ni?

Unuavide, la titolo de la verko instigus nin al supozo, ke pastro Mandet malŝatas la sciencon.

Tio ne estas tute ekzakta. Fakte li malŝatas nur la sciencon de la nekredantoj. Se la scienculo konsentas iri al meso, oni pardonas al li, ke li estas klera - kion mi diris! Oni utiligas lian nomon, lian personon, liajn laborojn, por blindigi la gapulojn kaj fari utilan reklamon al la religio.

Pastro Mandet uzas plurajn ĉapitrojn el sia libro por paroligi tiujn bonajn scienculojn.

Frandu jenan frazon atribuitan al la natursciencisto Geoffroy-Saint-Hilaire :

"Mi estas blinda, sed mi estas feliĉa ; Dio volis tiun doloron por reaĉeti la troon de miaj tre vivaj kontentoj... Ni estu dankemaj pro la favoroj de la Providenco."

Geoffroy-Saint-Hilaire estis videble de bonega konsisto. Sendube ankaŭ la legantoj de Pastro Mandet ne estas tre postulemaj, ĉar ili kontentiĝas per tiaj rakontoj.

Mi konfesas, ke mi persistas ne admiri tiujn "favorojn", kiuj deprenas de ni la vidon, kaj torturas nin morale kaj fizike.

Mi konfesas, ke mi ne admiras ankaŭ jenan frazon de la biografiisto de Cuvier (alia scienculo kara al pastro Mandet) : "Neniu pli konstante ol li respektas ĉiujn potencojn : Dion, la religion, la registarojn kaj la reĝojn, kaj la genion kiel la virton, ĝemelajn tigojn de sankta trunko." (p.10)

Ho! tiuj sanktaj tigoj simboloj de virto!

Ho! tiu respekto al Dio, la registaro, la reĝoj!

Se vi ne estas konvinkitaj pri la bonegeco de la religio, sakramento! gardu vin.

Por Cuvier kiel por multaj aliaj, la religio estis parto de homogena kaj kohera sistemo. Oni ne povas malhavi Dion pli ol la Bankon de Francio, la vinvendistojn, la prizonojn, la fajrobrigadojn kaj ĝendarmojn - precipe ĝendarmojn!

La registaro, la reĝoj, la dioj, la moralistoj, la pastroj, ĉu ne jen estas belega kolekto da ĉiuspecaj ĝendarmoj?

Kiom da hodiaŭaj dikaj burĝoj troviĝas en sama cirkonstanco! Dio, estas la Ordo! La religio, estas la Kaso!

Kiom da piaj riĉulidoj faras Paskan komunion, kaj aklamas la Eklezion, ĉar ili timas, ke la estonta Demokratio senigos ilin je ilia varma situacio!

La argumento pri la elitoj, kiuj revenas al la religio, pruvas nur unu aferon : nome, ke la posedantaj klasoj metis sian tutan fidon en la religio, **opio de la popolo**

Ĉe multe da kleruloj-kredantoj, mi supozas, ke la **socia** aspekto de la religio estas ĉefe gravega.

Detrui Dion, estus riski sin al la danĝero ŝanceli la tutan socion. Por multaj tiu timo estas la determina faktoro de ilia submetiĝo, almenaŭ konvencia, al la religiaj ideoj.

La fama matematikisto Cauchy proklamis : "Mi kredas pri la dieco de Jesuo-Kristo, kun Koperniko, Kartezio, Neŭtono ktp." La fakto, ke amaso da homoj kredis pri Jesuo-Kristo ne konsistigas sciencan pruvon pri lia ekzisto.

La kristanaj apologiistoj publikigis plenajn volumojn el piaj vortoj diritaj de kleruloj. Ili imagas tiel havigi al siaj tezoj neatakeblan bazon.

Endas ne forgesi, ke scienculoj estas homoj kiel aliaj. Ili estas tuŝeblaj de timo, de profitemo, de orgojlo. Ili povas havi nenian kompetenton ekster sia fako. Ankaŭ al ili povas manki kuraĝo kaj batalemo - kaj ili povas konservi por si siajn pensojn, prefere ol altiri al si malagrablaĵojn kaj persekutojn. Ĉar la klerikala gento ne pardonas, ke oni elmontras nekredemon aŭ skeptikecon!

Tre ofte oni citas ankaŭ vortojn de Fabre, la entomologo :

"Post miaj 87-jaraj observadoj, mi ne povas diri, ke mi kredas pri Dio, ĉar mi ja vidas lin ; sen li mi nenion komprenas, ĉio estas tenebro.

""Per miaj studoj, ne nur mi konservis tiun ĉi konvinkon, sed ili ĝin plifirmigis. Tial oni deŝirus de mi la haŭton pli facile ol la kredon pri Dio."

Vere, ne utilis studadi dum 87 jaroj por akuŝi je tia paradoksego.

Kiucele studi, serĉadi, labori, se la kredo pri Dio ĉion klarigas, ĉion lumigas, sufiĉas al ĉio?

Ekster Dio, ĉio estas nur tenebroj?

La malmulton da lumo, kiun ni posedas, ne donis Dio, sed ja la Scienco.

Se oni estus kontentiĝintaj per voko al Dio, anstataŭ labori, lukti, entrepreni, ni estus ankoraŭ similaj al niaj foraj prapatroj, kiuj vivis nudaj, kaj sin nutris per kruda karno.

Mi ne multe ŝatas tiun sistemon, kiu konsistas el aserto: "Sinjoro Tiu estas pli klera ol vi, kaj tamen li iradas al meso. Konsekvence, ankaŭ vi devas tien iri."

Malĝusta rezonado, sinjoroj!

Kaj danĝera!

Vi tuj ekkonscios pri tio.

Jen estas famega scienculo, profesoro ĉe Collège de France ; li estis trompita de mediumo. Ĉu, pretekste, ke tiu klerulo estas supera al vi, vi pasigos vian tempon pridemandante spiritistan turnotablon?

Jen estas rimarkinda bankiero. Li iras ĉe kartdivenistino por ekscii pri la estonteco. Ĉu vi postpaŝos lin?*

Jen estas inĝeniero el la plej kapablaj. Li ludas pri ĉevalkuroj. Jen estas renoma kuracisto. Li alkoholuliĝas; Jen estas diplomkovrita profesoro. Li sin fordonas al plej malnobla diboĉo. Brila, altmiena, superordenita generalo. Li tremas antaŭ putineto. Pie milda, facilparola pastro, majstro pri teologio. Lia sutano kaŝas plej malnoblajn apetitojn, plej sordidan avarecon, plej kruelan malicon...

Kiucele daŭrigi tiun longan vicon ? Ĉiu scias, ke la socia situacio de individuo pruvas nenion pri lia morala valoro.

Ĉiu scias ankaŭ, ke la klereco de iu homo pruvas nenion ekster lia persona fako.

Nia amiko Victor Ernest, belga deputito, iam respondis al pastro Desgranges :

> "La profunda kialo, kiu forprenas ĉian valoron al la elvokita pruvo, konsistas el la sendependeco de la diversaj manifestiĝoj de inteligento. Altvalora scienculo povas ne havi filozofiajn kapablojn, kiel esti sena je artaj kapabloj. Victor Hugo, unu el la plej grandaj poeziaj genioj, montris ofte infanecan filozofion. Sankta Tereza, mistika kaj halucinita, evidentigis rimarkeblan organizan spiriton en la fondo de pluraj monaĥinejoj. Lamartine estis senkomprenpova pri matematiko, La Fontaine nenion komprenis pri aferoj. Kaj Rockefeller pri poezio. La metafizikaj kaj religiaj kredoj de Pasteŭro ne malhelpis, ke li eksperimentis en rigora maniero kaj kun pozitiva menso. Sed ja al tiu rigora metodo, ne al siaj kredoj, Pasteŭro ŝuldis siajn sukcesojn. Kaj nenio demonstras, ke li submetis siajn kredojn al tiu metodo."
>
> ("**L'Idée Libre**", septembro 1927)

Oni povas esti grandtalenta advokato, kaj nenion scii pri medicino. Kaj inverse. Tia inĝeniero, tia nekomparebla teknikisto, povas nenion scii pri historio aŭ filozofio.

Pasteŭro estis granda scienculo. Dum sia tuta vivo li konservis la kredon de sia infaneco. Sed ĉu li estis farinta la specialajn studojn, kiuj solaj povis malfermi liajn okulojn? Oni povas sentime respondi nee. Li kontentiĝis per tio, kion li mem nomis : **la kredo de lignokarbisto.** Por scienculo, tio ne estas forta.**

Ĉu li obeis al kutimo, al la forto de tradicioj?

Ĉu lia religia kredo ne konfuziĝis kun lia profunda amo por sia tre pia patrino?

Malantaŭ sia scienca kulturo, ĉu li konservis senrimede mistikan naturon?

Por juĝi pri tiuj demandoj, necesus ekzakte koni lian temperamenton.

Aliflanke ni scias, ke li multe ŝatis la honorojn, kaj, sen dubi pri lia sincereco, oni povas supozi, ke li facile sin lasis gvidi de sia mensostato de kasto kaj klaso, kaj ke li repuŝis kun abomeno ĉian ideon, kiu povus malutili al la harmonio kaj al la stabileco de la pozicio, kiun li akceptis unu fojon por ĉiam.

Apud Pasteŭro, kiom da aliaj scienculoj, malpli sinceraj ol li, ludis, kaj plu ludas, la komedion de kredo ! Jen pro profitemo, pro zorgo pri sia promocio, por dekroĉi ordenon, por eniri en la Akademion (komplete vasaligitan al katolikismo). Kaj ankaŭ ofte pro timaĉo! Timaĉo pri la digna edzino kaj ŝiaj kriadaĉoj, timaĉo pri la bonpensantaj kolegoj kaj la mordema ĉirkaŭantaro, timaĉo pri la maltolerema Eklezio kaj la viskozaj ĉieestantaj Jezuitoj...

**Ho Libereco!** Por cin konkeri, ĉu ne estas necese antaŭe posedi cian karan fratinon : **Virecon?**

-----

* Oni estus mirigita, se oni povus koni ĉiujn unuarangajn personojn (ŝtatistojn, por ekzemplo), kiuj restis superstiĉaj, kaj konsistigas gravan parton el la klientaro de somnambuloj kaj aliaj divenistinoj.

** Pasteŭro zorge evitis apliki la **sciencan metodon** al studado por religiaj demandoj. Se li estus kuraĝinta tion fari, li certe estus perdinta la Kredon. La dogmoj ne rezistas al ekzameno, al kontrolo, al kritiko.

# KUN KATEKISMO EN MANO

*Kiu posedas Arton kaj Sciencon,*
*tiu posedas ankaŭ la religion.*
*Goethe*

En la antaŭaj ĉapitroj, ĉu mi denaturis la penson de la kontraŭulo, kun la mallojala intenco certigi al mi pli facilan kaj kompletan venkon?

Tia venko estus nemulte valora, ne nur al viaj okuloj, karaj legantoj, sed ankaŭ al miaj. Se la afero, kiun mi defendas, postulus tiajn artifikojn, mi ruĝiĝus servante ĝin.

Mi estas el tiuj, kiuj, male, preferas trovi fronte al si potencan kontraŭulon, solidan argumentaron... Kaj mia plezuro pafi al li nazbatojn estas centoble pli granda.

Por pli bone montri la lojalecon de miaj kritikoj, mi nun faros tion, kion ofte mi faris en publikaj kunvenoj.

Mi prenos la katekismon (katolikan, N. de la tr.) ĉe la ĉapitro koncerna **Dion**, kaj ĝin diskutos vorton post vorto. Mi citos tiun ĉapitron sen plej eta flanklaso. Tiel oni ricevos ekzaktan ideon pri la koncepto de Dio, tia, kia ĝi estas instruata, ankoraŭ nune, al centmiloj da infanoj.

(**Katekismo de la diocezo de Nancio.** La substrekitaj tekstoj estas rigore reproduktitaj.)

D - Kio estas Dio?

R - Dio estas pura spirito, infinite perfekta, eterna, kreinto kaj mastro de ĉiuj aferoj. (Ni revenos detale al ĉiuj el tiuj punktoj poste.)

D - Ĉu ni povas koni Dion en certa maniero?

R - Jes, ni povas koni Dion en certa maniero, ĉar ĉiuj kreitaĵoj pruvas al ni lian ekziston.

D - Kiel la kreitaĵoj pruvas la ekziston de Dio?

R - La kreitaĵoj pruvas la ekziston de Dio, tial ke ili ne povas ekzisti per si mem, kaj ke, se necesas laboristo por konstrui domon, necesis kreinto por fari el nenio la ĉielon kaj la teron, kaj por starigi ordon kaj harmonion.

Mi ne longe insistos, tion farinte en la antaŭaj ĉapitroj, pri la absurdo de tia komparo, kaj mi limigos min en ripeto : la laboristo nenion kreas, li transformas, li kunmetas antaŭekzistantajn materialojn. Dum Dio estus kreinta el nenio "la Ĉielon kaj la Teron". Tia fantasmagorio estas nekonceptebla.

D - Ĉu ni trovas en ni mem pruvon pri la ekzisto de Dio?

R - Jes, ni trovas en ni mem pruvon pri la ekzisto de Dio, ĉar nia konscienco supozigas mastron, kiu ordonas al ni la bonon kaj malpermesas la malbonon.

Kio estas la konscienco, se ne la kapablo, kiun ni posedas (ne ĉiam) juĝi nin mem, scii ĉu niaj agoj estas bonaj aŭ malbonaj?

De kie venas tiu kapablo? Tute simple de la vivo en komunumo.

Ja la socio, per sia etoso, per siaj multoblaj influoj, formas, lumas kaj elvolvas - aŭ atrofias - nian konsciencon.

Se la konscienco venus de Dio, ĝi estus sama por ĉiuj. Oni ne konceptus Dion de Justo, donantan al unuj admirindan kaj fortan konsciencon ; al aliaj konsciencon malfortan kaj malklaran - kaj poste permesantan al si juĝi kaj puni tiujn, al kiuj li mem rifuzis la lumon!

Ĉu la konscienco de mizerulo, sena je edukado, koninta nur suferon kaj malamon, povas esti identa al tiu de privilegiulo, favorita de la Destino kaj plenigita de ĝojoj kaj de plej altvaloraj dotaĵoj?

Ĉu la eta degenerinto, malsana ekde la lulilo, havos tiel netan konsciencon, kiel la filo de riĉega kastelano? **Mens sana in corpore sano.** La fiziologia malekvilibro, la manko je higieno, la nervaj afekcioj, la malsano en siaj multoblaj formoj, senpere efikas al la konscienco kaj al la animo.

La konscienco povas elvolviĝi per bonefika morala edukado. Ĝi povas ankaŭ malaperi, ho ve! en malamika kaj malbona medio.

Do la ekzisto de la konscienco neniel pruvas la ekziston de Dio. Male, oni povus diri, ĉar ni havas la pru-

von, ke tiu konscienco estis malrapida kaj peniga akiro de la homaro, konfidita al siaj solaj fortoj - kaj forlasita de la Dioj!

Ni daŭrigu la legadon de la amuza katekismo.

D - Ĉu oni ĉiam kredis pri la ekzisto de Dio?

R - Jes. En ĉiuj tempoj kaj en ĉiuj landoj oni kredis pri la ekzisto de Dio.

Tiun argumenton mi refutis en antaŭa ĉapitro. Mi do ne revenos al ĝi.

D - Ĉu Dio manifestis sian ekziston?

R - Jes. Dio manifestis mem sian ekziston, kiam li sin revelaciis al la unuaj homoj, al Moseo, al la profetoj, kaj ĉefe en la persono de sia filo Jesuo-Kristo.

Jen estas do ĉiuj iliaj pruvoj.

En lasta juĝo ili havas nenion pli bonan por oferti al ni, ol la kolekton de la bibliaj legendoj!

Dio sin revelaciis al Adamo kaj Eva!

Dio parolis al Moseo!

Dio sendis al ni sian filon (kvazaŭ Dio povus havi filon!)

La Scienco instruas, ke la unuaj homoj vivis antaŭ pli ol centmil jaroj (multe pli laŭ la nuna stato de la scienco. N. de la tr.), kaj ke ili estis tute sovaĝaj, apenaŭ eliĝintaj el la animaleco. Kaj Dio estus montrinta sin al ili prefere ol al ni!

Koncerne Moseon kaj Jesuon, se eĉ konsenti pri ilia ekzisto (afero kontestata de iuj grandaj scienculoj, precipe pri la dua el tiuj personoj), kial ni kredus ilin laŭ parolo?

Moseo povis esti avida kaj ambicia intriganto! Li scipovis blindigi la Judojn per ĵongloj de li lernitaj en la kortego de la Egipta faraono.

Siaflanke, Jesuo, se li ekzistis, estis mistika iluminito, halucinacia revulo - aŭ eble ribelulo, strebanta liberigi la judan popolon el la romana regado, kaj pozanta je Profeto, kiel multaj aliaj antaŭ kaj post li!

Ne proponi aliajn pruvojn pri la ekzisto de Dio, ĉu ne estas konfesi, ke oni nenion scias, nenion seriozan? Ĉu ne estus pli saĝe silenti?

Nun ni eniros en serion da difinoj, kiuj estus feliĉigintaj la famegan Sinjoron de La Pallice!*

D - Kial oni diras, ke Dio estas pura spirito?
R - Oni diras, ke Dio estas pura spirito, tial ke li estas inteligento, kiu ne havas korpon.

Ĉu ne amuze?

Min pardonu la spiritualistoj, sed tiu dualismo inter materio kaj spirito ŝajnas al mi nekonceptebla.

D - Kial oni diras, ke Dio estas infinite perfekta?
R - Oni diras, ke Dio estas infinite perfekta, tial ke li havas ĉiujn perfektojn senlime.

Ja evidente! Dio estas perfekta... tial ke li havas ĉiujn perfektojn.

Tio pensigas pri la scena persono de Molière : "Via filino estas muta, Sinjoro, tial ke ŝi ne parolas!"

D - Kial oni diras, ke Dio estas eterna?
R - Oni diras, ke Dio estas eterna, tial ke li ne komenciĝis, kaj neniam finiĝos.

Oni tion suspektis!

D - Kial oni diras, ke Dio estas kreinto?
R - Oni diras, ke Dio estas kreinto, tial ke li faris el nenio, el sia propra potenco, ĉion ekzistantan.

Ĉiam la absurda kredo pri kredo ex nihilo.

D - Kial oni diras, ke Dio estas mastro aŭ Sinjoro de ĉiuj aferoj?
R - Oni diras, ke Dio estas mastro aŭ Sinjoro de ĉiuj aferoj, tial ke la kreitaĵoj ekzistas nur per li, kaj dependas ĉiuj de li.

Tre bone. Sed do, kio fariĝas nia pretendata libero?

D - Ĉu Dio vidas ĉion?
R - Jes, Dio vidas ĉion, la estintecon, la nunon, la estontecon, kaj ĝis niaj plej sekretaj pensoj.

Dio vidas la estontecon. Li antaŭe scias ĉiujn plagojn kaj li ne interhelpas!

D - Ĉu Dio okupiĝas pri siaj kreitoj?
R - Jes. Dio zorgas pri siaj kreitoj, li konservas kaj regas ilin per sia Providenco.

Tio estas la plejbelo. Dio konservas nin per sia Providenco. Kaj la malsanoj? kaj la militoj? la vulkanaj erupcioj? kaj mil aliaj plagoj, kiuj tro ofte faras el la vivo

pezegan ŝarĝon, allasitan al ĉiuj konkurencoj, kaj al la triumfanta kruelego de la fortaj al la malfortaj kaj la malgrandaj.

Kaj jen estas tio, kion oni instruas al centmiloj da infanoj! Neniam sufiĉe ni protestos kontraŭ tia trouzo, kontraŭ tia maljusto!

Tiu ĉi ĉapitro dediĉita al Dio enhavas ĉion, kion kristano devas scii pri la Diaĵo.

Estas nenio pri tiu grava kaj tiom serioza demando.

Ha! mi forgesis...

Mi forgesis la historiojn pri la Triunuo.

Estas ja alia ĉapitro, en kiu oni legas tion ĉi :

"La mistero de la Sankta Triunuo estas la mistero de unu sola Dio en tri distingaj personoj.

"La Tri personoj de la Sankta triunuo estas la Patro, la Filo kaj la Sankta Spirito.

Ĉiu el la Tri Personoj estas Dio, kaj posedas la tute plenan diecon."

En broŝuro, kiun mi freŝdate reeldonis kun lia aprobo, S-ro Herriot, parolante pri la Mistero de la Triunuo, ne volante esti drasta, nur kvalifikis ĝin "billevesée"(sensencaĵo).

Tio estas certe la malplejo, kiun oni povas diri pri ĝi.**

Kun senartifikeco, kiun mi admiras, pastro Michel impetas helpe al la Triunuo. Li demonstras... ĝian ekzistokialon :

"Ke estas tri personoj en Dio, tio estas (atentu bone) ... por ke ni ne povu diri, ke Dio enuis antaŭ la kreado! Li ne estis tute sola, ĉar ili estis tri!

"Kvankam unika nia Dio ne estas sola, kaj li portas en si la plej agrablegan el la kompanioj"(p.106). Tutcerte! Sed do kial li kreis nin?!***

Proklamante tiun malkoheran dogmon, la Klerikaro, nevole, sukcesis doni mortigan baton al la filozofia koncepto pri Dio.

La Katekismo estas atesto pri la stato de intelekta debileco, en kiu la Klerikaro strebas tenadi la homojn.
La mensa pigreco de tiuj ĉi tre bone kontentiĝas per tiu sistemo.

Tiel **"L'Ami du Clergé"** (Amiko de la Klerikaro) predikante pri la kredo de la sanktuloj, skribis (14an de aŭgusto 1924) :

"En la lumo de la dia Evangelio kaj de la neerarema Eklezio, ili sin informis pri sia origino, pri sia vivo, pri sia destino... Kial okazas, ke ni estas sur la tero? **Tial, ke Dio tion volis.**

"Por kio mi estas sur la tero? **Por servi Dion,** mian kreinton kaj mastron.

"Kaj kiam, post tiom da aliaj, kiuj min tie lasis, mi foriĝos de la tero, kio mi fariĝos? **Mi posedos Dion.**

"Jen, estas ĉio, sed kiel bela tio estas, kiel granda, kiel rekuraĝiga por la spirito, kiu ne bezonas meti al si tiujn angorigajn demandojn, por la animo, kiu sin scias farita por Dio, por la koro, kiu sin sentas amata!"

Oni ne riskas trafi meningiton, akceptante tiun instruon...

Enirinte en tiun vojon, oni ĉion glutis, eĉ la Eŭkaristion. Oni persvadiĝas, ke Dio povas persone ĉeesti, karne kaj oste, en simpla hostio. Knabineto asertis al mi, ke el la hostio elfluus sango, se iu sakrilegia mano ĝin rompus je du pecoj : tion diris al ŝi la monaĥinoj, tion ŝi firme kredis.

La Evangelio ja prave diras : "Kiu ne ricevas la regnon de Dio **kiel infaneto,** tiu ne povos eniri en ĝin." (Marko X, 15).

La Eklezio kantas (Himno de Pasko) : "Feliĉegaj estas tiuj, kiuj estos kredintaj **tion, kion ili ne vidas.** Ili ricevos la eternan vivon..." (pastro Michel, p.109).

...Estas multe pli malfacile fariĝi liberpensulo, ol resti kredanto!

-----

* S-ro de La Pallice estas tradicia specialisto pri taŭtologioj.

** "Triunuo sankta, kaj supera al ĉiuj aferoj, admirinda, nerakontebla, nediskutebla, neatingebla, nekomprenebla, esenca, kaj esence superanta ĉian sencon, ĉian racion, ĉian koncepton, ĉian inteligenton, ĉian esencon de la plej alta ĉiela penso, kiun eĉ la anĝeloj ne povus diri, nek pensi, nek kompreni, nek koni."
(Sankta Aùgusteno, citita de "**La religia krizo**", Parizo 1876, p.266).

Nerakontebla ! Nekomprenebla ! Neatingebla ! S-ta Aùgusteno ja tute pravas : Tial ni ne volas ĝin !

*** Bossuet ne antaùvidis tiun... triunuistan argumenton : "Kvankam li faras tiel grandajn aferojn, li tute ne bezonas ilin, kaj li estas feliĉa, ke **li sin mem posedas.**" ("**Traktato pri la kono de Dio**", p.306).

Fari aferojn, kiujn oni ne bezonas, tio ne estas signo de tiel granda inteligento... Sed ja, kiam oni estas kapabla "sin mem posedi"...!!

## LA MALPIAJN PAPEROJN, EN LA FAJRON!

*Kiam la papo parolis, endas nur submetiĝo kaj obeo, sen ion ekzameni kaj serĉi motivon.*
*A. de Solminihac*
*("**La Kruco**", 12an de septembro 1931)*

Vi ekkonis la argumentojn proponatajn de la ateistoj. Ili valoras... kiom ili valoras, kaj ni neniel intencas ilin trudi al vi.

Ni eĉ ne deziras malhelpi vin aŭskulti la kontraŭulon. Male! La homo, kiu volas instruiĝi, necese devas aŭdi ĉiujn sonorilsonojn.

La klerikoj pensas alimaniere.

Ili abomenas diskutadon kaj liberan ekzamenon.

Ili severe malpermesas al siaj disĉiploj aŭskulti iun parolon krom ilian. (Bonega rimedo por esti prava!)

La episkopo de Belley sendas vokon al siaj piuloj ("**Religia Semajno**" de Belley, marto 1932).

Li avertas ilin kontraŭ certaj malbonfaraj verkistoj, kiuj strebas "semi en la animon de la pastroj la suspekton kontraŭ iliajn ĉefojn, la papon kaj la episkopojn; ŝanceli ilian plenfidon al la instrukcioj el Romo, kaj tiel provoki malobeojn, se ne malfideliĝojn."

Kiel oni elturniĝos por refuti la kritikojn de la malamikoj de la Eklezio?

Ĉu oni prezentos argumenton kontraŭ argumenton, ideon kontraŭ ideon?

Ĉar la Eklezio posedas la eternan Veron, ĝi devus, neevitante la diskuton, volontege akcepti ĉiujn okazojn, kiuj ebligus al ĝi konfuzigi la miskredantojn.

Tute ne!

Ni evitu la diskutadon!

Ni metu la lumon sub kaŝilon...

Ni buŝoŝlosu la kontraŭulon... tio estas la plej certa rimedo por refuti liajn parolojn. Se tio estas neebla, se oni ne povas lin submeti al cenzuro, ni almenaŭ malhelpu, ke niaj paroĥanoj ilin aŭdu!

La episkopo de Belley estas kategorie aserta :

**"Al fajro, tiujn venenajn paperojn! Al fajro tuj, SEN ILIN LEGI!**

**"Jes, sen ilin legi!**

**"Unue tial, ke tiuj skriboj sen ia dubo falas sub la malpermeson ordonitan de la kanono 1399, paragrafo 6, kontraŭ la librojn kaj gazetojn,** kiuj defendas la erarojn kondamnitajn de la Sankta Seĝo... aŭ kiuj strebas renversi la disciplinon de la Eklezio, aŭ kiuj insultas la katolikan hierarkion. **Estas do pozitiva kulpo, ilin legi, se oni ne ricevis apartan permeson por tion fari.**

**"Poste tial, ke neniu rajtas troriskeme iri renkonte al danĝero konfuzi sian kredon, kaj malpliigi sian fidon al la Eklezio, legante tiujn malamajn atakojn, tiom pli timindajn, ke ili sin kaŝas iafoje sub la eksteraspekto de ŝajna fervoro al la sankta apero de Jesuo-Kristo.**

**"Por esti je la nivelo de nia tasko, por respondi al la atendo de nia Mastro, kiu degnis asocii nin al sia sacerdoteco en tiel grava horo, ni bezonas kredon klaran kaj firman ; ni bezonas ardan amon al la Eklezio, kaj plenan fidon al ĝia instruado ; ni bezonas fine ĝojan kaj filan obeadon al la Papo, Vikario de Jesuo-Kristo. Se ĉio ĉi okaze fleksiĝas, ni estas pereantaj!**

**"Nu, al malfortigo de tiuj supernaturaj energioj precize celas la perfidaj kaj timindaj eldonaĵoj, kiujn ni signalas al via atento.**

**"Karaj kunfratoj, ni ne falu en la kaptilon! Ni malfidu! Ni estu singardaj!**

**"Al fajro tiujn malbenitajn paperojn! Al fajro!"**

Virgile-Joseph
episkopo de Belley.

Jes, se la kredanto lernus klare vidi, se li senpartie povus instruiĝi, ĉio **estus perdita...** por la Eklezio, por la ĉefoj de la Eklezio!

Al fajro! al fajro! la malbenitajn kaj danĝerajn paperojn!

La pastroj kondamnis Victor Hugo, Anatole France, Zola, Balzac, cent aliajn geniulojn klerajn kaj kuraĝajn, de kies verkoj la legado estas malpermesita de la Sankta

Ofico, kaj kies libroj estas listigitaj en la Indekso.

Al fajro! al fajro!

Iam oni bruligis la aŭtoron kune kun lia libro. Bonega rimedo por malhelpi lin rekulpi.

Nune, manke je plibona rimedo, la episkopo de Belley kaj liaj kunfratoj kontentiĝas per sendo al brulŝtiparo de niaj broŝuroj, gazetoj kaj libroj.

Al fajro! al fajro!

Dankon, Sinjoro Episkopa Moŝto, ke vi aŭdacis laŭtigi en plena XX-a jarcento, tiun tragedian krion, kiu memorigas pri la mezepoko, la Inkvizicio, la Kagulo*...

Karaj legantoj nekonataj, mi petas vin juĝi : kiu el ni ambaŭ estas prava?

Ĉu la liberpensulo, kiu vokas al via inteligento, al la racio, kaj venas al vi en plena sincereco?

Aŭ ĉu la alia? Tiu, kiu tirane malpermesas al vi malfermi la okulojn? Tiu, kiu krias : Nenion legu! Ne instruiĝu! al fajro! al fajro!

Por ke ĝi estu tiel mallerte defendota, ja necesas, ke la afero de la religio estu malbona!

-----

* kagulo : monaĥa kapuĉo, kiu kovras kaj kaŝas la vizaĝon krom la okuloj. Ĝi estas kapvesto de pentofarantoj kaj de iuj inkviziciaj juĝistoj. (N. de la tr.)

## LA ATEISTO FRONTE AL LA MORTO

*La fenomenoj de la vivo estas energetikaj metamorfozoj same kiel la aliaj fenomenoj de la naturo.*

*Dastre*

Maltoleremo, malico, stulteco, jen estas la tri kapoj de la klerikala triunuo.

Ili estas cetere neapartigeblaj.

La Klerikaro volas regi la homojn.

Ĝia metodo konsistas el trudo de idiotaj dogmoj aŭ de infanecaj teruroj, por havi ilin en sia povo.

Sed iuj rezistas al ĝia kaptado. Aliaj iras pli antaŭen : ili provas liberigi la sklavojn, ilin eduki, montrante al ili la sensencecon de la kredoj kaj la falsecon de la dogmoj. Tiuj ĉi estas la liberpensuloj, kaj kontraŭ ili la Klerikaro uzas tutan sian malampotencon.

Jen vidu, kiel nin traktas la pastroj (laŭvorte) :

"BELA KREDO! - KIU CI ESTAS? - Animalo.
- DE KIE CI VENAS? - De la materio. - KIEN CI IRAS? - Al nenio, kiel krevanta besto.

Tiaj estas la ĉefaj artikoloj de la KREDO DE LA LIBERPENSO. Belete, ĉu ne?"

Jes, la vorto de la pastro estas ekzakta. Estas ja belete! Ĉar tiuj linioj estas ĉerpitaj el la Paroĥa Bulteno de La Couarde (Ile de Ré), majo 1932.

Tiuj sinjoroj certe ne lacigas siajn cerbojn por trovi argumentojn. La samajn azenaĵojn, la samajn krudaĵojn ili senlace ripetaĉas.

Ili ne volas esti animaloj - kia abomeno! Sed per sia malico ili sin metas ĉe la nivelo de plej senkonsciaj bestoj.

Ili rifuzas konsenti pri la animala deveno de la homo. Tiu hipotezo vundas ilian orgojlon... Kaj tamen, ĉu ne pli valoras, kiel oni diris, esti perfektigita simio ol degenerinta anĝelo?

(La aŭtoro de la artikolo aspektas al mi, li, kiel degenerinta simio, kiel retroulo.)

Ili riproĉas, ke ni kondukas la homaron al nenio. Nu, ĉiuj liberpensaj filozofoj estas unuanimaj, kaj ĉiam estis tiaj, por deklari, ke la nenio ne ekzistas, ne povas ekzisti, estas eĉ nekonceptebla.

Neniu scienculo, neniu pensulo uzas la vorton nenio.

Nur en unu libro oni trovas tiun vorton, nome en la **Katekismo.**

La Klerikaro instruas, ke Dio ĉerpis la mondon el **nenio.**

Ĉu tio ne estas la plej monumenta el la stultaĵoj?

Laŭ mi la morto ne estas la nenio. Ĝi estas reveno en la cirkuladon de la Kosmo. La vivo estas nedetruebla, nekreita. La individuo, efemera formo, malaperas. Sed la Universa Vivo pludaŭras.

Provu komprenigi tion al la tremernuloj, kiuj sin kroĉas al la mallarĝa egoista filozofio de la religioj!

Dupont, Thomas, Durand estas persvaditaj, ke ili revivos en sia nuna formo de Durand, Dupont aŭ Thomas, al kiu ili estas tiom korligitaj, la povraj etaj mezaĉuloj!

Pastro Lanouille volas je ajna prezo esti nemortema. Li asertas, ke post centmil jarcentoj, kaj pli, ekzistos ankoraŭ neperturbebla en sia vanteco, nekorektebla en sia stulteco, eterna pastro Lanouille...

Li bezonas, kiel multaj aliaj kun li, kredi pri tiu alia mondo, pri kiu li cetere alportas priskribon sufiĉe senbrilan, kaj multe malpli allogan ol tiu de la Paradizo de Mohamedo! (Mi konfesas, ke la kristanaj anĝeloj multe malpli efektas al mi ol la muzulmanaj hurioj...)

Nia eraro estas, ke ni konsentas multe tro da gravo al nia mizereta persono. Ni rediru : al la religiulo totale mankas modesteco, kiam li imagas, ke li estas la centro de la Universo, kaj ke lia grandioza Dio havas konstante la rigardon fiksita sur li...

La morto estas nur la disrompo de ia individua ekvilibro.

La molekuloj provizore kunamasigitaj en la formo de iu preciza organizo, reprenas sian sendependan aktivecon. Ne unu el ili mortas. Ili tuj ekkonsistigas novajn asociojn : mineralajn, vegetalajn, animalajn, gasajn, likvajn. Ni

estas kunmetaĵo el oksigeno, hidrogeno, azoto, karbono, ktp, ktp. Ĉiuj korpoj konataj kaj katalogitaj, al kiuj pastro de La Couarde volus malkuraĝe aldoni sian senmaterian animon elflugantan el la korpo ĉe la enirejo en la tombejon, por iri oni-ne-scias kien flirteti kun la flugilhavaj keruboj...

Ni ne timas la individuan Morton. Ni scias, ke ĉio mortas, por ke ĉio povu renaskiĝi. Ni penas superi nian egoismon, kaj serene altigi nin al pli perfekta kompreno pri la Universo infinita, kies integrita parto ni estas por eterne, tra kontinuaj kaj senĉesaj transformadoj.

El nia nobla kaj viva idealo, kaj el tiu de la timuloj, kiuj ploretaĉas pensante pri la Purgatorio kaj pri la barbara Infantimigisto, kiu atendas ilin, kiu estas la pli digna, la pli morala - kaj kiu la pli egoista, la pli animala, ho milda Vendea pastro, vendisto de patroniaj kaj de postmortaj konsoloj?

Tiu vorto, kiu ĵus elŝprucis el mia plumo, ofte mi aŭdis ĝin.

Oni ofte diris al mi : Kiel grave, se la religio estas malvera, ĉar ĝi konsolas...

Ĝi alportas iom da espero al tiuj, kiuj priploras karan mortan estinton, duonvidigante al ili la eblon iam poste lin retrovi. La malfeliĉuloj, tiel rekuraĝigitaj, trovas iafoje la moralan viglon, kiu ebligas al ili elporti la ofte doloregan ĉagrenon de brutala disigo...

Ĉu tia espero estas ebla? Ĉu ĝi ne iras kontraŭdirekte al racio? Ĉio pruvas al ni, ke ne estas alia vivo, kaj ke ni neniam revidos niajn karajn mortintojn...

Cetere la kredanto estas tute mallogika. Li priploras la mortintojn! Kial? Li devus ĝoji en la penso, ke ili estas "en la ĉielo", kaj ke baldaŭ li iros ilin retrovi.

Ĉu endas strebi ajnapreze konsoli? Kion do vi riproĉos al la malfeliĉulo, kiu provas per alkoholo forgesi sian ĉagrenon? La sanganta koro ne volas viajn anstataŭojn kaj rifuzas la religian ebriiĝon same kiel la alkoholan torporon. La alfiktita animo volas trovi en si mem, ne en mensoga espero, la forton alfronti la malfeliĉon. Mi ne volas iri fronte al konsolo, ĉar la memoro pri

tiuj, kiujn mi amis, estas al mi kara. Mi deziras konservi ĝin sendifekta kaj altvalora, sen pro tio turni la dorson al la vivo kaj al ĝiaj ĝojoj, tute male.

Pri tiu temo kiel pri ĉiuj aliaj, la ateista filozofio estas centoble pli bela kaj serena ol la religia filozofio.

# RELIGIO ESTAS MALAMO

*Ĉu la religio povus kaŭzi tiom da malbonoj ?*

*Lukrecio*

La ĵurnalo estas tie ĉi sub miaj okuloj, kaj mi melankolie konsideras ĝin.

"La religia tumulto en Bombajo.

88 mortigitoj kaj 850 vunditoj."

Estas la muzulmanoj kaj la hinduistoj, kiuj... polemikas en tiom arda maniero.

Kaj jam monatojn tio daŭras!

Ĉiujn okazojn profitas la fanatikuloj por eki interbatalon. Plej eta religia festo, revarmigante iliajn piajn sentoj, instigas ilin draste ataki tiujn,... kiuj ne same pensas.

Cetere la vorto, kiun mi ĵus uzis, estas tute malpropra. Tute ne temas pri penso.

Ĉu ili scias, kial ili estas muzulmanoj? kial ili estas hinduistoj? Ho ve!...

Ili obeas al unu sola ideo : mia religio estas la sola vera, la sola bona, la sola justa. La aliaj kultoj estas bazitaj sur eraro, sur mensogo, sur paganismo. Ili estas malagrablaj al Dio, konsekvence Dio povas ami kaj apreci nur la omaĝojn de mia propra sekto. Do bategante la anojn de aliaj sektoj, mi estos agrabla al Dio... Ni forte frapu, ni ne kompatu... la kontentigo de Dio estos pli granda, kaj konsekvence pli bela la rekompenco, kiun li rezervos al mi!

Per ŝtonĵetado la Muzulmanoj atakis hinduan procesion.

La morgaŭon, la Hinduistoj mistraktis muzulmanojn elirantajn el la moskeo.

Feliĉe la Angloj estas tie por remeti iom da ordo(?), sendistinge fusilante la ambaŭsektajn militantojn. Dio rekonos la siajn!

Kaj mi elvokas la longan sangan historion de la homaj religioj. Ĉiam masakroj, ĉiam konkuradoj, ĉiam malamoj... Albigensoj, Valdanoj, Arianoj, Protestantoj, Muzulmanoj, Judoj, Anabaptistoj, sen paroli pri Ateistoj kaj Liberpensuloj! Kia sarabando de intermiksitaj, gvatataj, subpremataj, ekstermataj sektoj! Kiom da herezuloj ekskomuniitaj kaj pelitaj! Kiom da skismuloj rostitaj! Kiom da mispensantoj, da malobeemaj, da dubantoj turmentitaj, suspektitaj, persekutitaj!

Sennombraj estis la maljustoj, la suferoj kaŭzitaj de viaj Religioj, Sinjoroj Pastroj!

Via Dio fluigis verajn riveregojn da sango - kaj oceanon da amaraj larmoj!

- Sed ne Dio! iam respondis al mi la eminenta pastro Viollet. Ja la pastroj! Vi malprave konfuzas la pastrojn kun la bona Dio, tute ne estas same...

- Diable! (pardonu!) mi respondis. En la Katekismo oni instruas al mi tute alian aferon.

La Klerikaro reprezentas Dion! La papo estas lia vikario! Li estas eĉ neerarema! Ja en la nomo de la Eterna Patro via Klerikaro enkarcerigas, torturas aŭ bruligas nin.

Ĉu la rajtdokumentoj de via Klerikaro estas validaj aŭ ne? Ĉu vere ĝi reprezentas Dion, aŭ ĉu ĝi tute nenion reprezentas?

Sed se ĝi ne reprezentas Dion, aŭ eĉ se ĝi nenion reprezentas, malgraŭ ĉio estas la ideo pri Dio, kiu faras ĝian forton ; ideo de ĝi forĝita, kaj de ĝi ekspluatata, kun senkompara lerteco!

Mi estas devigata konstati, ke la kredo pri Dio ne interpacigas la homojn, neniel mildigas la venĝemojn, ne inklinigas la korojn al tolero kaj boneco.

Male la historio montras al mi, ke la religia ideo estis suplementa okazo por malamoj kaj militoj ; ke la kredo pri Dio havigas mirindan daŭrigilon al konkurencoj, al deziroj pri superado, al orgojlo kaj al la homa malico.

La homa fanatiko estas doloriga kaj lamentinda afero. Ĉu ĝi sin apogas sur rasa malamo, ĉu sur religia mal-

amo, ĝi ĉiam estas abomeninda, ĉiam malmorala kaj kruela.

En la nomo de Dio oni sin reciproke buĉis, oni daŭre sin buĉadas. Tial ke la homoj ne povis pri ĝi interakordi (pro evidenta kaŭzo!) ili ekskomunikis unuj aliajn.

Ankoraŭ hieraŭ, katolikoj kaj protestantoj abunde interbategis en Dublin, okaze de eŭkaristia kongreso. Ili pugnobatalis tiom furioze, kiom Judoj kaj Araboj antaŭ la Muro de Lamentoj ; tiom furioze, kiom socialistoj kaj komunistoj antaŭ... la Muro de la Federacianoj, en Père-Lachaise-tombejo!

Ho fanatikismo de sektemaj kaj seninteligentaj spiritoj, kiom da malbono ci faris al la homaro, kaj kiom ci faros plu!

Necesus malarmi la malamojn. Sed por tio necesus mortigi la Dogmon, kiu ajn ĝi estas.

Konsekvence, ni ne hezitu. Ni detruu la religiojn, ĉiujn religiojn.

Kio plej kontribuis por forigi min de la religio, tio estas la konstato, kiom ĝi estas for de la Boneco, de la vera Boneco!

La amo al Dio estas tiel frenezeca, tiel invada, ke ĝi sufokas la plej dolĉajn homajn aspirojn.

Jen kiel rezonas la kredanto :

"La plej granda bonhavaĵo de popolo estas ĝia religio ; kiu senigas je la unio kun Dio, kiu baras al la animoj kaj la koroj la vojon al feliĉega eterneco, tiu plenumas krimon superan al ĉiuj rafinitaj murdoj.

"Strangoli infanon, tranĉi al ĝi la kolon, dispecigi ĝin kaj senigi ĝin je la vivo, kiu necese estingiĝus kelkajn jarojn poste, tio meritas la morton laŭ la leĝo : estas juste.

"Sed kion do meritos tiu, kiu senigus tiun infanon je la vivo ne finiĝonta en la feliĉo de la Ĉielo?

"Kion meritos tiu, kiu deligas tiun kreiton de ĝia Dio, al kiu ĝi estis unuigita?"

(Vivo de P.Bailly, "**La Kruco**", 20an de julio 1930)

Do la ateisto meritos la plej drastajn turmentojn, la plej teruregajn torturojn. Kaj la kredanto fidas al Dio, por ilin puntrudi al li. Kion mi diris? Li antaŭe ĝojas pri tio...

Sankta Tomaso de Akvino ja diris : "Sen ia dubo, la scio, kiun havas la anĝeloj kaj la elektitoj pri la malbono farata sur la tero aŭ pri la punoj suferataj de la kondamnitoj en infero, estas por tiuj feliĉegaj estuloj kaŭzo de okaza ĝojo."

Aliloke li diras ankaŭ : "Por ke la sanktuloj pli ĝuu sian beatecon, kaj ke iliaj dankesprimoj al Dio estu pli abundaj, estas al ili donite kontempli, en ĝia plena abomeno, la torturon de la malpiuloj." (**Summa Theol.**, in suppl.9, XCIV 13).

Ĉiuj teologoj defendas tiun abomenan tezon. Sankta Krizostomo : "La elektitoj ne nur sentos nenian kompaton al la damnitoj, sed ili estos, kiel Dio, ardigitaj de kolero kontraŭ ili" (**Homil.X**, in II-a ep. al Kor.)

Sankta Francisko de Sales : "La plezuro de Dio estas ĉiam adorinda, aminda kaj inda je eterna beno ; tial la justulo, kiu kantas laŭdojn pri lia korpardono al la savitoj, same ĝojos, kiam li vidos la venĝon. La beatuloj ĝoje aprobos la juĝon, kiu damnos la kondamnitojn." ("**Pri la amo al Dio**", L.IX, ĉap.VIII)

La Majstro de la Sentencoj : "La elektitoj antaŭenvenos por konsideri la turmentojn de la malpiuloj, kaj tiun spektaklo ne kaŭzos aflikton al ili ; male, vidante la neesprimeblajn dolorojn de la damnitoj, en la ebrio de sia ĝojo ili dankos Dion pri sia savo" (**Sentencoj**, L.IV, dis.50, ĉap.IV)

Ĉu vi imagas la bildon?

La "elektitoj" frandantaj la vidon de la turmentoj trudataj al la pekuloj. Ili ĝojegas, ili duonfreneze ĝuas, ili dankas Dion. Ili lin stimulas : "Suferigu ilin, tre, ankoraŭ pli! Por ke iliaj kvazaŭfrenezaj krioj suprenvenu ĝis mi, kiel kareso, kiel la superega rekompenco ŝuldita al mia virto! Ha! kiom ili suferas, tiuj damnitoj, kaj kiel granda estas mia volupto, dum mi kontemplas ilian abomenan mizeregon!"

Ĉu moralo estas tio, tiu naŭza, obscena, kruela apologio de la plej barbara egoismo?

Kaj oni aŭdas stultulojn aserti, kun konvinkita mieno, ke nur la religio povas igi la homon malpli malica!

## PRI LA GRANDA "UTILECO" DE DIO

*Voltaire diris : "Se Dio ne ekzistus, endus inventi lin." Al kio DIDEROT respondis : "Guste tion oni faris."*

- Vi draste diligentas por detrui la ideon pri Dio, sed vi perdas vian tempon. La plimulto el ĝiaj partianoj eĉ ne plu kredas pri ĝi. Ja nur pro intereso ili konservas la religion. Dio estas utila!

**Dio estas utila!** Sen li ĉio disfalus. La socio fariĝus neloĝebla. La malriĉuloj ekribelus. Kien ni irus?

Eĉ se ni ne kredas pri ĝi, ni daŭre plu instruu lian ekziston.

La birdotimigilo estas ja maljuna, certe, sed ĝi povas plu timigi kelkajn paserojn.

Donu al ni la malriĉulidojn, postulas la Klerikaro. Kaj ni preparos por vi generaciojn da sklavoj obeemaj kaj nelacigeblaj...

Ni instruos al ili, ke "Dio estas la fina celo de nia aktiveco." (Msj. Rolland Gosselind) kun papo Leono XIII-a, ni ripetados al ili, ke "nur post la morto ni komencos vivi." (**"Rerum Novarum"**). Ni diros al ili, ke ili streĉu sian zonon sur la tero por meriti la ĉielon...

Riĉuloj kaj potenculoj, vi bezonas la Pastron!

"Oni pligrandigas la aŭtoritaton, kiam oni vidigas Dion en ĝi, oni ĝin malgrandigas, kiam oni montras nur la homon." (P.Monsabré).

La aŭtoritato devas esti bazita sur Dio, - t.e. sur la Eklezio.

"La homo ne povas esti sendependa estaĵo, ĉar li estas estaĵo kreita. La animo devas obei al Dio kaj al **tiuj, kiuj timas de Dio la aŭtoritaton** - kaj tion farante ĝi estas libera, kondiĉe, ke ĝi obeu nur al ili." (Runoël, **"La Kruco"**, 24an de januaro 1930).

"Fronte al la fideluloj, la pastro estas la homo de Dio kaj de la Eklezio ; li rajtas je ilia respekto kaj ilia obeado." (Lebreton, **"La Kruco"**, 1a de julio 1932)

Ilia "libero" estas donita nur por **obei.**

Aŭskultu Leonon XIII-an : "La katolikoj serĉas en Dio la rajton komandi, kaj la fundo venas de tie kiel el natura fonto kaj el sia necesa principo." (**Encikliko "Diuturnum"** pri la origino de la civila povo, 29an de junio 1881).

Aŭskultu la elokventan P.Didon : "Kion vi faros el la homo, se li ne estas plu la dia sklavo de la devo, la fidela servanto de sia propra konscienco? Ĉu vi tion ne vidas hodiaŭ? La nekredo disvastiĝis kiel densa nubo sur nia lando. Dio eklipsiĝis, la konscienco vualiĝis kune kun Dio, sed restis homoj de plezuro, ambiciuloj, agitatoj, estuloj de ruzo, de perforto, egoistoj, predikantoj de sukceso, ŝtelistoj kaj subpremistoj, kaj se ni pro tio tiel profunde suferas, se niaj esperoj disfalas, senkuraĝigite, ne dubu, estas tial, ke la konsciencoj estas frapitaj de paralizo!" (**"La Kruco"**, 9an de aŭgusto 1929).

Aŭskultu la impetegan Louis Veuillot : "La religio estas la lasta gvardio kaj la lasta korpogardisto. Kiuj ne manĝos plu la Eŭkaristion, tiuj manĝos la burĝon... Sola la benita akvo estingos la petrolon." (citita de pastro Duplessy, **"La Religio"**, p.50).

Jen kial Mussolini, Millerand, Gustave Hervé, ĉiuj forkurintoj el la laborista klaso, ĉiuj reakciuloj, ĉiuj ekspluatistoj, finiĝas en la brakoj de la pastroj. Ili vetas pri Dio por savi siajn privilegiojn.

Feliĉe la popolo pli kaj pli edukiĝas, kaj baldaŭ ĝi rifuzos engluti viajn supernaturajn kolubrojn...

## EĈ SE "LI" EKZISTUS!

*Oni trovas sufiĉan refuton al la religio en ĝia strebado por sin mem pruvi.*

Eĉ se "Li" ekzistus, mi rifuzus fleksi la genuon antaŭ Li.

Mi ja scias, ke en la Korano estas skribite : "Dio volas, ke vi estu dankemaj."

(La vere grandanima bonfaranto ne postulas dankon : tiu ĉi devas esti spontana, libera - kaj ne deviga. Jen estas jam unua punkto, kiu ŝokas min.)

Sed dankemaj pri kio?

Ĉu pri tio, ke Li donis al mi la vivon? Ĝi rezervis al mi tiom da provoj, da malsukcesoj, da pezaj suferoj...

Ĉu la Eklezio ne instruas al ni, ke "Dio kreis nin por sia gloro?" Por servi al Li kiel ludiloj. Vere, tio ne valoras la penon danki Lin.

Mi legis en katolika gazeto : "Ateisto estas infano, kiu rifuzas koni sian patron." Patroj tiaj, kia tiu ĉi, nemulte meritas esti amataj!

Mi nur respondas al tiu pia kunfrato : "La diisto estas infano, kiu time tremas antaŭ la krueleco de imagita Estulo - kaj kiu persiste preĝas Potencon, kiu neniel iam manifestiĝis."

Eĉ se li ekzistus, mi ne povus ami lin. Ĉu oni povas ami Dion? Kia stultaĵo! Li estas tro granda, tro forta, tro malproksima. Amo necesigas certan reciprokecon, agrablan ekvilibron.

Inter Dio kaj homo, vera amo estus neebla. Ĉar amo devas esti neprofitema. Kaj kiel ĝi povus esti tia, sin turnante al potenco tiel grandega, al mastro tiel terura?

Dio ne tiom postulas. Manke je nia amo, li kontentiĝas per nia submetiĝo.

"Mi estas la Sinjoro cia Dio. Ci ne havos aliajn Diojn!"

Li estas Dio ĵaluza, ordonema, venĝema - kaj obstina!

Bossuet bone montris tion al ni : "Vi malmoliĝas kontraŭ Dio, li malmoliĝas kontraŭ vi ; vi kiel homo, per la tuta forto de via koro ; li, kiel Dio, per la tuta forto de sia, se al mi estas permesite tiel paroli. Ho ve! ne estas proporcio, kaj la vetludo ne estas egala : sed vi volis unua mezuri vin kun li."

Tiu Dio estas ja tre resentema. Li sin inspiras de la leĝo de Repago, kaj redonas al ni baton por bato, stultaĵon por stultaĵo, insulton por insulto. Sed ni estas antaŭe venkitaj, kaj estas por Dio senglora triumfo nin premegi.

Eĉ se Li ekzistus, mi malŝatus lin tial, ke li sin kontentigus per tiel facilaj, tiel malmulte kuraĝaj venkoj.

S-ro Ch. Journet ("**La Intelekta Vivo**") asertas, ke la venĝa Justo pezas nur sur tiuj, kiuj libere rezistis al la neesprimeblaj komplezoj de la Amo.

Sume, Dio estas ofendita, kiam ni repuŝas liajn afablajn komplezojn. Li spitĉagreniĝas tiel facile, kiel la belaj virinoj. (Estas ja vere, ke la komplezoj de tiuj ĉi estas malofte repuŝataj.)

Cetere, se la komplezoj de Dio estas repuŝataj, tio estas ankoraŭfoje tial, ke li tion volas.

"Neniu konas Dion, krom tiu, kiun Dio lumigas ; kaj neniu amas Dion, krom tiu, al kiu li inspiras sian amon." (Bossuet, p.308).

Dio trudas nin ami lin, kiam al li plaĉas. Stranga amo. Sen ĉarmo por ni, kaj sen valoro por li.

Dio volas esti amata, glorata, flategata. Ve al la obstine malobeaj! Ili iros en la eternan fajron. "Ĉar Dio ne konsentas esti priridata de sia kreito" (!)*

Esto ĉiopova kaj infinite perfekta, kiu koleriĝus ĝis furiozo... tial ke oni estus mokridinta pri li... Tiu ĉi azenaĵo ne malbeligas la kolekton.

Eĉ se li ekzistus, mi rifuzus preĝi lin.

"Kiuj preĝas Dion, tiuj konsideras, ke la Superega Esto estas kredita el malnobleta vanteco, sentema al flatado, kaj inklina al tiu kronika maljusto, kiu distribuas senhontan favorregadon... Homa reĝeto, kiu rezervas siajn

donacojn kaj favorojn al siaj korteganoj, kaj mezuras ilian meriton laŭ la fleksebleco de ilia spino."

(G. de La Fouchardière)

"Tuj kiam oni pripensas pri ĝia perfekteco, diris Jules Simon, fariĝas neeble akcepti, ke li povus ŝanĝi ion en tio, kion li volis, kaj ke tiu ŝanĝo povus esti kaŭzita de propeto de estaĵo tiel frivola, kiel neantaŭvidkapabla, kiel estas la homo... Se Dio modifas sian volon, li ne estas neŝanĝebla." (citita de Pastro Michel)

La preĝo utilas al nenio. Ĝi deprimas, brutigas, kastras tiun, kiu sin mergas en ĝi.

R.P. Padé predikis en Lourdes pri la neceso "de la preĝo, **malforto** de Dio, forto de la homo". ("**Ĵurnalo de la Groto de Lourdes**, 10an de aŭgusto 1930)

**Ĉiopova**, kiu havas **malfortojn**... kia fenomeno!

Dorsflanke de bonatesta bileto distribuita al lernantoj de kristanaj lernejoj mi legas : "Kiam ni donas almozon, ni ĉiam faru ĝin kun la intenco doni al Dio kaj ne por esti rigardata kiel karitata, por ke iam Dio estu **devigita** rekompenci nin."

**Devigita**? Ĉion konsiderante, la preĝo estus la arto trudi la bonan Dion, kaj akiri liajn favorojn per senĉesa turmentetado, tedado...

Eĉ se li ekzistus, mi ne ĉesus kontraŭbatali la krudan karikaturon, kiun la kredantoj faras al si pri sia Dio!

Sed nu, se la Ĉielo estas vakua, se Dio ne ekzistas, se estas nenio..., kio fariĝos el ni? Por kio utilas vivi? Kiel abomena perspektivo! Vi deprenos de ni ĉion, kio konsistigas nian ekzistokialon!...

Timo de sklavo, ploranta por konservi siajn katenojn. Antaŭtimoj de malkuraĝaj animoj, nekapablaj rigardi fronte al la vivo, kaj libere trabati vojon al sia Feliĉo...

Perdante Dion, vi restus senhelpaj, scipovantaj nenion fari per via aktiveco, via inteligento, via koro? Nu do!

La akceptema kaj belega Naturo, kies beleco senhalte renoviĝas, la Naturo estas pli granda ol viaj revoj, kredantoj!

La Scienco rezervas al vi la senkomparajn ĝojojn de la Eltrovo kaj de la Studado. Laboru. Kulturu vian cerbon. La Scienco instruos al vi pli da aferoj ol la religio, kredantoj!

Amikeco, Korinklino, Amo estas neelĉerpeblaj fontoj de perfekta kaj pura ĝojo. Sufiĉos doni sian propran koron senkalkule, sen retenemo, sen espero pri rekompenco kaj sen timo pri puno. La homa koro estas pli milda ol tiu de cia kruelega Dio, ho kredanto!

La Idealo de Socia Justo, la lukto por liberigo de la malgranduloj, la starigo de malpli barbara socio, la ofero de ĉiu al la Libero de ĉiuj, al la Egaleco, kontraŭ ĉiaj tiranecoj. Tiu idealo estas pli nobla kaj pli granda ol tiu de cia hipokrita kaj ambicia Eklezio, kredanto...

Malkonfesante Dion, ci ne malpliigos cian vivon. Tute male, ci forpelos la nubon plej malluman kaj plej pezan... Malkonfesante Dion, ci fine fariĝos inda konkeri kaj frandi la vivon veran, konscian kaj liberan, radian kaj ĝojan!

-----

* Pastora letero de Msj. Castellan, arkiepiskopo de Chambéry, publikigita en "La Kruco" (pri "la Pentofaro").

## POR KONKLUDI

*Oni povus en ekstrema okazo akcepti Dion, se li ne estus havinta la danĝeran ideon sendi al ni... "reprezentantojn".*

*André Lorulot*

Mia libro estas finpreta, kaj mi estis lasonta ĝin foriri al sia destino, bona aŭ malbona... kiam miaj okuloj trafis la Stultaĵon de "**Mercure de France**". Oni parolis en ĝi pri la tre kristana marŝalo Foch :

"**Foch estas el la idaro de Montanjo, La Boecio, Paskalo kaj Kartezio. Al tiuj granduloj li ŝuldas ĈION. Al Dio, la CETERON.**"

Crockaert, ministro de la nacia defendo de Belgio ("**Journal des Débats**" 4an de julio 1932)

Ha! estas bele, ci vidu, S-ro Crockaert! Por unu fojo*, mi multe ridis.

La filozofoj donis al li ĉion (kiom ili kredeble bedaŭras, vidante la uzon, kiun li faras el tiu ĉio). Kaj Dio **la ceteron.**

T.e. nenion.

Mi diris nenion alian en tiu ĉi libro. Oni estas neniam pli perfidata, ol de siaj, Sinjoroj kredantoj!

La Scienco, la Arto, la Naturo, la Amo, la Homaro donas al ni ĉion. Dio aldonas la ceteron, beletan nulon.

Mi ne povus deziri pli bonan konkludon ol tiu de S-ro Crockaert!

-----

* Imito de kutima diro de franclingvaj belgoj : "Pour une fois, sais-tu..." (N. de la tr.)

# DOKUMENTOJ

## "PATRO NIA, KIU ESTAS EN LA ĈIELOJ"

La diistoj provas klarigi la malbonon kun mallerteco vere kruela por ilia Dio - al kiu ili donas, per ridinda blasfemo, la indignigan aspekton de turmentisto kaj torturisto.

- Necesas suferi, ili diras, por kulpelpagi. La amaraj larmoj, kiujn ŝiras al mi la malfeliĉo, povos solaj forstreki la senhonorigon de la origina peko, kaj malfermi al ni la pordojn de la dia Paradizo!

Tra tiu babilaĉo oni tro bone vidas la supereman kaj ekspluateman volon de la Klerikaro, por insisti. Necesas suferi ĉi-malsupre por gajni la Ĉielon - kaj precipe por ke la digestado de la moŝtaj riĉuloj ne estu malhelpita.

Tiu sufero, tiel neevitebla kiel dia, estas laŭdire logika konsekvenco de la "origina" peko, kiun ni estas devigataj elaĉeti.

La homoj estas malfeliĉaj... pro kulpo de Adamo kaj Eva. Jen estas ĉio, kion eltrovis la kredantoj por senkulpigi sian Dion - tiel sukcesante nur igi lin tiom groteska kiom kruela (kaj ne estas malmulte diri).

Kaj la animaloj, kial ili suferas?

Ĉu ankaŭ iliaj prapatroj kulpis pekojn, krakmanĝis pomojn aŭ ion alian?

Tamen, tro ofte ili trenas mizeran ekzistadon. Ilia vivo estas senĉesa batalado kontraŭ la malsanon, la naturajn plagojn kaj la senkompatajn malamikojn de ilia specio. Preskaŭ ĉiam ili mortas en tragika kaj sanga maniero... Mallongedire, ili estas eĉ pli malfeliĉaj ol la homoj - sen devi elaĉeti, mi supozas, ian originan pekon, kaj sen havi animon savendan, en perspektivo pri alia mondo...

El kiu ajn vidpunkto, ĉe kiu oni sin situigas, la Dio estigita de la kredantoj do ne estas, ne povas esti bona!

Legu tiun ĉi belan paĝon pruntitan de majstro el la angla raciismo :

*"La plej alta koncepto havebla pri Dio estas laŭfame tiu de la Kristanoj : tiu de Ĉiela Patro. Ĝi atribuas al la Superega Estaĵo amemon, korkompaton infinitajn. - "Dio estas tute amo." Tiu koncepto estas sublima, poezia kaj dolĉa, sed ĝi kolizias kun fatala obĵeto : ĜI NE ESTAS VERA...*

*Ĉar la Ĉiela Patro, laŭnature tute amo, estas ankaŭ tiu, kiu ĉioscia kaj ĉiopova kreis la mondon.*

*Ĉiopova kaj ĉioscia, li ĉiam havis la povon krei la mondon laŭ sia elekto. Estante Dio de amo, li ne povis krei mondon, en kiu la malamo kaj la doloro trovu lokon.*

*Nu, en la mondo estas malbono ; ĉiam estis.*
*Kial bona amema Dio permesis al malbono penetri en la mondon? Ĉion sciante, ĉion povante, li povis ekskludi el ĝi la malbonon. Estante bona, li volus malami la malbonon. Estante Dio de amo, li dezirus ekskludi la malbonon. Kial do li permesis, ke la malbono penetru?*

*La mondo estas plena de penoj, de doloroj, de malamoj, de krimoj, de kvereloj kaj de militoj. La tuta plena vivo estas lukto senĉesa kaj ofte mortiga por la ekzistado. La leĝo de la naturo estas leĝo de predo.*

*Se Dio estas Ĉiela Patro, amema, amanta, ĉioscia kaj ĉiopova, kial li faris mondon, en kiu furiozas kruelo? Kial li toleras la pluiĝon de la malbono kaj de la doloro? Kial li ne donas al la mondo pacon, sanon, feliĉon, virton?*

*En la Nova Testamento, la Kristo komparas Dion, Ĉielan Patron por la homo, al tera patro, la unua estas pli bonvola, pli tenera ol la dua. "Kiom pli*

*bona via Patro, kiu estas en la Ĉieloj!..."*

*Laŭ aŭtoritato de la fondinto de la kristanismo, ni komparos la Ĉielan Patron kun la tera patro, kaj ni baldaŭ vidos, ke la Kristo ne estis prava, deklarante, ke Dio estas al la homo pli bona patro, ol estas homo fronte al siaj propraj idoj. Ni konstatos, ke la poezia kaj milda teorio pri Ĉiela Patro kaj pri Dio de Amo estas mensoga.*

*"Kiu inter vi, se lia infano petas de li panon, donos al li ŝtonon?" - Neniu, inter ni. Sed en la grandaj malsategoj, kiel en Hindio, en Rusio, Dio lasas milionojn da homoj morti pro malsato. Tiuj estuloj, tiuj infanoj, petegas, ke li donu panon al ili Li lasas ilin morti. Ĉu ne estas tiel?*

*Dio faris la sunradion, la rideton de la infano, la gracion de la virino, la verdajn montetojn, la bluajn marojn ; la muzikon, la ridon, la amon, la gajon ; la palmon, la florojn de kratago, la venteton parfumitan de eriko, la najtingalon kaj la rozon.*

*Sed Dio faris la tertremon, la vulkanon, la ciklonon ; la ŝarkon, la vipuron, la tigron, la polpon, la venenan beron, kaj la abomenajn mortigajn ĝermojn de ĥolero, de tuberkulozo, de tifoido, de variolo kaj de pesto. Dio permesis la malsategon, la epidemion kaj la militon. Li permesis la martirecon, la brulŝtiparon, la sklavecon, la masakrojn, la torturon kaj la homoferojn. Dum milionoj da jaroj, li vidis de supre la spektaklon de la nescio, de la mizero kaj de la krimoj de la homo. Li estis kune aktoro kaj spektanto de tiu tragedio, kiu estas la tera vivo. Ĉu ne tiel estas?*

*Dum miloj da jaroj - eble milionoj - la homaj generacioj preĝis Dion, ke li konsentu al ili helpon kaj konsolojn, sed Dio restis surda, muta, blinda...*

*La scienculoj diligentis por solvi la enigmojn de la vivo, por gvidi kaj helpi siajn similulojn. La pastroj kaj la disĉiploj de Dio persekutis kaj mortigis tiujn scienculojn. Dio ne moviĝis. Ĉu ne estas tiel?*

*Nun la scienculoj strebas renversi la abomenojn de kancero, de variolo, de tuberkulozo ; nu, nek el la Arda Vepro, nek de la Sankta Monto, nek per la buŝo de siaj profetoj nia Ĉiela Patro prononcas vorton de konsilo aŭ stimulo.*

*Milionoj da senkulpaj animaloj estis submetitaj al abomenaj torturoj de la vivsekcado, tial ke la homoj volis ajnapreze eviti la minacojn de la plagoj detruantaj la homan specion ; kaj Dio permesis, ke tiuj kompatindaj bestoj abomene suferu, dum li povus ŝpari al ili tiujn dolorojn, rivelante al la homo la sekreton, kiun oni tiel kruele serĉis. Ĉu ne vere?*

*"La Naturo estas nur bekoj kaj ungoj." Sur tero kaj en maro, la kreitaj animaloj ĉasas, vundas, mortigas, voras unuj aliajn. La delikata hirundo en sia flugo voras la pikmuŝeton tiel delikatan kiel ĝi mem. La gracia flugfiŝo, kiel bela blanka birdo, superflugas la bluan belegon de la tropikaj maroj. Ĝia flugo estas fuĝo de teruro, ĉar ĝi estas postkurata de la vorema delfeno. La muŝo ikneŭmono metas siajn ovojn sub la haŭton de la raŭpo ; la ovoj elkoviĝas dank'al la varmo de la sango de la raŭpo ; ili produktas kovitaron da larvoj, kiuj voras la raŭpon viva. Ĉarma infano dancas sur la razeno de ĝardeno ; ĝiaj piedoj premegas rampajn kreitaĵojn : multokupata formiko aŭ brilega skarabo, kun rompita dorso, tordiĝas en la polvo, nesuspektitaj... Mikrobo eliĝas el stagna akvo, kaj la ridema infano, trezoro de sia patrino, abomene mortas, mortigita de difterio. Marŝvelego ruliĝas al la bordo, kaj dudekmil personoj estas dronigitaj, pistitaj, neniigitaj. Vulkano subite erupcias, kaj mirinda urbo fariĝas amasego da ruinoj, ĝiaj loĝantoj estas karbigitaj, kaj iliaj kadavroj estas disŝiritaj. Kaj la Ĉiela Patro, li, la Amo, kiu havas la povon savi, li ne donas ian signon... Ĉu ne estas tiel?*

*Blindeco, epilepsio, lepro, frenezo falas, abomenindaj plagoj, sur miriadon da Diidoj, kaj la Ĉiela*

*Patro donas al ili nek konsilon nek konsolon. Nur la homo helpas la homon. Nur la homo kompatas, nur la homo provas savi...*

*Milionoj da sendanĝeraj virinoj estis bruligitaj kiel sorĉistinoj. Dio, nia Ĉiela Patro, havis la povon ilin savi. Li lasis ilin suferi kaj morti. Dio sciis, ke tiuj virinoj estas torturataj kaj bruligataj sekve de falsa akuzo. Li sciis, ke malnoblegaj murdistoj agadas en lia nomo. Li sciis, ke la tuta konstruo de la krimo staras sur la pretendita teksto de lia "revelacio" al la homoj. Li povis savi tiujn virinojn, li povis lumigi iliajn persekutantojn, li povis per unu blovo balai la teroron, la kruelon, la nescion de siaj pastroj kaj adorantoj... Li silentis. Li permesis, ke tiuj malfeliĉaj virinoj estu torturataj, murdataj en lia nomo. Ĉu ne estis tiel ?*

*Ĉu nun vi komparos la Ĉielan Patron al ĉi-tiea patro ? Ĉu ekzistas iu tera patro, kiu, kiel Dio, lasus siajn infanojn suferi ? Se iu homo havus la rimedon kaj la povon malhelpi aŭ aboli la militon, la nescion, la malsaton, la malsanon ; se tiu homo havus la rimedon kaj la povon aboli la homajn erarojn, la homajn maljustojn, kaj ne farus tion, ni nomus lin malhumana monstro, kruela malamiko. Ĉu ne vere?*

*Nu, Dio posedas la sciencon kaj la potencon ; oni diras, ke ni rigardu lin kiel Ĉielan Patron, Dion de infinita scio, de infinita korkompato, de infinita amo...*

*La Kristanoj iam diris al ni - kaj la plimultaj ankoraŭ nun diras - ke la Ĉiela Patro, tute amo kaj korkompato, volas kondamni al infero la kreitaĵojn, kiujn li faris,... por ke ili elaĉetu siajn pekojn ; ke, kreinte nin malperfektaj, li volas puni nin pro niaj malperfektoj, per eterna torturo en ĉiama fajrolago. Ili diras al ni, ke la bona Dio permesas al la Diablo, ke li venu sur la teron, kaj tentu la homon por lin pereigi. Ili diris, ke tiu Demono gajnas pli da animoj ol la Kristo povus gajni : ke "estos plimulte da virkaproj ol da ŝafinoj..."*

*Por sin forsavi el tiuj abomenaj teorioj, la Kristanoj (kelkaj el ili) forĵetis la doktrinojn pri la Infero kaj la Diablo.*

*Sed sen Demono, kiel persiste teni la kredon pri Dio de amo kaj bono? Kun Dio bona kaj Dio malbona (la Demono) oni povus elturniĝi, ĉar tiam la bono povus esti atribuita al Dio, kaj la malbono al la Demono. Kaj tion ja imagis la Persoj en antikveco en sia doktrino pri Ormuzdo kaj Arimano. Sed, kun la Demono, la kredo pri Ĉiela Patro kompata kaj ama fariĝas neebla.*

*Se Dio benas, kiu malamas? Se Dio ravas, kiu malbenas ? Se Dio helpas, kiu faras la malbonon ?*

*La kredo pri Ĉiela Patro, kiel la kredo pri la perfekto de la Biblio, metas siajn sektanojn en fantaziegajn kaj eksterordinarajn situaciojn. Ekzemple: unu kristano skribis al mi pri animalo nomata ai-aio. Li diras :*

*"Ekzistas malgranda animalo nomata ai-aio. Ĝi havas du manojn ; ĉiu el ili havas kvin fingrojn. Tiuj manoj prezentas tiun apartaĵon, ke la meza fingro estas rimarkinde longa, proksimume duoble ol la aliaj ; tio, por ebligi al ĝi eltiri insekton de speciala specio el la fendoj specialaj de specialaj arboj, sur kiuj ĝi vivas. Kiel la fingro komencis plilongiĝi? Malgranda plilongiĝo absolute neniel utilus, ĉar la fendoj de tiuj arboj estas 50 ĝis 70 milimetrojn profundaj. Kredeble la longoŝanĝo de tiu fingro okazis subite. Ne estas ebla alternativo. Kion farus tie ĉi la natura selektado? En tio ĉi, kiel en multaj aliaj okazoj, ni havas pruvon pri la infinita boneco de Dio."*

*Kiel la kreo de tiu longa fingro povas pruvi "la infinitan bonecon de Dio"? Infinita boneco de Dio kontraŭ kiu? Ĉu kontraŭ la animalo, al kiu tiu speciala fingro ebligas kapton de la insekto? Sed tiaokaze, kaj la insekto? Oni do ne zorgas pri ĝi? Ĉu la longa fingro de la animalo ne pruvas la infinitan kruelecon de Dio kontraŭ la insekto?*

*Kion pensi pri la infinita boneco de Dio, kiu permesas al la mikrobo de ĥolero sin nutri sur la homo? Kion pensi pri la infinita boneco de Dio, kiu instruas la larvon de la muŝo ikneŭmono vori vivanta la brasikraŭpon?*

*En ĉio ĉi mi vidas nenian bonecon : mi vidas nur infinitan stultecon de sentimentala superstiĉo.*

*Homo falas en maron, kaj vidas ŝarkon veni al li: mi ne povas imagi, ke li laŭdos la infinitan bonecon de Dio, tial ke ĝi favoris la ŝarkon per dono de tiel vasta buŝo... La rapideco de la leporhundo estas bono por la leporhundo, sed ne por la leporo.*

*Nu, tiu teorio pri Ĉiela Patro korkompata kaj amema estas fundamenta por la kristana religio.*

*Detruu la ideon pri Ĉiela Patro, kiu estas Amo, kaj la Kristanismo estas amasego da ruinoj. Ĉar, se iam tiu koncepto estas neniigita, ne troviĝas plu bonvola Dio, sur kiu oni povus skafaldi siajn esperojn...*

*Kaj mi proklamas, ke la Ĉiela Patro estas mito ; ke fronte al nia kono pri la vivo kaj la mondo, ni ne povas prudente kredi pri ĝi.*

*Ne ekzistas Ĉiela Patro ame zorganta pri ni, siaj infanoj. Tiu ĉi patro estas nur la ĥimera ombro de arda homa revo...*

*Robert Blatchford*
***"God and my Neighbour"***

*(London, the Clarion Press, 44 Worship Street)*
*Laŭ franca traduko el la angla de Raoul Robert.*

*INSTRUOJ DE ATEISMO*

*- NE EKZISTAS ĈIELA PATRO.*
*La homo devas helpi la orfojn kaj la forlasitajn infanojn, alie ili ne estus ŝirmataj.*

*- NE EKZISTAS DIO PLENUMANTA LA PREĜOJN*
*La homo devas aŭskulti siajn similulojn, kaj ilin helpi.*

*- NE EKZISTAS INFERO.*
*Neniu dio, neniu diablo timenda aŭ imitenda.*

*- NE EKZISTAS REAĈETO, SAVO PER KREDO.*
*Ni devas fronti al konsekvencoj de niaj agoj.*

*- NE EKZISTAS EN LA NATURO BONA AŬ MALBONA INTENCO.*
*La vivo estas lukto kontraŭ la malbonojn eviteblajn aŭ neeviteblajn. La kooperado de la homo estas la sola espero de la mondo.*

*- NI NE KONFIDU, KE POST LA MORTO, NI PLENUMOS NIAN TASKON.*
*Ni devas agi nun aŭ neniam.*

*- NE EKZISTAS DIAĴO PROTEKTANTA LA VERON, LA BONON, AŬ LA LIBERON.*
*Tio ĉi estas homaj propraĵoj. La homon koncernas ilia defendo, manke je kio ili malaperus el la tero.*

*George Bedborough*
***Prelegisto de la Amika Asocio por Antaŭeniro de Ateismo** (Nov-Jorko)*

## SENPOVA KOLERO DE LA PAPO KONTRAŬ LA ATEISTOJN

La 18an de majo 1932, la Granda-Blato de Vatikano laŭtigis kontraŭ la ateistojn nekutime fortegajn atakojn, bedaŭregante ne nur la kreskadon de ilia nombro, sed ankaŭ la efikecon de iliaj kampanjoj, kaj dekretante semajnan preĝadon por forturni la danĝeron.

Jen estas kelkaj ekstraktoj el tiu fulma manifesto :

*"Ni vidas en la nunaj tagoj tion, kion ankoraŭ neniam notis la historio : la satanaj standardoj de milito kontraŭ Dion kaj la Religion estas senhonte flirtigataj inter ĉiuj popoloj kaj en ĉiuj partoj de la mondo...*

*"Ĉiam ekzistis malpiuloj, neantoj de la diaĵo, sed ili estis relative malmultaj kaj izolitaj...*

*"Nun, male, la ateismo estas jam disvastigita inter la amasoj...*

*"Tiu nova formo de ateismo, senbridigante la plej perfortajn instinktojn de la homo, cinike kaj senhonte proklamas, ke ne estos paco nek feliĉo en tiu ĉi mondo, antaŭ ol la lasta rubo de religio estos neniigita, kaj ke ĝiaj lastaj reprezentantoj estos premegitaj. Kvazaŭ oni povus trudi silenton al la mirinda koncerto, kiun la kreitaro altigas al la gloro de la Kreinto...*

*"La malriĉuloj, ĉiuj nun frontantaj al la penigaj provoj de senlaboreco kaj malabundo, ĉiuj tiuj, en pentospirito, oferu kun plej granda rezignacio la mankojn, kiuj, en tiu ĉi malfacila epoko kaj en la nuna stato de la socio, estas al ili trudataj de la Dia Providenco, laŭ intencoj nediveneblaj, sed ĉiam korkompataj. Ili akceptu de la Dia mano, per humila kaj fidanta koro, la efikojn de la malriĉo pli penigita de la korpremeco, en kiu nune luktas la homaro...*

La 4 A respondas al la aŭgusta farsulo.

**La Amerika Asocio por la Antaŭeniro de Ateismo** ekscinte pri la atakoj de Vatikano, respondis per jenaj vortoj:

*Nov-Jorko, la 19an de majo 1932.*

*Papo Pio XIa*
*Vatikana Civito*

*Sinjoro,*

*Via enciklika ne haltigos la progreson de la ateismo.*

*Kia malŝatmoko, ke vi, meze de viaj riĉaĵoj, admonas senlaborulojn kaj malsatantojn akcepti "de la mano de Dio, kun humila kaj fida koro, la efikojn de malriĉo, pli penigita de korpremeco, en kiu nune luktas la homaro"! La malriĉo estas plago. Ĝi povas esti - kaj estos abolita de la ateistoj.*

*La semajna preĝado komenciĝonta la 3an de junio por ripari la "universalan mizeron" (kies ekziston vi agnoskas) estas kulmino de absurdo. La homa kondiĉaro povas esti plibonigita nur per materiaj rimedoj.*

*Koncerne vian admonon, ĉie rezisti al nia afero, ĝi instigos nin al plia penado en nia milito al ĉiuj religioj, kaj pli speciale al la Roma Katolika Eklezio, ĉefa citadelo de la opozicio.*

*Estas tro malfrue. Vi ne povas haltigi la kreskadon de la nekredo. La religio estas kondamnita. La estonteco apartenas al ateismo.*

*Kore via*
*Amerika Asocio por la Antaŭeniro de Ateismo*
*Charles Smith, prezidanto.*

## LA RELIGIO ESTAS ABSURDA

*Certe, kiam oni bone pripensas, oni sin demandas, kiel homoj en posedo de sia racio ankoraŭ kuraĝas, nune, lerni kaj instrui la Katekismon kaj la Biblion, tiun kolekton de plej indignigaj absurdaĵoj kaj obscenaĵoj el primitivaj kaj barbaraj tempoj.*

*La homoj pensantaj faras al sia supozata Dio almenaŭ la honoron ne resuprenigi ĝis li tiun amason da absurdaj kaj monstraj dogmoj. Ni juĝu :*

*- Dio kreinto kaj mastrumanto de la mondo, kiu estas ĉie ĉeestanta, sur la plej malproksima stelo kiel sur la ekstremaĵo de la plumo, kiu skribas tiujn ĉi liniojn, sen kies permeso neniu haro falas de sur niaj kapoj! (Kreinto de la mondo, el nenio, sen ia materio.)*

*- Senmorta animo, sin ree enŝovanta en sian korpon, kvankam tiu ĉi estis disvastigita tra la kvar ventoj de post jarcentoj, kaj estos laŭ siaj meritoj rekompencita aŭ punita, en alia senfina vivo!*

*- Misteroj elŝprucintaj en plimulto el la plej malnovaj tradicioj de la homa specio, kiel : la Triunuo, la Enkarniĝo, la Reaĉeto, la Eŭkaristio, al kiuj oni dediĉas kredon, laŭ la maniero de Tertuliano kaj de Aŭgusteno, quia absurdum.*

*- Mirakloj, de Josuo haltiganta la sunon kaj Jesuo reviviganta Lazaron ĝis Sankta Apolina, kies preĝo forkuracas la dentkoloron.*

*- Sakramentoj kun magia efiko, kiuj havas tutan sian efikeon, nur se certaj vortoj estas prononcataj en certa maniero.*

*- Fine, ĉirkaŭ la homo, la anĝeloj kaj la demonoj, la legendoj pri la Paradizo, la Purgatorio, la Infero.*

*La sistemo estas kompleta, des pli impona kaj konsterna, ju pli fabela kaj verŝajna ĝi estas. Ĝi estas oportuna ; ĝi ŝparigas la lacigon pensi ; ĝi estas la religio de la pigruloj, pri kio parolas Kantio.*

*Jules Claraz*

## PRI LA NEUTILO DE BENOJ

al S-ro Motta, prezidento de la
Helvetia Konfederacio.

Kiel prezidento de la Konfederacio vi malfermis la laborojn de la Internacia Konferenco en Laŭzano por la malarmado.

Esprimınte bonvenon al ĉiuj ĉeestantaj delegitoj, vi aldonis, "en la nomo de la tuta svisa popolo" : "Mi rekomendas vin, laŭ nia respekteginda helvetia formulo, al la dia protektado."

Ke tiu formulo estas respekteginda, en la senco de tre antikva, pri tio mi ne malkonsentas, via Prezidenta Moŝto. Sed ke ĝi estas inteligenta kaj logika, estas alia afero.

Mi ne ĉikanos pri la rajto, kiun vi havas, prononci tiun formulon en la nomo de la svisa popolo "tuta". Tiu popolo ne konsistas nur el katolikoj (kiaj vi) aŭ de protestantoj. Granda nombro el viaj samlandanoj estas liberpensuloj aŭ ateistoj, kaj ne havas eĉ plej etan fidon pri la dia protektado, kiun vi permesis al vi, iom arbitre, permesu al mi diri, alpreĝi en ilia nomo.

Ni flankelasu tiun malgravan atencon al la konsciencilibero - kiu ne povus esti vere respektata tiel longe, kiel la registaro ne estos neŭtrala, kaj la Eklezioj komplete apartigitaj de la Ŝtato.

Mi ne kontestas vian sincerecon. Vokante al la dia protekto, vi ne obeis, mi volas kredi, al simpla antaŭjuĝo, al kutimo, al tradicio - kiel faras multaj el tiuj, kiujn oni nomas kredantoj. La Kredo tre ofte estas mortinta en ilia koro, kaj ili obeas al kutimo, al rutino, pro intelekta pigreco, pro egoista kalkulo, aŭ por eviti la malbonintencajn kritikojn de pli-malpli maltolerema ĉirkaŭantaro (ĉar viaj re-

*ligioj, ho ve! nemulte estigas fratecon...)*

*Vi do kredas je Dio - kio estas via rajto. Kaj vi kredas, ke tiu Dio interesiĝas pri la homoj, kaj povas interhelpi favore al ili, kiam li estas petata tion fari, en maniero arda kaj insista.*

*Kiel vi povis, Sinjoro Prezidento, ne esti impresita de jena fakto : Milionoj da homoj vokis al bonvolo de sia Dio, petegante, ke li konsentu al ili feliĉon kaj pacon ; tiaj preĝoj sin sekvis seninterrompe dum pluraj jarcentoj - kaj la homaro ne estas pli antaŭenirinta...*

*Sendube ja, kelkaj progresoj estas plenumitaj, sed al kio ŝuldataj? Ĉu al la agado de via Providenco, aŭ ĉu al la volo de la homoj, al la laboro de la popoloj, al la penado de la scienculoj?*

*Meti la demandon, tio estas respondi al ĝi : La Dio, pri kiu vi kredas, neniam ion faris por la homoj.*

*Via Dio lasis morti - de 1914 ĝis 1918 - milionojn da senkulpuloj. Li povis ilin savi, ĉar li estas Ĉiopova (laŭ vi). Li restis sensenta antaŭ la abomena spektaklo de iliaj suferoj ; li nenion respondis al la maljunaj panjoj preĝantaj por siaj knaboj. Li rifuzis elaŭdi la edzinojn, la infanojn; li torturis la vunditojn, la stumpigitojn, la militkaptitojn. La dia protektado manifestiĝis nur favore al la kanonvendistoj kaj al la provizantoj de kadavrejoj!*

*Post mil aliaj ekzemploj tiu konferenco en Laŭzano, kies malfermon vi tiel pie prezidis, klare montras, ke la vokoj prezentitaj al la diaĵo estas iluziaj kaj vanaj.*

*Tiu konferenco fiaskis, tion vi scias pli bone ol mi. La problemo pri la malarmado ne antaŭeniris je unu centimetro. Male, je la morgaŭo de tiu konferenco Germanio manifestis pli militemajn sentojn ol iam ajn, kaj la situacio inter Ĉinio kaj Japanio plistreĉiĝis, kaj la minacoj pri milito fariĝas ĉiutage pli precizaj.*

Ĉu ne estas iom infanece, fronte al tiu abomena eventualo de estonta masakro, pripetegi... kun naiveco konsterna el homo de via alta valoro... la savan interhelpon de la bona Dio?

La daŭra paco estos kreo de la popoloj mem – kaj ne de la Eterna Patro, ankaŭ ne cetere, de viaj kolegoj Ŝtatestroj, tro ofte paralizitaj per la malicaj fortoj de imperialismo kaj ŝovinismo, kaj eĉ iafoje vasaligitaj de la sinistraj potencoj vivantaj per la morto : fabrikistoj de municioj, peza metalurgio, alta banko...

Por starigi tiun Pacon, kiun deziras ĉiuj popoloj, necesas malarmi, kaj se eble neniigi ĉiujn kaŭzojn de malordo, komencante je via Vatikano, Sinjoro Motta, kies krimaj respondecoj en 1914 estis kategorie pruvitaj, kaj kiu restas nun, per siaj intrigoj kaj sia senmezura ambicio, la plej timinda malamiko de la Paco.

Tio estas opinioj, al kiuj estos al vi neeble aliĝi, tion mi scias. Tamen estas vere, ke ekster tiuj virecaj solvoj, ne estas savo, kaj Eŭropo estas kondamnita al pereo.

Mi simple limiĝas je la espero, Sinjoro Prezidento, ke vi modifos vian sintenon almenaŭ sur unu punkto : ĉar la malzorgo de via Dio estas konstatita, la pruvoj pri lia indiferento kaj malŝato faritaj unu fojon plian, mi supozas, ke en viaj estontaj paroladoj vi rezignos elpreĝi la protektadon de la Providenco, kiu kun tia senĝeno mokas viajn preĝojn.

"Ni helpu nin, ĉar la Ĉielo ne helpos nin!" Ni komprenas, ke la religioj estis inventitaj por nin seninteligentigi kaj servutigi, kaj tial ni kontraŭbatalas ilin per tuta nia energio, por konstrui mondon de harmonio, paco, egaleco, kiu rezultos ne de la kaprico de iu Dio, sed de la Konscienco kaj de la Volo de la Homoj.

**André Lorulot**

## TABELO DE ENHAVO


Averto de la tradukinto 2
Tri citaĵoj 3
Prezenta antaŭparolo (Han Riner) 5
Enkonduka antaŭparolo 9
Ĉu la ekzisto de Dio estas evidenta? 11
Intelekta scivolo kaj kredo 14
"Pruvi, ke Dio ne ekzistas" 16
La aspiro al Dio 17
"Ni supreniru sur la altajn lokojn" 18
Malgrandeco de la homo 20
La superstiĉo pri la videblo 23
Batalo ĉirkaŭ la Infinito 25
Kiu faris la mondon? 30
La "Unua Kaŭzo" 34
Deveno de la Homo 37
Dio kaj astronomio 40
Kien iras la mondo? 45
La Naturaj Leĝoj 46
Balbutaĉoj de genio 48
"Dio parolanta... kaj laboranta" 52
La Mondo estas difekta 54
La Dia Justo 58
La "boneco" de Dio 60
Dieco de la sufero 64
Ĉiuj homoj kredis pri Dio 67
Dialogo kun Pastro Mugnier 70
Psikologio de la Konvertitoj 75
Ĉu oni povas esti scienculo kaj kredanto? 79
Kun Katekismo en la manoj 85
La malpiajn paperojn, al fajro! 92
La ateisto fronte al la Morto 95
La religio estas Malamo 99
Pri la granda utileco de Dio 104
Eĉ se "Li" ekzistus! 106
Por konkludi 110
Dokumentoj 111

## En la sama serio de SAT-Broŝurservo

- Adreso : Esperanto, F 47470 BEAUVILLE -

# LIBERPENSO

**LE DANTEK. La Konflikto** (Trad. LANTI, 122 p.)
**ALAIN. Dubi** kaj aliaj artikoloj. (Trad. Lanti, 14 p.)

"... Nemalofte mi konstatis, ke ateistoj ne pli meritas la nomon liberpensulo ol la plej ortodoksa kredulo... Tiu libro liveras bonan ekzemplon de toleremo per tio, ke deisto kaj ateisto amike interdiskutas pri demandoj, al kiuj ili donas malsaman respondon...". Fine, 9 artikoloj de la franca filozofo ALAIN, trafe elektitaj kaj tradukitaj de LANTI por "Sennacieca Revuo".

**La racia kaj ateista budhismo** (adaptita kaj tradukita de T.F., 33 p.). Temas ĉi tie pri racia (sed neracionalisma) budhismo, same kiel ĝi estis en sia ekdisvastiĝo. En tiu ĉi verkaĵeto, sen azioinfluaj postsignoj, ĝi estas adaptita al la eŭropa nuna pensokapablo. Tiu tute "negativa vojo", krom profunda filozofio, ankaŭ estas praktika instrumento memelliberiga, liberiganta el malkono, el praimpulsoj, el ĉia psikokateno. La realan liberon havigos al ni nek politikistoj nek pensistoj nek doktrinuloj nek iaj ajn mastroj. Sed ni mem provu atingi ĝin.

**Sébastien FAURE. La Krimoj de Dio** (Trad., 32 p.)
Du kontraŭreligiaj prelegoj de la fama anarkista oratoro.

**Ernest ARCHDEACON. La Mistero de nia surtera ekzisto** (Trad. Caubel, 28 p.) Vigla pamfleto kun fortike argumentita rezonado ne nur kontraŭ la katolikan klerikaron, sed kontraŭ ĉiun religion, kontraŭ ĉian kredemon.

**Leo POLAK. Unueco super prokreda dividiĝo.**
**Leo POLAK. Naturleĝo, pensoleĝo, morala leĝo.**
(Trad. F. Munniksma, 12 p. + 16 p.)
Leo Polak estas unu el la grandaj reprezentantoj de monisma, liberpensa, do senkreda filozofio. Li pasie defendis la aŭtonomian, t.e. la propranorman filozofion kontraŭ la heteronomia, t.e. la ordona kredomoralo. Klare atestas pri tio tiuj du radioparoladoj faritaj en 1931 kaj 1932 por la Liberpensula Radiodisaŭdiga Unuiĝo en Nederlando.

Informas pri la Liberpensula Frakcio de SAT
Suzanne CALAS, 27 Cathalo, F-81270 LABASTIDE ROUAIROUX
aŭ : SAT, 67 av. Gambetta, F-75020 PARIZO

Presis : Baudé - F 47470 Beauville